INTERNET ARCHIVE WaybackMachine http://verkoj.fw.hu/28.htm Go AUG OCT NOV 29 2005 2007 2008 About this capture
8 captures
12 Oct 2004 - 29 Oct 2007

Reen al la cxefpagxo

Jenő Rejtő

LA MALBENITA BORDO

tradukis: László Balázs

Unua ĉapitro

Kelkajn vortojn pri pantalono, pri tablokovrilo,
pri mi kaj pri aliaj dubindaj uloj.

1

La Turka Sultano jam du tagojn ne iris sur la straton, ĉar iun ŝtelis lian pantalononon. Tiu vesto estas tre malfacile malhavebla, se iu volas iris por promeni.
Kio estas la instruo el tio?
Mi ne scias.
Sed tute certas, ke malantaŭ la afero latentas edifaj konkludoj.
Ĉar se iu ne estus ŝtelinta la pantalonon de la Turka Sultano, aŭ se Hopkins la Ŝtipulo pli bone atentus pri sia vestaĵo, tiam la sorto de kelkaj homoj, kaj tiu de malgranda regno okazintus alimaniere. Tiaj enigmoj kaŝiĝas kelkfoje en la fono de pantalono.

2

Post ĉio ĉi kelkajn vortojn pri mi, pri la modesta heroo de tiu ĉi romano. Mi estas pacema homo, eble tial, ĉar laŭ patrina branĉo iu mia onklo estis kantoro, kaj jam dum mia frua junaĝo mi ensuĉis la estimon de la leĝoj de la bona moro. Tial nur en la plej malofta okazo mi decidas min al tio, ke mi ŝtelu dum la nomtago Marta. Mia patrino nomiĝis Marta, kaj tiu tago estas tre estimata por mi. Ne miru mian konservativan, moralan pensmanieron; sed miaj spertoj pruvis pli klare, ol la sunlumo, ke sen estimo de certaj principoj kaj tradicioj estas malfacila kaj malebena ĉiu vojo de nia vivo, kaj se ni povas rezigni en la intereso de niaj ideoj kaj principoj, tiel ankaŭ la malebena vojo estas pli facile irebla.
Tial mi povas skribi ĉion ĉi kun tiom da saĝa, artista simpleco, tamen sensitive, ĉar ankaŭ mi mem volis fariĝi kantoro dum mia infanaĝo.
Ke ĝi tamen ne okazis tiel, ĝin kaŭzis la persvademo de mia multe amata patro. Li ja estis simpla iŝisto, de li petis tion de mi, ke mi fariĝu matroso, kiel liaj patro, avo kaj ĉiuj liaj prauloj, inkluzive ankaŭ lian praavon. Li priskribis al mi la belecojn de la ŝipista vivo, la privilegian staton de la matistoj inter la civitanoj, kaj li menciis lordon Nelson, kiu tiutempe apelaciante la kuraĝon de mia praavo kontraŭis, ke oni palisumu la oldulon. Sed la milda persvado de mia patro restintus senefika, se dum la lasta ekspliko li ne estus batinta min per duono da masto , ĝis mi felksiĝinte antaŭ la pezo de liaj argumentoj, mi dungiĝis kiel ŝipservisto.
Sed la sopiro, ke mi estu la pledanto de la paco kaj tiu de la homamo, eĉ nun ĝi vivas en mi tiel, kiel dum mia juna infanaĝo, kiam pri la vivo mi sciis preskaŭ nenion, mi ludadis kun miaj kamaradetoj, kaj mi akompanis mian multe amatan patron al la ambulanco, kiu apogiĝis sur min, kiam venkis lin la superforto de la drinkeja popolaĉo…
Mi akiris mian legitecon laŭ patrina branĉo. La emociigaa historio, kun la titolo Genoveva estis la unua libro, kiun mi akiris, kaj mi legis ĝin plurfoje dum la pasintaj jaroj. Poste mi prenis en mian manon la verkon Gill Blas, kaj en la prizono Sing-Sing mi eĉ dekfoje mi tralegis la historion de "Lohengrin, la Cigno-kavaliro". Tiu altefluga historio definitive transformis mian pensmanieron, kiam mi komprenis la eternan, homan insrtuon de la verko:
Vane vi sekretigas vian paseon; la virino divenas tion pli-malpli poste, kaj vi flugos, kiel cigno.
Kiel saĝa kaj altefluga penso ĝi estas.
Mi proprigas al mia monaĥa inklino tion, ke mi ĉiam volonte meditis en la soleco de ĉelo, kaj nur tiu, kiu jam gluis papersaketojn, li scias, ke tiu agado kiom tagŭgas por enprofundiĝi.
Tiel mi fariĝis vagabondo, kiu pledas por la principo de la paco kaj amo. Mi havas kelkajn ordonojn, kiujn mi observas ĉiumaniere.

1. Evitu la interkvereladon kaj la krudan perforton.
2. Evitu la provokeman homon.
3. Klopodu milde persvadi vian proksimulon.
4. Ne apelaciu senkulpigajn atestantojn, ĉar kion vi atingas, se oni enkarcerigos viajn konatojn?
5. Ne atestu false, nur se ĝi estas necese.
6. Evitu la ebriulon, por ke oni nek vin molestu en simila situacio
7. Ne estus vanta kaj orgojla, por ke vi estu pli bona kaj pli saĝa, ol viaj homkunuloj.
8. Dimanĉe ne ŝtelu, ne trompu, batu neniun, ĉar la ses tagoj sufiĉas por ĉio…

Tiom pri mi, pri miaj karaktero, paseo, leĝoj, kaj pri mia interesa individueco.

3

La nomtago de mia patrino estis la kaŭzo de ĉiu problemo. Mi restadis ĝuste en la pitoreska urbo Oran, sen posteno, pro mia kapitano, kiu havis krudan animon, ĉar mi laboris sur la trimasta ŝipo, nomata Plejdo, kiel sekundara alkoholaĵ-kontrabandisto. La kapitano estis terura, perforta ulaĉo, li ofte misuzis sian grandan, fizikan forton, li batis senanime kaj ne rigardis kien. Tiu bruto atakis min pro ia bagatelo, li rompis mian nazon kaj batis min je la kapo per lato. Ĉar lia senkoreco, se li povis kaŭzi turmenton, estis senlima. Mi nur malfacile povis eviti la pluan brutalecon. Dume li blindiĝis je unu okulo. Sed mi ne tuŝis liajn ripojn. Ili rompiĝis tiam, kiam li ruliĝis en la bilĝon sur la helika ŝtuparo. Tio ne estis mia kulpo. Oni kovras la aperturon de la ŝtuparoj per klap-pordo sur bonorda ŝipo.
Post la interkverelo mi ne plu povis servi sur la ŝipo, kaj mi staris tie malsate en la pitoreska Oran, sen unu centimo. Matroso. Mi havis nek dokumentojn. Mia malnova malamiko, la burokratio senigis min de tiu grava matrosa akcesoraĵo.
Bonŝance miaj kelkaj negocpartneroj kaj amikoj ĵus restadis en libera stato en la urbo, kaj kiel altestimantoj de la antikva instruiteco, ili loĝis en cisterno, konstruita en la flortempo de Karthago, malantaŭ la periferioj. Mi eksciis tion de Hopkins la Ŝtipulo, kiam ni renkontiĝis ĉe kontata ricelisto. Hopkins la Ŝtipulo estis malaltkorpulenta, sed ne dika, kaj dum diskuteto iu batis lin je la vizaĝo per io, ke lia nazo fariĝis malgranda kaj tute ruĝa. Lia voĉo krakis, kvazaŭ li konstante komandus kompanion, li ŝovis sian cilindran ĉapelon sur sian nukon, li fumis tute etajn cigarojn, akiritajn certe brokante, kaj li estis eksterordinare kurbakrura.
Li rimarkis min pli frue, en la homtumulto de la strato, kiam mi iris antaŭ li.
Li frapetis mian ŝultron amikeme, poste li helpis min stariĝi kaj senpolvigis min.
- Saluton, Ŝinketo!
- Ŝtipulo! – mi kriis ĝoje. – La ĉielo sendis vin. Mi ne havas loĝejon, kaj mi ricevis nur dek frankojn por la pluvmantelo de la kapitano.
- Ne gravas, filo mia! Ne gravas, supren la kapon – li diris, ĉar li ĉiam fidis, laŭte kaj larĝ-geste. – Estas nenia problemo!
- Ĉu mi povas kalkuli vin?
- Ĉu vi estas idioto? Tio ne estas demando inter amikoj.
- Ĉu do?
- Ni fordrinkos viajn dek frankojn, poste okazos iel. Venu!
Li estis tia homo. Fidela amiko, kaj ĝisoste oferema. Krome sinjoro. Li neniam dungiĝis, kiel matroso, li disipis la monon facilanime, kaj li tre estimis la virinojn. Rilate lian profesion, li vojaĝadis en la mondo, kiel privatulo, de kiam trofervora ĉefpolicisto komencis viglan korespondadon, koncerne lian paseon kun ĉiu instanco en la direkto de la ventorozo.
Ni fordrinkis la dek frankojn, kaj ni estis ekirontaj.
- Zorgu pri nenio – diris Hopkins, kiam la spilisto ne permesis al ni enpaŝi en la glaciŝrankon, kaj li sendis nin en la direkton de la pordo. – Vi loĝos ĉe mi, kaj baldaŭ ni komencos fari ion.
- He! Ni forgesis manĝi por la dek frankoj.
- Tute ne gravas, amiko, dum vi vidas min. Atentu min! Ni iros al la Turka Sultano kaj manĝos.
Pri la Turka Sultano mi jam menciis komence de tiu ĉi verko, ke du tagojn li ne estus sur la strato, ĉar iu ŝtelis lian pantalonon. Ŝtipulo ekspluatis tiun cirkonstancon al nia favoro. La Turka Sultano, kiun oni nomis tiel pro liaj granda nazo kaj lonaj brakoj, kuŝis duone mortinte en sia ĉambro, sur barĝo. Oni haŭlos ĝin en sekan dokon, sed ĝis tiam, por ke oni ne ŝtelu ĝin po-late, oni dungis la Turkan Sultanon, kiel gardisto, donante al li loĝejon, kaj promesante ducent frakojn da postpago. Sed antaŭ du semajnoj li estis tiel ebria, ke dum li dormis, iu ŝtelis lian pantalonon, kaj de tiam nur nokte li kuraĝas iri en la urbon, ĉirkaŭiginte sin per bunta tablokovrilo, kiel Harun-al-Raŝido, la kalifo.
Hopkins la Ŝtipulo proponis la sekvajn al la Turka Sultano: li disponigos sian pantalonon , laŭ la tarifo de la aŭtomobiloj, por unu frankoj kaj 45 centimoj po horoj aŭ paŭŝale, posttagmeze por 7 frankoj kaj vespermanĝo, por du personoj.
La mortanto ekfumis cigaredon.
- Ĝi estas multekosta – li diris. – Vi ricevos kvar frankojn, sed nur tiel, se vi donos ankaŭ vian ĉemizon al mi.
Ni ne parolu pri la ĉemizo de Ŝtipulo. La peton de la Turka Sultano tio faras komprenebla, ke li havis nenian ĉemizon.
- Mi pruntedonos ankaŭ la ĉemizon por ok frankoj.. Se ne, do ne.
Poste kelkaj okulfrape drastaj honorofendoj ili interkonsentis pri ses frankoj kaj kvardek centimojn da postpago, Ŝtipulo transdonis la pantalonon kaj preskaŭ la tutan ĉemizon. Iun manikon, kiu estis deprenebla, li metis en sian poŝon. La pantalono estis admirinde vasta, kaj eksterordinare mallonga.
La Turka Sultano forrapidis.
Poste ni eksidis pacience sur la ferdeko de la barĝo, Ŝtipulo, kiel ia idianĉefo, ĉirkaŭgita sin per la tablokovrilo, kaj ni atendis.
- Ĉu vi estas certa pri tio, ke la Turka Sultano revenos? – mi demandis.
- Vi povas meti vian manon en la fajron.
- Ĉu li estas tiel honesta?
- Mi ne pensas… – li repondis mediteme. – Tamen li revenos. Li havas loĝejon ĉi tie, kaj ĉambro estas pli komforta, ol pantalono.
Estas malgaja afero, sed kelkfoje eĉ tiel saĝaj homoj eraras, kiel Hopkins la Ŝtipulo. Iom post iom vespereĝis super la brua haveno de Oran. Kaj la Sultano ne revenis. Ŝtipulo rigardis kun abomeno la tablokovrilon, falantan sur lian korpon. Li vekis la imprenson de zorgoplena tablo.
- Ĉu eble ne okazis io malbona al li? – li cerbumadis.
- Hm… se li provis akiri monon, kaj oni kaptis lin, tiam ankaŭ tio povas okazis, ke li jam sidas en la karcero…
- Ĉu sur mia pantalono! – kriis mia amiko amare.
Post nelonge la mallumiĝinta ĉielon kovris stelpompo, aperis la luno kaj patrolo kun fiksita bajoneto.
- Ne venas la kanajlo.
- Eble li tamen venos.
- Ah! Tiu impertinentulo rezignis sian konstantan loĝejon. Ne la pantalono estas tio, kio doloras min. Oni povas iel refreŝigi sian vestaĵaron, sed la honoron… La Turka Sultano ŝtelas mian pantalonon. Mi kontaktiĝis kun multaj friponoj, ankaŭ vi estas mia bona amiko, sed ni ankoraŭ ni ne trompis unu la alian… Ĝi estas malgaja afero.
- Nun kion fari? – mi demandis Ŝtipulon.
- Nenia problemo, oldulo mia – respondis mia amiko. Kaj li sidis tie, kvazaŭ li estus deveninta el la stranga interkruciĝo de indianĉefo kaj kuireja tablo. – Fine ja la vivo iras plu sur sia vojo, kaj mi ne maljuniĝos en tiu ĉi tablokotuko. Hejme, en la akvokolekta cisterno loĝas miaj praluantaj amikoj. Iru al ili, kaj kunportu pantalonon.
Sed ankaŭ tio eblas, ke la Sultano ankoraŭ venos…
- Tio ne. Pantalono kaj bona amiko perdiĝis eterne por mi. Damaĝe pro la pantalono. Ĝi havas apenaŭ ses jarojn.. Nu estas egale. Valoras ne la vesto, sed la honesto. Taŭgos por mi eĉ malpli bona.
Se iam vi estus vidintaj la pantalonon de Hopkins la Ŝtipulo, tiam nun vi estus levintaj vian ĉapelon antaŭ la homa senpretendeco.
- Sed… se vi prutedonus vian pantalonon – diris Hopkins –, mi akirus vestaĵon malpli ol duonhoro.
Mi ne entuziasmiĝis pro la ideo.
- Vidu… mi ŝatus, se restus ankaŭ mi amiko kaj ankaŭ mia pantalono…
- Ĉu vi do dubas pri mia honorvorto? – li respondis kun akra, malvarma ironio. – Ĉu vi faras tion ĝuste al tiu, kiun kiu vi pasigis du jarojn en la prizono Sin-Sing? Kun kiu vi dividis la amaran panon de la kaptiteco.
- Ŝtipulo, mia koro sangas, sed ni ne sidos nude anstataŭ vi en la tablotukon…
Piedtamburado aŭdiĝis sur la alir-ponteto. Nudpieda stratbubo alvenis kun letero.
- Frenezulo donis gin al mi – li diris. – Ĉiu rigardis lin sur la strato, ĉar li surhavis elefant-ledon ĝisgenue… multe da policistoj dispelis la popolon malantaŭ li…
Post la diritaj mi devenis, ke temas pri la Turka Sultano. En la pantalono de Ŝtipulo.
- Kion li mesaĝis?
- Li diris, ke mi iru kun li en vestovendejon, tie li interŝanĝis la pantalonon por ruĝa, mohametana, vastfalda pantalono.
Ŝtipulo eksteroris.

- Kiel?!
Jes. Li interŝanĝis tion. Li diris, ke li krompagos, sed kiam la vastfalda pantalono estis sur li, li promesis drastajn batojn al la vestokomercisto, kaj li ne donis monon… Poste li skribis jen tion kaj diris, ke mi kunportu ĝin, mi ricevos kvin frankojn kaj brandon…
Haste ni forigis la knabon per piedbatoj , poste ni ŝirmalfermis la leteron.
La Turka sultano skribis jen tion:

"Karaj knaboj!
Bedaŭrinde antaŭnevideble mi trompis vin iomete. Mi ja devis urĝe forlasi la ŝipon. Ĉar la posedantoj noke kunportis grandan keston en la bilĝon. Post kiam ili foriris, mi volis ŝteli ĝin, sed tiam mi rimarkis, ke en la kesto estas kadavro. Tio estas tre malbona antaŭsigno. Eskapu ankaŭ vi! Pro la polico. Elkore mi bedaŭras. Kun alta estimo al Vi:

la Turko."

Ĝene malagrabla situacio. Mortinto estas en la bilĝo.
- Kuregu – diris Ŝtipulo. – Se vi ne revenos post unu horo, tiam mi saltos en la akvon, kaj neniam plu mi povos naĝis sur la bordon, sen pantalono.
La ago de la Turka Sultano multrilate estis komprenebla, konsiderante lian senesperan situacion, tamen estis friponaĵo de li, lasis nin ĉi tie kun mortinto.
- Mi iras…
- Sur la avenuo Maršalo Joffre, tie sur kiu ajn kotŝirmilo vi jam povas atingi la ŝoseon, kondukantan al la tombejo. Trans ĝi estas la cisternoj.
- En ordo.
- Eble malantaŭ la poŝto vi povus ŝteli aŭton, tiel estus pli rapide.
Mi rifuzis tion kun indigniĝo:
- Ĉu hodiaŭ? Ĉu la nomtagon de Marta?!
- Nu jes. Vi ja estas frenezeta… Do egalas, nur rapidu!
Mi kuregis.

Dua ĉapitro

Hopkins la Ŝtipulo akiras pantalonon, kaj ĝi estas multe pli malbona, sinjoro profesoro Kvastiĉ donas unuan helpon, sed tio bezonas plur-horan preparigon. Dume la mortinto foriras.

1

Post mallonga tempo mi trovis la loĝejon de miaj amikoj inter la cisternoj, troviĝantaj malantaŭ la tombejo.
La praluantoj ĵus estis hejme. Alfonso la Neniu loĝis ĉi tie kun siaj du konstantaj komplicoj.
Nur tiom pri Alfonso la Neniulo, ke oni relegaciis lin el ĉiu ŝtato de la mondo por eternaj tempoj, kaj tiel jam delonge li povis restadi sur la tero nur en la plej granda sekreto. Precipo nokte. Laŭ Ŝtipulo li estis dano, intriganto el Gvatemalo ĵuris, ke li estas hispano, li mem konfesis fiere, ke li ne havas naskiĝteron, ĉar li venis en la mondon en indiĝena kanuo proksime al Kolombo, kaj ĉiu ĉirkaŭanta ŝtato rifuzis la enmatrikuligon de la infano, kion petis la gepatroj.
Oni baptis lin sur armena vaporŝipo, sed tiu ŝtato intertempe ĉesis. Laŭ policaj ekspertuloj oni devus sendi lin al alia planedo pere de ŝtatadministracio.
Li estis bela, iom virinece svelta knabo, kun eksterordinare elektema konduto, eleganta kaj tre inteligenta.
Sed malmulte da homoj uzis la tranĉilon tiel, kiel li, kaj antaŭ kelkaj jaroj pro lia hokbato la kaporalo de la financosoldatoj en Port-Suez dum jaroj levadis siajn ŝultrojn tiel, ke oni skribis disertaĵon pri li en iu medicina fakrevuo.
Alfonso la Neniu kaj liaj du konstantaj komplicoj meblis la cisternon hejmece. De antaŭ la enirejo de migra cirko, elspezinte malmulton, sed nedomaĝante penon, ili akiris la kurtenon, kaj tiel ili kovris la malvarman ŝtonplankon. Ili ĉiuj tri dormis sur la ĉasio de ŝarĝaŭto.
- Kio nova, Ŝinketo?
- Hopkins la Ŝtipulo tre atendas vin ĉiujn sur barĝo, vestita per tablotuko ĝisplande.
Mi rakontis al ili nian malgajan historion. Alfonso la Neniulo blasfemis mallaŭte. La du konstantaj komplicoj sakris laŭte. Al la Turka Sultano povos okazi malbono, se li renkontiĝos kun tiuj homoj.
- Donu al mi rapide vestaĵon – mi urĝis ilin.
- Kiel vi pensas tion? Ĉu eble vi konsideras nin filmaktoroj? Kiu havas el ni du vestaĵojn?
- Sed nek tio povas okazi, ke Hopkins maljuniĝu tie en la tablotuko!
- Ni tute ne volas tion. Ni petos vestaĵon de iu.
- Knaboj! – mi atentigis ilin. – Ni akiru vestaĵon honeste, hodiaŭ estas la nomtago de mia patrino.
- Bone! Ni ebliigos iun – diris iu konstanta komplico, sed la alia diris tion, ke ĝi kostos malplimulte, se ni batfaligos la koncernulon.
Ni do interkonsentis pri tio.
Bonŝance en la kabano de la pavimistoj ni povis akiri ole-makulitan, truan mantelon sen ĉiu perforto. Momente ĝi estos bona.
Ni rapidis al la barĝo. Jam estis malfrua vespero. Ĉirkaŭ la dekunua horo. En la trankvila nokto apenaŭ vagadis iu.
- Kiu ĝi estas? – demandis Alfonso, montrante sur la ŝipojn.
- Ĝi estas tiu en la mallumo… Malantaŭ la karbo-kargejo.
- Ĝardostaru ĉi tie – li ordonis kun siaj du konstantaj komplicoj. – Se okazos problemo, signalu. Vi, venu, montru la vojon!
Ni fajfis akre, kiam ni suriris ĝin. Silento…
Ĉu eble li ekdormis, pro sia malesperiĝo kaj en sia tablotuko?
Ni atingis tiun lokon, kie mi atendis kune kun Hopkins. Nur la tablotuko kuŝis tie, ĵetita sur la teron.
Verŝajne li foriris, ĉar li lasis sian solan veston ĉi tie. Kaj li ne estas tiu homo, kiu sen vestaĵo ekiras en la grandurbon.
- Prave, Hopkins atribuas gravan signifon al la ŝajno. Tamen ni iru en la bilĝon. Eble li trovis pli bonan kovrilon kaj ekdormis malsupre.
Post mallonga palpado ni trovis la malsuprenirejon de la ŝtuparo. Sala fiŝodoro estis senteble de interne. La lampo de Alfonso la Neniulo prilumis la putrajn ligno-ripojn de la barĝo-bilĝo.
La kofrego staras tie – mi diris. – Laŭdire mortinto estas en ĝi.
- Nu kaj?
- Neniu scias, ĉu ni trovos ion ĉe la mortinto?
- Eksludite, ke kio ajn li havu.
- Kial?
- Ĉar kiam vi foriris, Ŝtipulo tuj rapidis en la bilĝon por rigardi la mortinton. Se oni metis la kadavron tien en vestaĵo, tiam Hopkins foriris vestite.
- Tamen ĝi ne estas verŝajna – mi rimarkis.
- Kial?
- Ĉar se la murdita homo havintus vestaĵon, la Turka Sultano ne estus atendinta nin, vestita per tablotuko.
- Prave.
- Tamen ni rigardu lin.
Ni iris sanceliĝante malsupren. Alfonso ŝaltis sian poŝlampon. Mi elprenis mian handspikon, sed ĝi estis superflua preparigo. La fermoplato malfermiĝis facile, neniu najlis ĝin.
Alfonso prilumis la apertan lignokeston, poste li ekkriis kaj faligis la lampon.
Mi sentis tiel, ke mi freneziĝos…
Hopkins la Ŝtipulo kuŝis en la lignokesto!
Mortinte!

2

- Carramba!
Alfonso la Neniulo blasfemis. Li mildigis siajn fortajn ekscitiĝojn kun mallaŭta sakro, sed eraras tiu, kiu pensas, ke el ĝi oni povis konkludi pri lia deveno. Li malofte blasfemis dufoje en la sama lingvo. Ĉiu nacio de la mondo povintus konfesi, ke li apartenas al ili laŭ liaj sakroj. Sed tio estas nur ekzemplo. Ne okazis tia konkurado por li.
- Vi – li flustris. – Ŝinketo… Kiel… vi pensas?
Mi ne povis pensadi. Mi nur staris. Dio mia… Kompatinda… Ŝtipulo, la bonega, gaja amiko…
Alfonso denove lumis tien per la lampo. Iu deprenis la vestaĵon de sur la mortinto. Li estis kovrita de sango, sed lezo ne estis videbla sur li, nur kiam ni turnis lin, tiam evidentiĝis, ke pafo trafis lin je la nuko.
- Ni ekscios, kiu estis tiu – mi diris.
- Prave…
- Kaj ni repagos anstataŭ Hopkins la ŝuldon
- Eĉ… ni aldonos ankaŭ la leĝan interezojn…
Ni staris tie tre malgaje. Malmultas tia vera, gaja, bona amiko en tiu ĉi mondo, kiel Hopkins la Ŝtipulo estis.
- Nun… unue honeste, ni entombigos la kompatindulon laŭ la kutimoj de la maristoj.
- Silenton! – diris Alfonso kaj ekprenis mian brakon.
Io krakis, sed ne tiel, kiel rato saltas sur la lignotabulon.
- La lampon…
Alfonso lumis en la angulon, kaj…
Du saltoj… Obro kuregis sur la ŝtuparo.
Ek post lin!
Alfonso stumble falis, ĉar ni saltis samtempe. Plena mallumo. La ŝtupoj bruegas, sed antaŭ ol la fuĝanto atingus la klap-pordon de la ferdeko, mi kaptas maleolon, la refalanto kuntrenas min, ni ruliĝas kune, sed dume mi kaptas lian kolon, kaj atinginte la bilĝon, trafe-maltrafe li ricevas la unuan pugnobaton, ke lia kapo ekkrakas.
Mi estas pacema homo, sed miaj maldekstramanaj, rektaj batoj jam estis paroltemo inter konsiderindaj rabistoj kelkfoje…
- La lampon! – mi spiregis.
Ekbrilas la lumo.
Nia konsterniĝo estis multe pli granda, ol antaŭ kelkaj momentoj.
Kun sanganta, krevinta vizaĝhaŭto, duone sveninte, la Turka Sultano sidis sur la planko.
En ruĝa, vastfalda pantalono!

- Ĉu nun kompreneble vi mortigos min? – demandis la Turka Sultano.
- Tio certas – mi jesis, ĉar mi ŝatas erarigi neniun.
- Sed ankaŭ tio povas okazi – meditis Alfonso –, ke unue ni detranĉos ion kelkloke el vi. Orelojn, nazon kaj similajn, ĉar simpla morto nun apenaŭ signifus punon.
La Turko ekfumis cigaredon.
- Prave – li diris mallaŭte, kvankam li estis malpacema, interbatiĝema homo. – Ankaŭ mi agus same en via situacio.
- Atentu min, Turka Sultano – diris Neniulo. – Kiu senvestigas sian amikon, poste li revenas kaj mortigas lin, tiun mi opinias pli malestiminda, ol kanibalon.
Kaj li surkraĉis lin. Poste li piedbate forigis la cigaredon el lia mano.
- Eĉ tiel estas bone – diris la Sultano, kaj li ne fumis. Strange, ke la fortavoĉa Turko, kiu timis neniun, li toleris ĉion unuanime
- Antaŭ ol mortigi vin, nur tion respondu, kial vi mortigis Ŝtipulon?… Ĉu vi malamis lin?
- Vi tute ne kredos tion, se mi diros la veron.
- Diru!
- Mi ne mortigis lin.
Mi piedbatis lin, ke li falis surdorsen
- Vi, malkuraĝa, fia, embuskmurdisto!
Li pene leviĝis kaj daŭrigis.
- Tial mi ne diris. Mi sciis, ke vi tute ne kredos tion. Nek mi kredus ĝin. Sed se mi estus tiel malkuraĝa, tion vi ne spertis ĝis nun.
Tio estis vera.
Idiota situacio.
- Diru do la aferon tiel, kiel ĝi estas vera laŭ vi.
Kaj li diris:
- Mi kunportis vestaĵon por Ŝtipulo, ĉar dume mi pentis, ke tiel li restis ĉi tie. Mi ne trovis la kompatindulon sur la ferdeko. Mi pensis, li venis ĉi tien por rigardis la mortinton. Ankaŭ mi venis malsupren. Mi trovis lin en la lignokesto tiel, kiel vi. Mi jam ne havis tempon fuĝi. Vi jam venis. Tiel ĝi okazis.
- Kie estas la vestaĵo, kiun vi kunportis – demandis Alfonso la Neniulo.
La Sultano ekstaris, li iris en iun angulon kaj montris vestojn.
- Ĝi estas soldata uniformo! – kriis Neniulo, ĉar li vidis en la mallumo, kien ne atingis la lumo de la lampo.
- Jes. Sed mi ne trovis alian. Kial mi estus konportinta ĝin, se estus veninta por mortigi lin? – kaj li ekfumis.
Dio scias! Estas malfacile kredi pri li, ke li mortpafis Hopkins-on la Ŝtipulon. Embuskmurdistoj ne cigaredas tiel trankvile, minacate de morto, li ne povis esperi indulgon de Alfonso la Neniulo, kaj mi devas konfesi, ke malgraŭ mia pacemo, ĝis nun ankoraŭ ne multaj homoj transvivis mian justan indignon.
Tiu Alfonso la Neniulo iom malcertiĝis.
- Vi devus pruvi tion, kion vi asertas – respondis Alfonso post iom da hezito, kaj li starigis la lampon sur lignokeston –, ĉar mi timas, ke tamen ni mortigos vin.
La Sultano fingre puŝetis sian cigaredon, ke ties ardaĵo grandarke flugis malproksimen. Poste li eklevis siajn ŝultrojn:
- Mi kraĉas sur vin.
Li estis tia knabo. Hoknaza kaj grizhara. Eskterordinare longaj, maldikaj brakoj, kun granda, kurba nazo, kaj liaj fiŝ-okuloj rigardis la mondon kun malaestima impertinenteco. Mi devas rekoni, ke tia homo plaĉas al mi, kaj malfacile mi mortigos lin.
- Kial vi estas tiel tromemfida, he! – alkriis lin Alfonso la Neniulo.
- Alfonso… – mi diris – diablo forportu min, se la Turko mortpafis Ŝtipulon.
- Ankaŭ mi pensas tiel, ke li ne mortigis lin. Sed se ni eraras?
- Kion vi faris ĉi-malsupre, kiam ni venis? – mi demandis.
- Mi decidis venĝi Hopkins-on, kaj mi elspuris iun ĉi tie.
- Kiun vi elspuris?
- La murdiston.
- Ĉu vi scias, kiu estas la murdisto? – demandis Neniulo.
- Mi scias.
- Kiu?
- Mi neniel diros tion.
- Kaj se mi strangolos vin? – interesiĝis mia amiko.
- Tiam plie mi ne diros tion. Vi nur tial rajtas prirspondigi min, ĉar mi mortigis Ŝtipulon. Se mi ne faris tion, tiam vi havas nenion komunan al mi. Nur spiono povas esplori miajn sekretojn per konfesigo.
Li multe pravis pri tio.
- En ordo – mi diris. – Mi kredas vin.
- Ankaŭ mi – kapjesis Alfonso la Neniulo.
- Ĉu do mi ne estas kaptito ĉi tie? – demandis la Sultano
- Vi ne estas tio.
- Tiam – li turnis sin al Alfonso – kial vi ĵus piedbatis min je la kapo?
Kaj lia longa brako svingiĝis, kaj li trafis la vizaĝon de mia amiko tiel, ke ĉiu ĝisosta viro estus falinta duonmortinte. Sed Neniulo tuj respondis per hokbato.
Komenciĝis teura interbatado. Laŭ mi Alfonso la Neniulo estus facile venkinta, ĉar li, mi pensas, estis la plej elstara inter tiuj, kun kiuj mi renkontiĝis dum miaj ĉirkaŭmondaj vojaĝoj, sed li ne volis tute mortbati la Turkon. Ili falis surteren. Oftaj batoj de kvar duraj pugnoj pumbruis unu post la alia
Mi ne ĝenis ilin. Ĝi estas privata afero.
Afero de sinjoroj.
Mi rigardis mian iaman amikon. En la lignokesto. Kun fermitaj okuloj… Kompatinda Hopkins!… Kiel paca, trankvila estas lia vizaĝo…
Kio ĝi estis?!
Mi vidis klare, ke iu lia trajto ekkonvulsiis. Apud lia nazo.
Sankta Dio! Ni ja… nek rigardis lin, ĉu li vivas?
- Haltu! – i kriegis al la du interbatiĝantoj, kaj mi fervore piedbatadis flanken Neniulon, kiu frapadis la kapon de la Turko al la planko, preninte ĝin je la du oreloj.
- Knaboj. Mi vidis tiel, ke la vizaĝo de Ŝtipulo ekkonvulsiis. Ni rigardu lin… ĉar eblas, ke li vivas…
- Ĉu vi ne rigardis, ke lia koro batas? – demandis Alfonso la Neniulo la Turkon.
- Mi pensis tion… – li spiregis.
Ni kuregis al Hopkins, ni metis lin sur la plankon. Alfonso aŭskultis lian korbaton. Ni staris ekscitite.
- Nu?…
Mi aŭdas nenion… – Tamen li ne deprenis lian orelon. Post longa tempo li diris. – Eblas… Kelfoje mi pensas tiel, ke malforta korbato… Kaj li ne estas tute… malvarma.
Li elprenis platan ladbotelon el sia poŝo kaj verŝis kelkajn gutojn da rumo inter la dentojn de la senmova Hopkins. Mi frotis lian brustokeston.
Se li vivas, li povas danki nur al tio, ke lia vundo estas tre grava. Jes, kredu min. Ĝi estas tiel. Ĉefpolicisto rakontis en Singapuro, ke dum profunda sveno oni ne sangoperdas, ĉar la sango cirkulas tre malrapide, ĝi koaguliĝas ĉirkaŭ la vundo kaj fermas la aperturon.
Post kelkaj minutoj, kun grandaj intermitoj, ni sentis apenaŭ perceptebla jn korbatojn.
Doktoro estus bezonata – diris la Turko. – Ĝuste tre bona kuracisto.
Ni kuŝigis Hopkins-on sur kelkajn, malplenajn sakojn.
Poste ni kuregis por venigi kuraciston…
La du konstantaj komplicoj pacience gardostaris apud la barĝo.
- Vi povas foriri – diris Alfonso. – Nun jam triope ni aranĝos tion, kion devas.

Ni havis propran kuraciston en la haveno de Oran. Fedor Kvastiĉ, kiu iam servis sur la rusa krozŝipo “Kronstadt”. Post la revolucio li alvenis en Oran-on, li vivis mizere, fine la drinkaĵo kaj la kartludo helpis lin paŝis sur fatalan deklivon. Unu jaron li estis enkarcerigita pro ia krimafero.
Post la plenumo de sia puno, d-ro Kvastiĉ posteniĝis en la haveno, kiel kuracisto kaj morfinomaniulo. Tie ne vivas burokratoj. La diplomo neglekteblas, gravas la scio. Kaj Kvastiĉ scipovis tre multe! Unuavice silenti. Ni scias bone, ke la kuracista diskreteco estas la kondiĉo de la terapio. Kiu hodiaŭ elprenas revolver-kuglon el iu, tiu ne rilatigu la kuracadon kun la policaj raportoj, aperintaj sekvan tagon en la gazetoj, kaj se li jam konstatis la morton, li ne zorgu pri tio, kien oni metos la pacienton por eterna dormo.
Tion oni nomas kuracista diskreteco.
Kvastiĉ multe legis, multe drinkis, kaj rilate lian kromlaboron, li estis fortepianisto en la amuzejo al la *Kvar-korna Kato*. Ĉar li fortepianis tre bele.
La grandaj, lentugaj, blankaj manojn de la kolosa, dika homo, pufiĝintaj de la alkoholaĵo, kun admirinda impresiĝemo kuradis tien-reen sur la klavoj.
Ni rapidis. La amuzejo al la *Kvar-korna Kato* estis en proksima stratetaĉo.
- Kie estas la Turka Sultano? – demandis mia amiko subite.
La Turko malaperis de apud ni!
Hej!…
Nun jam certas, ke li havas buteron sur sia kapo: - kriis Neniulo.
- Tio ankoraŭ ne estas problemo. Neniu el ni povas iri somere sur la straton sen ĉapelo. Sed hodiaŭ jam la duan fojon okazas, ke li trompas nin…
- Fripono! Tial mi strangolos lin!
- Nun unuavice ni rapidu por venigi Kvastiĉ-on.
La profesoro ĵus fortepianis. Liaj okuloj brilis humide tra la fendo de liaj profunde sidantaj okulharoj.
Kiam li ekvidis nin veni rapide, li mallevis la fermoplaton de la fortepiano, prenis sian ĉapelon kaj diris al la gastoj:
- Oni vokas min al grava malsanulo… Pardonon.
Kaj li venis. Tia homo li estis.
- Ĉu tranĉilo? – demandis Kvastiĉ.
- Ne.
- Ĉu kuglo?
- En la nuko.
- Kapute.
Preskaŭ kurante ni rapidis sur la senhoma vojo.
- Kie estas via kuracista necesujo?
- Ĉe Orlov.
- Ni iros por ĝi.
- Ducent frankoj.
- Ni kunportos ĝin.
Orlov estis moknomo, kaj ĝi devenas el la tordo de la vorto ricelisto. Tiu homo pruntis ankaŭ hipoteke. Kaj la tuta kuracista necesujo de Kvastiĉ estis ĉe li.
Frapegante sur lia pordo, ni vekis Orlov-on. La kurbadorsa, blank-barba uzurist loĝis sola en malgranda, teretaĝa domo.
- Ni bezonas la instrumentujon de profesoro Kvastiĉ.
- Ducent frankoj.
- Ni ne havas.

- Mi bedaŭras.
- Komptindulo.
Li elprenis revolveron kaj direktis al ni.
- Vi estas fiulo, Orlov! – mi diris.
- Kion mi faru. Tial mi akceptas la instrumentujon de la kuracisto, kiel hipotekon, ĉar ĉiam troviĝas mortanto, pro kiu oni elaĉetas ĝin. Tio estas la negoco. Se iam mi transdonos ĝin senpage, tiam estos kapute al mia ducent frankoj.
- De kie ni prenu tiom da mono?
- Estas la dekdua horo. Dum duonhoro vi povos rompŝteli ien.
- Ĝis tiam Hopkins mortos.
- Kion fari… Ne paŝu pli proksimen, ĉar mi pafos!
- Venu! – diris Neniulo. – Kvastiĉ, atendu ĉi tie. Ni tuj venos.
Ni ekiris duope en la nokto. El iu doko longa moleo etendiĝis en la maron. Ĵus ŝipo glitis apud ĝin. Gracila, malgranda, sinjora jaĥto.
- Nu?
- Ni provu tion…
Ni ekiris laŭlonge sur la moleo. La pasaĝeroj de la jaĥto elŝipiĝis.
- Atentu!
Ni iris malantaŭ kelkajn palaĵegojn. Grandega, blankhara homo en uniformo de altranga oficiro venis kun juna viro. Du matrosoj sekvis ilin.
- La kapitano parolos – diris la alta, blankharulo kun ignorema nazvoĉo.
- Kaj se li ne venos? – demandis la ofociro. – Li jam devintus anonciĝi.
La voĉoj kaj la paŝoj silentiĝis… Fulmorapide ni ŝtelumis al la jaĥto.
Ni rapide atingis ĝin. Ĉu eble troviĝas ducent frankaĉoj sur tiel sinjora veturilo? Apenaŭ flagretis kelkaj lampoj sur la ŝipo…
- Vi el la alia flanko… – flustris Alfonso, kaj embuskante li kaptis la randon de la vel-jaĥto… Mi ŝteliris al la poŭpo. Mi havas mallonga, plumbobastonon, kovritan per ledo, mi ĉiam kunportas ĝin… Suprentirinte min sur la ferdekon, mi elprenis ĝin…
La poŭpo estis malluma. Singarde mi ĉirkaŭiris kajuton kaj kaŝe elrigardis. Mi vidis armitan gardiston. Matroson, tenantan en sia mano pafilon kun alfiksita bajoneto. Li staras ĉe la alia kajuto. Alfonso la Neniu atendeblas de tie. Alia matroso nun suprenvenis el la interno de la jaĥto, li kunportis kunvolvitan veltolon kaj zumkantis.
La armita gardisto ekmoviĝis maltrankvile, kvazaŭ li estus aŭdinta bruon.
Kvazaŭ ia grandega kato, la svelta figuro de Alfonso la Neniulo aperis apude, kaj li jam batis.
Li trafis la gardisto ĝuste je la mentono. Aŭdiĝis nur mallaŭta krako, kaj tiu oblikve falis. Alfonso kaptis lin, por ke la falo ne kaŭzu bruon…
La alia preskaŭ havis tempon nek por tio, ke li komprenu, kio okazis, kiam la fera bastono jam klakis sur lia kapo. Li sterniĝis apud la balustrado, eligante mallaŭtan krion.
Neniulo jam deprenis la armilon de sur la ŝultro de la knokaŭita gardisto.
- Ŝnurligu ilin… Dume mi rigardos, ĉu iu ankoraŭ troviĝas sube…
Li ŝteliris malsupren kun antaŭendirektita bajoneto…
Mi rapide ligis la du maristojn per la ŝnuro de la kunvolvita veltolo, kaj mi paŝis en la malluman kajuton.
Subita lumo de elektra lampo blindigis min por momento.
- Levu la manojn!
Hele blonda, bela junulino staris antaŭ mi kaj direktis pistolon al mi.

Vi povis rimarki el la ĝis nun skribitaj, ke mi estas homo kun iom konservativa pensmaniero, nepra estimanto de la tradicioj kaj moraj formalaĵoj. Kiel tiulo, rilate la virinojn mi neniam forgesis pri la kutimoj de la malnovmodaj ĝentiluloj. Cedante do al la aplomba, sed ne ofenda deziro, mi levis miajn manojn kaj klinis min profunde:
Mia nomo estas John Fowler, miaj estimantoj nomas min Ŝinketo.
- Kion vi serĉas ĉi tie?
- Mi ŝatus peti protekton de bonanima virino
- Kaj dume vi batfaligis la gardistojn!
- Mi sentis, ke per argumentoj mi ne multe povus atingi ĉe li. Nuntempe maloftas la komprenemaj homkunuloj.
Jen tiel mi diris.
La virino okulmezuris min kun hezitema rigardo. Mi vidis bone, ke miaj vortoj impresis ŝin profunde. Ĉar mi parolas bele. Mi ja menciis komence de mia verketo, ke iam mi volis fariĝi kantoro. Poste… nu, se ĝi ja sonas malmodeste, kredu min, ke mi estis imponaspekta knabo. Kompetentuloj konstatis pri mi en malnovaj personpriskriboj, ke mia okulfrapa karakterizaĵo estas la impona aspekto. Por definitive forigi ŝian maltrankvilon, mi ankoraŭ aldonis kun leĝera rideto, kun instiga, varma voĉo:
- Vi povas senti vin en sekureco, bela virino, eĉ se vi bezonus, mi defendus vin kontraŭ kiu ajn.
Jen tiel mi diris.
- Vane vi ŝajnigas idioton! Se vi malpli suprenigos viajn manojn, mi trapafos vin!
Jen tiel ŝi diris.
Kie estas la poetikemaj, malnovaj virinoj, kiuj estis nepraj estimantoj de la kavalireco, premsekigante velkinajn florojn en sian preĝolibron, kaj ili enamiĝis al tiaj enigmaj fremduloj, kiel mi?
- Respondu! Ĉu vi venis sola?
- Sola.
La mensogo estas malbela afero, sed virino, kiu prineas la poetikon, tiu ne povas atendi alion.
- Paŝu flanken… Venu ĉi tien sur mian lokon, je du paŝa distanco de mi. Unu movo kaj… - Vi mortpafos min. Mi notis bone tion. Sed mi tial venis ĉi tien, ĉar iu mia amiko kuŝas agoniante, grave malsana, kaj mi bezonus ducent frankojn por venigi kuraciston… Li estas sur barĝo…
La vrino ekŝrikis, io klakis.
Alfonso la Neniulo surprizis lin el dorsdirekto, kaptante ŝian pojnon, sed la pistolo jam falis surteren.
- Eĉ unu vorton ne, ĉar… – siblis mia amiko kaj kaptis la kolon de la virino.
Mi tuj flankenpuŝis lin.
- Mi ne toleras tian procedon rilate virinojn! Mi ŝatus, se vi notus bone ĝin!
Por momento kuntiriĝis liaj brilaj okuloj de rabobesto. Tiu homo timis neniun. Nek min. La virino staris apud ni spiregante kaj ne kuraĝis ekmoviĝi.
- Nu bone! – diris Neniulo kaj ridis. – Oni devas estimi la cerbomalsanon de sia amikoj. – Li paŝis antaŭ la virinon kaj klinis sin. – Permesu, ke mi prezentiĝu. Mi estas Alfonso la Neniulo, kaj mi petas vin altestime ne krii, ĉar mi mortigos vin.
La virino reveme rigardis de iu el ni al la alia.
- Mi vidas tiel – daŭrigis Neniulo –, ke vi konsideras nin idiotoj, kio certagrade pruvas vian bonan konon pri homoj.
Ridetante li eksidis antaŭ la virinon en brakseĝon kaj ekfumis cigaredon.
Mi jam menciis, ke tiutempe mi konis malmulte da pli imponaspektan homon, ol kia mi estis. Sed mi opinias, ke tiu Neniulo superis eĉ min. Li kovris sian kapon per bunta tuko, kiel la hispanoj kaj portis koloran, silkan ĉemizon. Li konstante ridetis, kaj tiam liaj neĝe blanka dentaro ekbrilis larĝe. Ĉiuj liaj movoj estis elastaj kaj mallaŭtaj, sentebliĝis el tiuj la ludo de la proporciaj muskoloj.
- Nu do… Mia amiko jam menciis – li komencis ĝentile, preskaŭ babilante. – Ni bezonus ducent frankojn… Ĝi estas ĉio.
- Ĉu poste vi forlasos min?
Ĉu *ni* forlasos *ŝin?*
- Kompreneble – mi respondis. – Se vi plenumos tiun respektopelan peton, ni foriros kun omaĝo…
- Strangaj… firguroj vi estas… – ŝi diris – vi ŝtelumas sur ŝipon, batfaligas la matrosojn…
- Kaj la kuiriston – aldonis Neniulo. – Fola kanbo, li saltis sur min el dorsdirekto… Mi pensas, ke li restos vivanta.
- Ĉu vi mortigis lin?!
- Mi ĵetis lin super mian kapon, kiam li ĵetis sin sur min, kaj li falegis. Sed li restos vivanta…
- Vi rompoŝtelas, vi volas rabi… kaj…
- Tamen ni estas sinjoroj – mi helpis al ŝi, ĉar vere ĝi estis la situacio.
- Nu bone… – Ŝi levis sian retikulon de sur la tablo. – Mi donos kvarcent frankojn al vi… mi ŝatus, se lasus la ceterajn ĉe mi…
- Nu sed! Mi certigas vin, ke ducent frankoj kontentigos nin. Ĝi sufiĉos zorgi pri nia malsana amiko.
- Kaj… Nun mi foriros…
- Permesu al ni akompani vin en la malluma parto de la haveno. Multe da suspektindaj feĉuloj vagadas nokte tie.
Ĝi vere estas tiel.
- Nu bone… Akompanu min, sed nur de malproksime… Kaj… mi dankas… ke vi tiel… kavalire…
- Nedankinde…
Ni akompanis la virinon je dudek paŝa distanco.
Ŝi subite enturniĝis ĉe iu stratangulo, kaj atingonte ŝin, la virino jam ne estis videbla. Ĉu eble ŝi forkuris, aŭ ŝi tiriĝis sub pordoenirejon?… Egalas. Estas plej urĝe kunporti la profesoron kaj liajn instrumentojn de Orlov.
- Ŝi estas ekstordinare bela virino – mi diris senintence.
- Kaj ni faris al ŝi grandan komplezon.
- Kial…
- Ĉar ni forigis la gardiston de antaŭ ŝia pordo. Tiu virino estis kaptito.
Vere. Mi ja ne estas stulta homo, sed nun Neniulo estis pli sagaca, ol mi.
Aŭroris, kiam ni atingis la kabanon de Orlov, sinjoro profesoro Kvastiĉ dormis profunde sur malnovega kanapo.
Orlov sidis antaŭ la kuracista necesujo en la mano kun revolvero.
- Ni akiris nur cent kvindek frankojn – diris Alfonso. – Ĉu tio estas problemo?
- Tute ne. La mankantan kvindek frankojn vi jam akiros ludante.
- Koliko kurbigu vin!
Li ĵetis la monon tien. Ni ricevis la aktujon. Surverŝinte la kuraciston per malvarma akvo, ni piedbatis lin iomete, ĝis li rekonsciiĝis, poste ni rapidis.
- Kien vi volas kuŝigi lin? – demandis Kvastiĉ.
- Kiel?
- Li devas kuŝi ie. En cisterno li ne povas resaniĝi, havante kapopafon.
- Kie vi loĝas?
- Ĉiutage de la kvara ĝis la sesa sur la fortepiano. Tie li havus lokon, sed vespere li ne povas kuŝi sur ĝi. Ni devas enhospitaligi lin.
- Ni akiros monon ankaŭ por tio. Unue ni rigardu, ĉu li ankoraŭ vivas?
- Nukopafo estas tre malbona afero. Multaj, gravaj nervocentroj estas ĉe la kola plekso. Facile povas difektiĝis la mjelencefalo: Medula oblongata, aŭ la diartro: Epistrofo. Tiam li mortis. Exitus lethalis.
Ni atingis la barĝon. Senhoma kaj silenta estis ĉio. La tablotuko kuŝis sur la ferdeko. Malsupren en la bilĝon. Antaŭe iras Alfonso. Li eklumigas la lampon ĉe la malsupro de la ŝtuparo.
Li ekkrias mallaŭte!
Atinginte lin, ni staras malantaŭ li. Malvarma paraliziĝo trakuras ĝis miaj kalkanoj.
La malfermita lignokesto, la sakoj, kaj malplena kruĉego staras tie.
Kaj la vundito estas nenie. Hopkins la Ŝtipulo malaperis!

- Kiel?
- La diablo ludas kun ni hodiaŭ nokte – diras Alfonso.
- Kio okazis? – demandas Kvastiĉ scivoleme.
- La flegato malaperis.
- Li ne povis foriri sur siaj propraj piedoj, ĉar tia vundiĝo kaŭzas perturbojn en la ekvilibro. Kozaka kapitano, kiun mi kuracis du jarojn pro kapopafo, li povis nur rondiri. Tial oni emeritigis lin.
Li sidiĝis sur la ŝtuparon kaj ekdormis sen ĉiu transiro.
La Turko… – murmuris Alfonso.
- Kion vi pensas?
- Tamen li mortpafis Hopkins-on. Li timis, ke tiu resaniĝos, kaj ĉio evidentiĝos, li do reŝtelumis kaj ĵetis lin en la akvon.
- Ĝi sonas verŝajne. Sed Dio scias… La Turka Sultano estas bona knabo…
- Vi estas idioto! Nek al niaspecaj homoj eblas fidi ĝisekstreme. Kial li fuĝis ankaŭ la duan fojon? Nu?
Estis malfecile doni tian respondon pri ĝi, kiu estus senkulpiganta la Turkon.
- Aŭskultu min, Ŝinketo, ne plu interesas min kiu ajn klarigo. La Turka Sultano estas mortinta homo por mi. De nun ĝi estas dirita fakto.
- Se mi renkontos lin, eĉ tiam estos bezonata nur tre konvinka pruvaĵo, ke li restu vivanta.
Ni premis la manon unu de la alia. Hopkins la Ŝtipulo ripozis pace en la ŝlimo de la maro. Lia morto ne restos sen venĝo.

Tria ĉapitro

Laboro finita - fuĝo merita.

1

Mi enloĝiĝis en la vakantiĝintan lokon de Hopkins la Ŝtipulo, en la cistern-loĝejon. Sekvis mizeraj tempoj. Mi ne ricevis laboron, kvankam mi estas matroso unuavice, kaj plej volonte mi laboris honeste sur iu barko de la kontrabandistoj.

Sed vane. Mia eterna malamiko, la burokratismo senigis min de la laborebleco. En la haveno de Oran tiutempe aperis tiaj ŝipoj, kiuj zorgis nur pri stultaj eksteraĵoj. Tiuj veturiloj estas sklavoj de abomenindaj formalaĵoj. Oni postulas ĉiuspecajn dokumentojn de la matroso. Tio ne sufiĉas, ke iu sola rigas la ĵibon kun la ĉefvelo dum ok minutoj, vene mi diraktas la ŝipon de Oran al Tokio kun fermitaj okuloj (ĉar mi scipovas fari tion!), tio interesas ilin, kiajn dokumentojn mi havas, kaj ĉu mi rolas en malnovega, granda libo, en la "nomenklaturo de la maristoj"?

Kompreneble mi rolas en la nomenklaturo de la maristoj, sed oni trastrekis mian nomon. Kaj kial? Ĉar forbrulis la havena administrejo en San-Francisko.

Ankaŭ vi ridas, ĉu ne, Mi estas matroso kaj ne fajroestingisto. Oni devintus kondamni la fajrobrigadon, kial ili malfruiĝis, aŭ la helpoficiston, kiu forkuris, sed kion oni volas de mi, kiu klarigis nur tion al la rabia, kverelema rodkapitano, ke la indiĝena ŝipservisto ne havas beriberon, lia kruro nur pufiĝis, ĉar li paŝis en najlon. Tial mi ne volis hisi flavan flagon, kaj navigi en kvarantenon. Eble ankaŭ vi komprenas tion.

Sed tiu groba ulaĉo kriegis ĝin, ke li venigos policon kaj enkarcerigos min. Mi petis lin trankvile, ke li ne kriegu, kiel bruto. Tiam li fariĝis provokema kaj postulis, ke mi atendu la policistojn en lia oficejo, kaj li instruos min. Mi diris tion eviteme, ke li fermu sian buŝon, ĉar vi amare pentos ĝin, poste mi volis foriri. Li kaptis mian brakon. Eĉ nun mi volis forpeleti lin kun pacemo de trankvila homo. Mi puŝ-peletis lin al la vitra pordo. Sed la petrol-lampom mi ĵetis al li nur tiam, kiam li elprenis sian revolveron. Mia homa sento diktis tiel, ke mi ĵetu la brulantan rodkapitanon en la pluvmezuran cisternon.

Per tio mi savis lian vivon. Ĉu vi pensas, ke li dankis tion al mi? Vi eraras. Li denuncis min, oni forstrekis mian nomon el la libro de la maristoj, kaj mi estis serĉata de la polico.

Kiu nuntempe atendas dankemon, tiu trompiĝas amare.

Eĉ unu ŝipo ne alvenis en Oran-on, kiu estus preferinta miajn kapablojn al la formalaĵoj. Sed troviĝas tiaj veturiloj. Dumsemajne ni apenaŭ ricevis laboron. Proksimume ni kargis dufoje, komisite doktoro Kvastiĉ. Ĉar la profesoro-scienculo okupiĝis ankaŭ pri la importo de la medikamentoj en la landon.

Kelkaj lignokestoj da kokaino kaj tiaĵo alvenis al la heveno de la fiŝistoj. Ili estis tiel mizeraj tempoj. Alfonso la Neniulo (kun siaj du konstantaj komplicoj) jam komercis kun diversaj pecoj de aŭtomobiloj. Ili fosis la karoserion kaj la ĉasion.

Ili havis multe da planoj, sed la sennubaj noktoj malhelpis ilin en la agado. Malbonŝanca volo de la sorto estis tio, ke ĝuste dum la nomtago de mia kara parenco aperu iom da nebulo super la vasta maro, kiel la mesaĝo de diboĉanta tempesto.

Iu konstanta komplico proponis serĉi alian laboron.

Mi apelaciis la nomtagon.

Ili diris nekonvenajn epitetojn.

Fine ili decidis ekspluati la malbonveteran nokton. Mi ne povis eltiri min el tio. Fine ja ni estis sampanuloj, aŭ senpanuloj, kaj nek la amikeco estas nenio.

Utiligante la noktan mallumon, ni ŝtelis barĝon da razosapon. Anticipe ni metis la gardiston sub kelkajn lanajn sakojn.

Ni atentis la ŝipon jam de tagoj. Pro subakva blokego ĝi surgrundiĝis kun ties barĝo. Oni lasis ĝin sub la kontrolo de gardisto, kelkajn kilometrojn de la haveno. Anticipe ni finmarĉandis kun Orlov, poste nia triopo vizitis la barĝon.

Poste Alfonso la neniulo akiris ŝarĝaŭton el la proksimo de la kazerno de la sudanaj piklancistoj kun du svenintaj mekanikistoj, kaj ni komencis la transkargadon.

Ĉio iris glate, sed ekveturinte kun la ŝarĝita aŭto, ni renkontis neatenditan, malhelpan cirkonstancon.

Kompanio da sudanaj piklancistoj proksimiĝis kurpaŝante.

Kial komenci konflikton kun ili? Ili estas barbara popolo… Ŝaĝulo cedas… Ĉu ne?

Alfonso la Neniulo ĝiris la aŭton kuraĝe flanken kaj kriegis malantaŭen.

- Deĵetu la kargon! Rapide!

Kaj li ekimpetis per la aŭto sur la vojo. Rapide ni deĵetis la pezajn lignokestojn kaj ankaŭ la du svenintajn mekanikistojn. Kuglo trafis iun nian konstantan komplicon, kaj li falis post elĵetitan lignokeston da sapo. La aŭto veturegis ĉiam pli rapide apud la palmoj.

- Estos problemo – diris la ankoraŭ vivanta komplico.

Reflektoro aperis malproksime. Ĝi estas la aŭto de la alarmpolico!

- Oni ne laboru dum la nomtago de sia karulino – mi rimarkis, kvazaŭ tirante el ĝi instruon. – Tio estas la kaŭzo de la problemo.
- Kaj ankaŭ tio, ke tiom multe da soldatoj sekvas nin – aldonis Alfonso la Neniulo.

Ni turniĝis dekstren de antaŭ la proksimiĝanta lumo.

- Mi bremsos ĉe la urborando, desaltu, kaj tri homoj kuru en tri direktojn!

La bremso alteniĝis ŝrikante. Mi saltis.

Sed ĉe la plej proksima vojkruciĝo…!

Malbonŝanca kazo… Policisto pöer motociklo kun kromĉaro sekvis min… Malgranda, fermita ligno-budo staras apud la trotuaro, mi saltas al ĝi, la bodo falas kaj kruce kuŝas en la stratetaĉo.

Pafo… Kuglo siblas…!

Sur ŝtona kamparo, ekster la urbo, mi kuregas stumblante. Maldekstre, ne malproksime de mi, aŭdiĝas pafoj. Tiuj persekutas ne min. Grandega, katosimila ombro kuregas, preskaŭ naĝante en la aero, kiel li depuŝas sin de la tero… Kelkfoje li falas – poste li kuras plu.

Alfonso la Neniulo.

Mi estas fama kuranto, sed tiu ventorapida elano, kiel ia risorto, li subite leviĝas de sur la tero kaj eksaltas, ĝi jam ne estas homa lerteco, ĝi jam superas ankaŭ min.

Ni kuras por savi nian vivon!

Ĉar oni pli volonte mortpafas la persekutatan vagabondon ĉi tie, ol kapti kaj agaĉi kun li.

Laŭ ili tia homo valoras nek unu akton.

Feliĉe mi sukcesas atingi la sablodunojn de la proksima dezerto. Ĝi estas bona tereno por fuĝantoj. Tre multe da elstaraĵoj. Mi evitadas tiujn dekstren-maldekstren, kaj malantaŭ mi fariĝas ĉiam pli silente, kiel malproksimiĝas la bruo de la persekutantoj.

Sed tion ne eblas fari longe. Oni facile kaptos min en la dezerto aŭrore.

Kaj tiam, ĉe la subita lunlumo, sur malgranda elstaraĵo aperis la fortikaĵo St. Tereza.

La legio!

Antaŭen! Mi ekimpetas. Mi ankoraŭ ne provis tion. Ĝi ne povas esti pli malbona, ol la ŝipo Tajfuno aŭ la kvaranteno, tute ne parolante pri la abomenindaj, ĉinaj malliberejoj…

La gardisto senvorte lasas liberan vojon al mi. Post kvin minutoj mi estas en maĉtabak-odoran kontoro. Serĝento kun longaj lipharoj razas sin nur en ĉemizo.

- Kion vi volas?

Mi spiregas.

- Reakiru vian spiron, porko. Poste prenu formularon pri membriĝo de sur la tablo kaj plenigu ĝin precize!
- Nur spiregu trankvile, mi plenigos ĝin!

Alfonso la Neniulo sidis en la angulo de la ĉambro kaj skribis.

2

La polico kompreneble serĉis oficiale la legion en la afero de la rabistoj.

Pridemandado.

Du rekrutoj, kiuj dum la kritika nokto, en la suspekta horo anonciĝis, staris rekte antaŭ la kapitano.

- Vi dungiĝis al la legio en malbona tempo – diris la kapitano.

Ni silentis.

- Tiun nokton okazis rabado.

Ni miregis.

- De kie vi venis por anonciĝi en la fortikaĵon Tereza?
- Ĉu mi? El drinkejo.
- Kaj ĉu vi?
- Mi volis dormi en la dezerto, sed intertempe mi pripensis min.
- Ĉu vi konas unu la alian?
- Mi neniam vidis tiun kamaradon, kiel civilulon.
- Ĉu ankaŭ vi asertas tion?
- Jes.
- Kion vi scias pri la rabado – turnis sin la oficiro al Alfonso la Neniulo.
- Rabado estas tia maniero de la akiro de la havaĵo, kiam unu aŭ kelkaj homoj provas akiri alies rajtan havaĵon perforte kaj uzurpas ĝin!

La kapitano subpremas rideton.

- Kion vi scias pri tiu barĝo? Oni rabis plurajn lignokestojn da razosapo.
- Mi tute ne aŭdis pri tio.
- Kaj ĉu vi?
- Mi ne razas min sola. Mi tute ne bezonas razosapon – mi respondis saĝe.
- Ĉu vi scias nenion pri la afero, vi pasigis la nokton malproksime unu de la alia, kaj vi anonciĝis ne kune, sed unu post la alia?

Oui, mon commandant.

- Subskribu la protokolon!

Ĝi okazis.

Mi esperas, ke vi fariĝos bonaj soldatoj. Vi povas foriri.

Ĝi okazis.

Tiel la afero estis finita. La pordegoj de la legio malfermiĝas facile, sed fermiĝas forte.

- La legianoj numero 27, 9, 45 kaj 8.
Ni elpaŝas. Antaŭ la serĝenton. Alfonso estas la legiano numero 9 kaj mi numero 45.
- Anonciĝu ĉe la palaco de la gubernio por gardostari. La plej malgranda friponaĵo estos sanciita per tri semajna karcerpuno. Ripozu! – kaj li lasis nin tie.
- Kio estas tiu gardostaro? – mi demandas la legianon numero 8, malnovan soldaton.
- Ĝi estas terura. Oni devas stari rekte dum tri horoj. Ekmoviĝi, paroli estas malpermesite. Du plotonoj ŝanĝas unu la alian post ĉiu tria horo.
Ni jam servis la sesen semajnon, ni do ne kalkuliĝis, kiel novuloj. Sed ni ankoraŭ ni ne staris, kiel honorgardistoj. Ŝajnis, ke ĝi ne apartenas al la eksterordinare popularaj amuziĝoj.
Alfonso la Neniulo decidis deklari sin malsana, sed la pli spertuloj deadmonis lin pri tio, kun tiu motivo, ke ĉiu izolita ĉelo estas humida kaj malbonodora.
Vi povas scii el ĉio ĉi, kio mi rakontis ĝis nun, ke mi estas pacema kaj senpretenda homo. Sed la lego signifis gravan elprovadon eĉ por mia animstato, saturita de saĝo.
La ĉefo Potrien, la serĝento atentis kun speciala zorgemo, ke ni ne pasigu eĉ unu agrablan minuton en la legio.
Precipe min li elektis por si. Sed estis tute hazarde, kio okazis, ĉar mi malestimas la venĝemon. Ĝi komenciĝis tie, kiam ni ekzercadis sur la kampo, apud la muro de la fortikaĵo. Li instruis al ni la paradan defiliron, kio estas eksterordinare grava por li. Kiam ni alviciĝis, li enkondukis la kunlaboron kun kelkaj afrablaj vortoj.
- Vi, friponoj – li komencis objektive. – Nun ni ekzercos la paradan defiliron. Notu bone, ke la legia parada defiliro estas la plej grava afero en la mondo. Frapu vian plandon sur la grundon tiel, ke tremu la muroj de la fortikaĵo. Friponoj.
Ĝi estis la unua informo, kiun li devis severe konsideri. Poste li transiris al la ekzercado kaj komandis.
Gaaa…u!
Tiu minaca hurlo, kiu koncizigis la komandvorton *"gardez vous"* en la gorĝo kun mortokriego de homo, kuglotrafita lian koron, ĝi jam plurfoje kaŭzis panikan, falsan senton inter la gardistoj de la bestĝardeno en Oran, kiuj pensis tion, ke la bengala tigro liberiĝis, kaj ĝi damaĝadas en la urbo.
Post bruo la vico staris tiel, kiel paliso
Sekvis mallonga ekmurmuro de suspektema leopardo, subite vekiĝinta el sia sonĝo:
- Á…os!…
La vortoturno, nomata *"á gauche"* estis komandvorto, transformita al mortdanĝera minaco.
Ni turniĝis maldekstren.
- E…rt… van… Mösssh!
La serĝento priskribus ĝin jene:
"En route... En avante marche!"
Ni marŝis.
- E graaap…rd!
Parada defiliro. Skribite: *"En grand parade."*
Li iras apud ni kaj rigardas. Lia ruĝa vizaĝo ruĝa, sur kiu estas du longaj, mallarĝaj, penikosimilaj lipharoj, kaj kiel trian penikon, li havas ankaŭ kaprobarbon, rigardas nin kun nepriskribebla, malestima ironio.
- Kio ĝi estas?… Ĉu vi nun prezentas la marŝon de la lamantaj pilgrimantoj, pene trenantaj sin hejmen el Lourdes sen lambastonoj?… – kaj li afable balancas sian kapon ridetante, li fariĝas patre gaja; la epoletoj tremas sur liaj larĝaj ŝultroj. Li skuas bastonon takte en siaj manoj, krucitaj malantaŭe, kaj iafoje li fleksas siajn genuojn du-trifoje laŭ la ritmo de la paŝoj, kvazaŭ li imitus rajdadon. Sur lia malgranda, ruĝa vizaĝo estas milo da faltoj, liaj cigarobrunaj dentoj elvidiĝas pro la gaja rido, kaj la pinto de la penikoj iom altenkrutas.
Kaj ni marŝas. Nia destren turnita kapo sidas rigide sur la kolo, la polvonubo, ŝvebanta en la varmego incitas niajn okulojn, la nazon, sed la kolo estas senmova, la altenlevita, late rigida gambo kun etendita plando falas sur la teron kaj pumbruas…
- Je mia vorto – li rimarkas kompate – oni trompis vin. Iu diris tion, ke la servo en la legio estas terapio por grasiĝi…
…Kolo rigida, gambo rigida, plando akre doloras, kaj post ĉiu surplandiĝo polvonubo leviĝas de sur la tero… Unu… du… unu… du…
- Ĉu tio estas la parad defiliro ĉe vi? Se la sinjoro kolonelo vidos ĝin, li diros tion al mi: mon chef Potrien… kien ŝtelumas tiu kompanio tiel senbrue?
Ĉe la serĝento ofte rolas la antaŭvidebla dialogo kun la kolonelo. La bonfida kolonelo en tiujn imagitaj paroladoj ĝenerale miskomprenas la ekzercadon de la kompanio. Kelkfoje la tuta esenco de la plotono estas iom malklara por li.
"Diru, kara Potrien – li demandos miregante, - kiuj estas tiuj altaĝaj lavistinoj en soldata uniformo?.."
Tiam nia bonfaranto, serĝento Potrien, antaŭvidas, ke li pledos nin.
ĵo "Tiuj estas novuloj, mon commendant, sed ili venis ĉi tien hazerde, ĉar ilia familia kuracisto persvadis ilin, ke la frenezulejo estas en la fortikaĵo St. Teresa…"
La kolonelo tiam (kiel Potrien antaŭvidas) longe pensadas, li rigardas la lace pasumantan plotonon kaj proponas sendi la kompatindulojn por flegi ĉevalojn aŭ gvidi blindulojn en la urbo.
Sed Potrien havas koron. Li promesas al ni, ke li ne konsentos tiun mokataĵon.
"Ni ne venigu tiun hontindaĵon sur ilin, mon commendant. Por iom da tempo mi ankoraŭ agaĉos kun ili, poste ili ne suferu plu: mi mortpafigos ilin."
La kolonelon kortuŝas la patra voĉo de la serĝento, defendanta siajn soldatojn, kaj li diros tion cedeme:
"Nu, kiel vi pensas, Potrien, nur ne multe da kugloj vi malŝparu por ili. Damaĝe por la plumbo."
La serĝento komprenas kaj akceptas la provizoran solvon: ŝnurligi ĉiujn sub la suno, kaj lasi ilin tie, ĝis ili mortos pro maldiligenteco. Ĝi estos malmultekosta kaj instrua.
Kiam li parolas pri tio, mi marŝas bruegante.
Dume: rigida kolo, rigida gambo, la suno bruligas, la polvo pikas, kaj la serĝento forgesas dum sia monologo, ke ni parade defiliras momentojn.
Sed venas en lian kapon alia dialogo, kiu okazos jam inter li kaj la franca respublikestro, kiam dum la militaj ludoj de la jubileaj festoj de la kolonio Mendoza la ruĝa hispano anstataŭ la celpunkto li trafas per unu pafo la numerplaton de la ŝpico de la kapitano de la fajrobrigado, promenanta en la haveno.
"Diru, Potrien – demandas la respublikestro. – Ĉu tiu kompanio jam havis trafon?"
Potrien staros antaŭ lin fiere:
"Oui, mon excellence! Tiu ruĝhara rekruto trafis dufoje el dek pafoj, ne tute el kvin paŝa distanco la oketaĝan domon de la nova doganejo."
"Brave! – diros la prezidento. – Oni tute ne kredus tion pri li…"
Kaj ĝi ne estas vera, ĉar Mendoza nek unu foje trafis la doganejon el kvin paŝa distanco, sed tion Potrien ne povas konfesi al la prezidento, ĉar oni tuj eksigus la legion.
Kaj li ridetas, ridas, ŝovas sian ĉapon sur la nukon, kaj…
Kaj sen ĉiu transiro kaptas lin grava nerva kolapso. Post minaca ŝriko, kun sangoruĝa vizaĝo li eksplodas per akresona plandokrio, kriante terurajn minacojn, malbenoj kaj ofendojn, skuante sian pugnon, li ĵetas sian bastonon sur la teron kaj surtretas ĝin, fine li mansignas perdinte sian spiron:
- Sufiĉe! Sufiĉe! Kanjloj… finu tiun… belet-dancon, vagadon, plandŝovadon… Nu, atendu… nur atendu… friponoj!…
Li senspiriĝas. Ankaŭ ni. La serĝento kaj la kompanio staras anhelante.
Nun aperas soldato sur la muro de la fortikaĵo, eksidinte rajdante, li etendas sian manon en la korton de la fortikaĵo kaj leve metas kelkajn vaporantajn gamelojn sur la muron.
- Haltu! – stridas Potrien. – Nur metu la supon sur la supron de la muro! Ankoraŭ ne estas la tempo de la tagmanĝo! La antaŭmanĝaĵo estas paradmarŝo…
Kaj ĝi komenciĝas… La kolo streĉiĝas, la kruroj estas rigidaj…
Nun Potrien estas tute alia homo. Li estas flugatakonta vulturo, hiuzo, ŝtelumanta al sia predo… lia kapo observas la krurojn en alto de la genuoj.
- Haaa. – li ekkrias terure kaj montras sur soldaton. – Spiono! Patrujperfidulo, spiono! Mi malkaŝis lin!… Li havas pseŭdovestaĵon! Li estas maljuna, araba virino! Ĝi tute certas! Ĉar viro ne paŝas tiel terure!… Frapu vian piedon surteren, kanajlo! Frapu ĝin tien, ĉar mi mortbatos vin… Unu… du! Unu… du!…
Li ĉirkaŭkuras kun klinita supra korpo, observante la genuojn el la alia flanko. Ni devas atenti por ne premi lin al la muro.
Iu svenis. Oni portas lin flanken.
La serĝento kapbalancas.
- Sacrebleu… Ankaŭ li estas soldato… Ek! Paradmarŝo!… Antaŭen…
Li kliniĝas kaj kuras.
Li rigardas la krurojn inter la muro kaj la marŝkolono.
Nu, mi sekvos nun.
- He! Vi kompatindulo, rajdpelita, reŭmatisma kamelo! Elpaŝu el la vico! Atendu nur! Atendu, vi, pigra trompulo, vi, kaŭĉukplanda idioto! – li diris al mi.
Poste lia voĉo fariĝis milda, sed sarkasma.
- Diru, senrangulo, ĉu vi scias, kion diros la divizia generalo al mi, kiam li ekvidos vin paradmarŝi?
- Mi scias.
Li konsterniĝas iomete. Poste li turnas sin al mi kun rideto de hieno, dresita al gajeco.
- Ĉu?… Nu, kion diros lia ekscelenco pri vi? Nur diru tion kuraĝe, bonvolu… Mi aŭskultas vin
Mi respondis respektoplene.
- Obeeme mi raportas mon sergeant, lia ekscelenco respondos jene: "Mi ne komprenas vin, Potrien, kial estas tiu sinjoridino ĉi tie?"
Eĉ post jaroj ni ĉiuj rememoris la krion, kion li aŭdigis.
- Kanajlo!…
Mi staris trankviel. Mi estas pacema homo, sed ne malkuraĝa. La voĉo subite profundiĝis al amikema ŝerc-petolo.
- Hm… tiel… nu bone! Vi do estas tre ŝercema knabo. Ĉu… En ordo… Mi rimarkis tion. De nun mi okupiĝos pri vi pli multe: unuavice paradmarŝo! Rimenzonon!
Ĉu li volas ekbati min? – mi pensis. – Tiuokaze mia servo daŭros mallonge, ĉar mi devos stari antaŭ la militan tribunalon.
Sed ne. Liginte la rimenzonon al mia kruro, li prenis ties finon, kaj ni marŝis… Li fleksis sin kurbdorsa, kaj kiam mi frapis mian kruron al la tero, li ektiris la rimenon ambaŭmane, ke mia plando batiĝis al la tero kun teura forto…
Diablaĵo okazis al tiu bajoneto… Ties pinto implikiĝis kun iu gamelo, metita sur la supron de la muro, kaj la varma supo falis sur la larĝan ŝultron de la serĝento, kiu fleksis sin kurbdorsa.
La bato estis nur dolora, sed li estis tia pro la supo, kiel akvumita zizelo.
- Plotonestro…
La kompanio staris pala kiel la muro. Ili estis klarvidaj pri tio, ke post la okazaĵoj mi devas puniĝi.
La plotonestro elpaŝis.
- Mi proponas pridemandi tiun rabmurdistan fripono kaj puni lin per kvintaga enkarcerigo.
Dankon. Se li proponas kvin tagojn, la kapitano almetos dek tagojn al tio, la majoro ok tagojn, kaj kiam la taglibro revenos al la suboficiro, tutcerte tridek tagoj estos en ĝi.
- Marŝu! Forportu vin tagmanĝi… Ramz!
Ĝi signifis *rompez*-on.
Jes, amikoj miaj. De kie vi scius, kiel terure estas en Afriko alkutimiĝi al la plej malfacila servo de la mondo, kaj havi la plej malaltan soldon de la mondo.
Juvel, dentoteknikisto el Tarascon, kiu poste fariĝis falsisto de oficialaj dokumentoj por fari buŝoperaciojn, li kalkuliĝis kulturhomo, kaj li diris tion, ke li eksciis de oficisto el la konsulejo, okaze de ties plumbigo, ke nur la soldo de la legianoj estas malplialta, ol tiu de la ĉinaj soldatoj. Sed se ni konsideras, ke la ĉina armeo praktikas ankaŭ tre vastan privatan agadon dum batalo, samtempe la legianon oni povas starigi antaŭ la militan tribunalon pro iu malaperinta kapro de subjugita, araba tribo, tiam ni devas rekoni, ke pli bona estas la situacio de la ĉina soldato.
Eĉ ne parolatnte pri la ekzercado de la kurpaŝo en varmo kvardek kvin celsiusgrada, tute ekipite. Patroli per vaporantaj, varmegaj tankoj en la dezerto, ĉiutage suferi pro okspecaj vakcinoj, havante kvin minutan ripozon en ĉiu tria horo, marŝi ĝis vespero… Pavimi la ŝoseon, kondukantan al Oran, haki padon tra Atlaso, purigi la araban karceron, kaj fari ĉion, al kio ni havas nenian rilaton: konstruis fervojlinion, talusi la riverbordon, krome lavi la tolaĵon, kaj zorgi per duhora laboro ĉiutage pri tio, ke la rimenaro, butonoj, ŝuoj, uniformo brilu pro la pureco. Kaj fine batali legende en Hindio, en Madagaskaro por Francio, sed se necese ankaŭ por Islando, ĉar sur la flago ne tio estas skribita, ke *"Por la patrujo kaj por la honor"*, sed nur tio: *"Por la honoro"*
Ni ne havas patrujon.
Rigardu la muzeon de la kazerno en Oran. Ni batalis en Krimeo, kaj fariĝis legendo el ni en Meksikio flanke de la imperiestro Maksimilinano. Ni estis ĉe la urboj Sadova, Sedan, Marne kaj ĉie. Kial?
Ankaŭ tio havas sian sekreton.
La blua zono distingas nin disde la francaj soldatoj. Nur ni havas tian.
Kaj dum ĉiu defilo, la legianoj preterpasas ĉiujn francajn trupojn
Tial. Tial ni estas fiaraj. Ŝercemaj, temeraraj, kaj ni facile disipas la monon, se ni akiris ĝin amare de ie.
"C'est la legion."
Sed la tridektaga enkarcerigo tamen estas terura.
Estas malpermesite iri en la kantinon, kaj ne licas forlasi la fortikaĵon, nur se mi gardostaras. En mano kun fusilo, rekte starante sur ŝtuparo dum duoble tri horoj.
Estas vespero. Ni iras malantaŭ la gardestro de la plotono, sur la mallonga, dezerta vojo al la urbo por gardostari.
- Ni povas ekfumi – diras la bonvola, rusa suboficiro.
Li nomiĝas Jaroslowskij. Li estas bona knabo. Li havas basan voĉon, similan al tiu de violonoĉelo. Li parolas malofte, kaj malmulte.
- Vi povas aranĝi la aferon kun li – diras Alfonso la Neniulo apud mi –, ke li kontribuu post nia deŝango, ke ni povu iri en la urbon por tiu horo. Ĝi utilos al vi. Vi jam estas tiel moroza, kiel tomboŝtono.
- Ĉu vi pensas… ke mi provu ĝin?
- Komprneble. La ruso estas bona knabo. Li tute ne taŭgas al legiano. Plie al misiisto.
Ĝi ne estas malbona ideo. Kiam ni atingas la gardejon, establitan apud la portalo de la palaco, oni ĝuste tiam ekbruligas la lampojn.
Ni demetas la fusilon. Oni alportas la vespermanĝon.
- Diru, sinjoro gardestro, kiam oni deŝanĝos nin?
- La dekunua.
Li ŝparis ankaŭ la prepoziciojn, kie li povis.
- Estas terure tiu enkarcerigo en la kazerno – mi diras – preskaŭ dudek tagojn mi ne forlasis la fortikaĵon, kaj ni havos unu horan ripozon…
Li rigardas sur min. Li havas grandajn, malgajajn, saĝajn, verdajn okulojn.
- Vi povas foriri.
- Dankon.

- Ĝustatempe!
- Mi promesas tion.
Se mi ne revenos, malbono povos okazi al li.
Leŭtenanto staras en la pordo:
- Gardes! Á, mon commandant.
- Etato: ses senranguloj, unu gardestro! – raportas la ruso.
- Mi transdonas la gardoservon.
- Oui, mon adjoutant.
- Du homoj iru al la portalo, unu homo al la flankŝtuparo, ĉe la strato Levoisier.
- Oui, mon adjoutant.
La leŭtenanto foriras.
- Aux armes!
Ni iras. Mi kaj Alfonso la Neniulo gardostaras ambaŭflanke de la plej supra ŝtupo, antaŭ la portalo. Tri horojn ni devas posteni tie, en la ĝene blindiga lumo de mil-vattaj lampoj, kvazaŭ ni estus el vakso…

Kvara ĉapitro

Aperas kadavro, relative en bona aspekto

1

Komenciĝas la amaso de la alvenantaj aŭtomobiloj. Tiuj alvenas unu post la alia antaŭ la gubernion. Altrangaj soldatoj, diplomatoj en verdaj, papago-similaj kostumoj, virinoj, preterglitantaj en parfumodoro. Brilego de juveloj, ruĝaj kaj violkoloraj trembriloj kun fabela scintilado reflektas la iluminon de la lumradioj kaj karbo-filamentaj lampoj…
En la sufoke varma aero ŝvebas gasnuboj de bremsantaj kaj ekfunkciigitaj aŭtoj.
La adjutanto staras ĉe la pordego. Li akceptas la gastojn. Liaj maleoloj kunfrapiĝas en ĉiu sekundo:
- Kapotano Biron… Bonvenon, sinjorino… Kapitano Biron, saluton… Kapitano Biron, bonvenon, ekscelenco.
- Ho… ho… kara Biron… kiel vi opinias pri la antaŭ nelonge okazinta afero… Ĝi estis bona, ĉu ne?
Alvenas sendito.
- Ordono al kapitano Corot. De la ĉefstabo.
- Portu ĝin… Kapitano Biron, bonvenon, makizo…
Poste okazis la surprizo, pro kio mi preskaŭ falis de sur la ŝtuparo.
Inter kelkaj ambasadoroj kaj markizinoj, brak-en-brako kun blankhara grafo, amikeme parolante, li venis supren sur la ŝtuparo…
Hopkins la Ŝtipulo!
Estis la miraklo de la soldata disciplinemo, ke mi ne faligis la fusilon, kiel mi gardostaris tie…
Hopkins la Ŝtipulo portis uniformon de kapitano, kun multe da ordenoj, tamen… estas sendube…
Li estas iomete pala kaj maldika. Sed tio estas ekster ĉia dubo, kiam li venas pli proksimen, brakopreninte la blankharan aristokraton. Li diras tion:
- Supren la kapon, sinjoro grafo, mi petas vin… Atentu min!… Estas nenia porblemo.
Haltas la radoj de la menso.
Nun li ekvidas nin. Eĉ liaj palpebroj ne ekvibras.
- Bela gardistaro… Du bravaj knaboj. Tiuj devus stari en la blua salono.
- Kial… ĉu vi pensas?… – demandas la grafo.
- Ĉar ĝi estas bela saloneto, kiu troviĝas ĉe la malantaŭa alo, kiu ajn povas supreniri sur la eta ŝtuparo… Mi kutimas restadi tie, kaj mi ĉiam sentas tiel, ke gardisto estus bezonata…
- Bonvolu de antaŭ la enirejo…
- Jes, jes… Do atentu min, sinjoro grafo…
Kaj li iras. Kun la grafo! Se mi komprenis bone, li volis signali al Alfonso kaj al mi, ke li atendos nin en la blua salono, ni povos atingi ĝin facile…
Sed kio ĝi estas?… Lastfoje ni ja kredis lin eĉ dufoje mortinta… Kio okazis? Kaj kiel li venis ĉi tien en kapitana uniformo?…
Kaŝe mi rigardis el mia okulangulo al Alfonso la Neniulo.
Li staris rigide.
Sekvis tri malfacilaj horoj. Ne pro la severa gardostaro, sed ĉar nia kapo preskaŭ krevis pro tiu sekreto!…
Jam delonge ĉio estas kvieta antaŭ la enirejo. La festo jam daŭras en ĝia plena kulmino, ne alvenas aliaj gastoj. Nur ni staras tie en rigida pozo.

2

Mi ne estas superstiĉa. Mia klera edukiteco frue forigis la spiritan miskredon, rilate la sorĉistojn kaj la fantomojn. Mi absolute ne estas superstiĉa, kvankam mi vidis iun nebulan nokton la Nigran Tomason, la senkapan kapitanon, sur ties ŝipo. Mi vidis lin per miaj propraj okuloj, li eĉ salutis min, ĝentile ekbalancinte sian nuran kolon, kaj malgraŭ tio mi ne estas superstiĉa.
Sed nun… Tiu vidaĵo… Hopkin, kiel kapitano, reviviĝinte el sia morto; ĝi timige memorigis min pri malnovaj kaj ridindaj fantom-historioj.
Mi nur povus ekmoviĝi por postiri lin en la bluan salonon… Sed la tempo pasas tiel malrapide…
Fine! Aŭdiĝas bruo de soldatŝuoj sur la pavimo… Venas la patrolo!
Deŝanĝo. Ni reirias en la gardistejon.
- Ĉu vi vidis? – mi flustras al Alfonso, kiam ni demetas la armilojn.
- Ĉu eble mi estas blidnulo! – li grumblas kaj ekfumas cigaredon nervoze. Alfonso la Neniulo kaj nervozeco! Grava afero devas okazi al tio!
Ni ne plu parolas pri tio. Se evidentiĝus ĉi tie, ke Alfonso kiaspeculo estas, oni pendumus lin. Ĝi estas milita afero… Venas la gardestro.
- Ĉu vi iros? – demandas Jaroslowskij kaj rigardas sur la horloĝon.
- Jes.
- Precize! – li diras averte, kaj li denove suprenrigardas sur la horloĝon.
- Estu trankvila, sinjoro gardestro. Precize mi estos ĉi tie.
Mi iras. Alfonso tute ne rigardas sur min. Kvanam li konjektas, ke mi nun provos serĉi la bluan salonon…
…Mi ŝtelumas en la densejo de la grandega parko de la gubernio. Pompaj rododendronoj, nekredeble densaj mimozheĝoj, tute spacialaj, malaltaj Jack-arboj kaj tridekmetraj palmoj, traplektitaj per sarmentoj, la parko estis vere artefarita ĝangalo. La pezan, humidan, narkotan bonodoron tiel abunde eligis el si la tepida tero, malsekiĝinta pro la vaporoj, ke ĝi preskaŭ ĉirkaŭvolvis la nukon de la nokta promenanto. La flankvojo kondukis al morte glata lago. Larĝaj, helverdaj folioj kuŝis sur ĝi, kaj viglakoloraj, grandaj florkalikoj.
Ĝi estis mistera nokto. Mi jam menciis, ke mi ne estas superstiĉa, kvankam tiun tagon, kiam mia onklo mortis en Southampton, de sur la muro de mia ĉelo falis morterpeco en Nov-Jorko.
Malgraŭ tio mi ne estas superstiĉa, mi nur kredas tion, ke ekzistas strangaj, sufokaj noktoj, kiam oni antaŭsentas, ke…
Io okazos…!
Mi ŝtelumis silente sur la flankstrato, ke mi elvenu el la densejo nur ĉe la transa flanko de la konstruaĵo.
Antaŭ la grandega krescendo de la luno flosis travideblaj, fumecaj nubostrioj rapide, kaj la blanak lumo ĵetiĝis per perpendiklaj radioj tra tiu stranga nubo-prismo, videblaj ankaŭ per nura okulo.
Tial mi priskribas ĉion ĉi tiel detale, por ke mi provu redoni ĉiun impreson de tiu mistere stranga nokto. Imagu la ĝangal-similan parkon kun nekredebla lunlumo, diverĝa je lumfaskoj, kaj subite post iu turniĝejo ekaperas fremdulo antaŭ mi!
La seceno estis tia, kiel grandega, kolora bildkarto. Oni pentras ĝin malreale. Gazona parto de parko, meze grandega, bruna, marmora baseno, apude, kvazaŭ ĝi estus statuo, konturiĝas senmova, dormanta fenikoptero, kaj antaŭe ĉe la vojo, apogiĝinte al la trunko de platano, staras fremdulo!
Kiel priskribi tiun fremdulon? Li estis pala. Super lia saĝa, alta frunto pendis neprizorgitaj, longaj haroj disen sur liajn tempiojn. Li portis strangan, strian, negladitan, tolan pantalonon, enormaajn ŝuojn kaj blankan, leĝere disigitan ĉemizon. Mi ne scias, kial, sed mi tuj sentis, ke tiu homo estas sinjoro. Ia problemo estas al li, eble li senmoraliĝis, aŭ li estas malsana, sed lia kapoteno, la morna, trankvila vizaĝo impresis tion.
Li rigardis la fenestrojn kun stranga, dolora, enpensiĝema mieno… Mi faris unu paŝon. La strangulo turnis sin al mi je mia unua ekmovo.
- Ĉu vi venis por mi? – li demandis silente.
- Ne – mi respondis trankvile. – Kion vi faras ĉi tie?
- Mi ne scias.
- Kiu vi estas?
- Kial vi demandas tion?
- Mi postenas garde!
Li okulmezuris min, kun krucitaj brakoj.
- Kie estas via armilo?
- Oni nun deŝanĝis min.
- Kiel vi kuraĝis forlasi la gardistejon sen permeso?!
Ĉu? Ŝajnas, ke mi havas la devon informi lin.
- Tio ne koncernas vin. Diru, kiel vi venis ĉi tien?
- Mi grimpis tra la ŝtonmuro el la direkto de la ekzerctereno.
- Kial?
- Mi ne scias.
Lia rigida, trankvila vizaĝo kun senviva malvarmo turniĝis al mi. Li krucis siajn brakojn. Malgraŭ liaj kelkaj blankaj bukoj li ne estis aĝa. Eble li havis malpli ol kvardek jarojn. Sed malvarmo trakuris mian dorso, kiel li staris tie.
- Nu? Ĉu vi deziras ion?..
- Mi volas scii, kiu vi estas…
- Mi ne diros tion.
Ŝajnas, ke tiu homo pensas, ke li povas timigi min. Mi paŝis antaŭ lin.
- Ne ŝercu, ĉar vi povas amare penti ĝin. Se pro ia kaŭzo vi ne deziras iri al la policejo, forportu vin de ĉi tie! Ĉu vi komprenas? Ĉar mi ne estas malbona knabo, sed mi ne ŝatas la ŝercon!
- Mi ne zorgas pri tio, kion vi ŝatas – li respondis malgaje.
Mi staris senpere antaŭ lin kaj kaptis lian brakon. Aŭ, mi estus kaptinta ĝin…
Sed subite ĉio mallumiĝis antaŭ mi. Kvankam li nur kaptis mian gorĝon kaj ekpremis mian brakon. Sed lia mano estis nekredeble forta.
Nu, vi jam povis vidi ankaŭ ĝis nun, ke malgraŭ mia pacemo, se kverelemaj homoj devigis min, mi pruviĝis tia junulo, kiu ne troviĝas po dekduoj. La kuracisto de la bagnanoj en Sumbava skribis disertaĵon en fakgazeto pri miaj torako kaj muskoloj, sed en la manoj de la nekonata, nokta gapulo, mi rekonas tion, mi havis tiaspecan senton, kvazaŭ mi estus peco da fandiĝanta butero, kiun li povus ŝmiri sur la muron facile.
Li lozigis siajn manojn trankvile, malrapide.
Mi ekspiris profunde, kiel la perlofiŝisto elmergiĝinta.
- Nun, se tio plaĉas, vi povas aresti min – li diris –, mi ne defendos min. Vi povas fari tion.
- Mi ne estas kaptisto. Ĉu eble vi faris ion, pro kio vi kalkulas tiaĵon?
- Morgaŭ antaŭtagmeze oni mortkondamnos min.
- Kial?
- Pro patrujperfido kaj pro mortigo de dudek du homoj.
Vi povis rimarki, ke mi ne havis tro rigidan moralan starpunkton, rilate la krimulojn. Sed ĝi estis iom tro…
- Ĉu vi ŝercas?
- Ne. Morgaŭ antaŭtagmeze oni deklaros mian mortkondamnom, kaj post unu tago oni ekzekutos min. Mi ne havas ŝancon por indulgo…
- Tamen oni ne ekzekutos vin, se vi nun estas ĉi tie!
- Oni tamen ekzekutos min, ĉar mi reiros. Mi ni fuĝis, oni nur forlasis min por kelkaj horoj.
Li estas frenezulo! Li volas mensogi al mi! Pri malliberejo!
- Vidu, vi povas esperi helpon de mi. Kial vi rakontas tiaĵojn?
- Atentu kion vi parolas! Mi ne kutimas mensogi! Iu permesis forlasi la prizonon por kelkaj horoj, ke mi estus libera homo dum mallonga tempo, antaŭ ol mi mortos.
- Ĉu… vi reiros?
- Kompreneble.
- Kiu vi estas?…

- Kapitano Laméter.
- Disinjoro!
La tuta mondo ekkonis la nomon de kapitano Laméter en tiuj ĉi semajnoj. Kiel ĝi do sonis antaŭ mi, kiu restadis en Oran, sen laboro, pro la malbenita burokratio.
- Ĉu… vi reiros, ĉar… vi donis vian vorton? – mi demandis lin nekredeme.
- Tiu homo, kiu permesis al mi foriri, estas mia iama artileria serĝento, li soldatservis ĉe mi dum la milito. Nun li estas ĉefprovoso.
- Kaj vi… sinjoro Laméter, volas morti.
Li ĝemis.
- Mi devus vivi, amiko mia… Sed tiam artileria serĝento Barres ricevus gravan punon. Ĉu vi havas cigaredon?
- Jen bonvolu preni. Sciu… komperare kun tio, ke vi estas perfidulo kaj murdinto de multaj homoj, via koro ne estas el ŝtono.
Diablo vidis tiaĵon. Estis ion en tiu kapitano, pro kio mi devis obei. Kvazaŭ li estus portinta sian falintan or-koluman animon sur sia nekovrita kolo…
Li profunde nespiris la fumon de la cigaredo. Poste li okulmezuris min, kvazaŭ li pesadus, kion li povas atendi de mi.
- Vi aspektas bona homo…
- Mi pensas, ke mi estas tia.
- Mi ne havas multe da espero, mi povas pasigi nur kelkajn horojn libere… Sed mi kredas, se mi povus paroli kun iu, kiu nun estas en la domo…
Li ĉesis paroli, li pensadis.
- Aŭskultu min – mi diris. – Mi ne konas vian aferon detale… Neniu scias, kie estas la vero? Tio certas, ke vi plaĉas al mi… Do, se mi povas fari ion…
- Vi povas fari. Se mi sukcesos eniri en la palacon, eble mi povos helpi min, almenaŭ mi mortos trankvile. Mi devas paroli kun iu.
- Mi ne rajtas enlasi vin.
- Sed se vi transdonos vian vestaĵon, tiam mi povos eniri.
- Kial?
- Mi diros al la gardisto ĉe la malantaŭa pordo, ke mi portis ordonon al iu oficiro.
- Sed post nelonge oni deŝanĝos la gardistojn…
- Ĝis tiam mi denove estos ĉi tie. Sed se vi timas, ke okazos io malbona al vi, do ne faru tion.
Timi!
Mi tuj demetis mian rimenzonon kaj komencis malbutonumi.
Kontenta rideto trakuris sur la pala, rigida vizaĝo.
- Vi plaĉas al mi, amiko mia – li rimarkis.
… Dume la fenikoptero malaperis, kaj ankaŭ la luno forglitis de sur la senarberjo. Ni interŝanĝis vestaĵon.
Kiel li staris antaŭ mi en la uniformo, mi devis konstati, ke li estas la plej plaĉaspekta soldato, kiun mi vidis iam. (Enkalkulinte ankaŭ min!)
- Se pro netatnditaj cirkonstancoj mi ne revenus ĝustatempe kun via vestaĵo, diru tion, ke mi malvestis vin perforte. Via konfeso ne nocos al mi, morgaŭ oni mortpfos min ĉiel.
Li diris ĝin tiel, kvazaŭ li informun min, ke li ĉiumaniere devos razi sin.
- Ĉu… ne estas espero al tio, ke hodiaŭ nokte vi parolus kun iu… kun sav-atestanto?
- Ne estas. Mi diras sincere, ne tial mi surprenis vian vestaĵon.
Adiaŭante li ekpremis mian manon dure.
- Diru vian nomon, por scii, kiu estis tiu bonega kamarado, kiun mi ricevis de la sorto, kiel lastan donacon.
- John… Fowler… la Ŝinketo.
Diablo vidis ankoraŭ tiaĵon. Io skrapas mian goĝon…
- John Fowler! Mi dankas vin!
- Sinjoro kapitano!… ĉu neeblas… ke la tribunalo tamen… juĝu alie… morgaŭ?…
- Ne. Morgaŭ ili jam havis pli multe da kaŭzo por ekzekutigi min. Ĉar hodiaŭ nokte mo mortigos iun.
- Ĉu vi… mortigos iun?
- Jes. Trompantan kapitanon, kiu estas dika kaj mistifikas pri kapopafo…
- Kiel?…!…!
Li forglitis inter la arboj.
- He, sinjoro kapitano! Haltu!… Bonvolu aŭskulti min…
Mi vidis lin jam nenie… Du-trifoje ekgrincis liaj paŝoj de malproksime, poste, kvazaŭ la densejo estus absorbinta lin, li malaperis inter la ombroj, kaj fariĝis profunda silento…

3

Hu… Ĝi nun estas granda idiotaĵo. Li iros kaj mortigos Hopkinson la Ŝtipulon. Ĉar li mortigos tiun, se li diris ĝin. Li ne estas tiulo. Sendube, ke li parolis pri Ŝtipulo.
Ion li devas fari. Mi ne lasas moritigi Ŝtipulon. Mi havas iom da avantaĝo, ĉar mi scias, ke Hopkins restadas en la blua salono, sed la kapitano devas serĉi lin.
Sed tiu, kiel sendito facile povas eniri en la domon. Sed mi, tiel, iom malfacile.
Mi rapide ĉirkaŭiris la konstruaĵon. Ĉe la malantaŭa pordo mi ekvidis Juvel-on, la fokteknikiston.
Atendu nur. Tion mi devas provi. Mi kriis al li el inter la nigraj arboj.
- Juvel!
Li rekonis mian voĉon!
- Kion vi volas?…
- Ordono alvenis al la gardistejo: ĉiu postenanto iru al la ŝtonmuro en ĉiu kvara minuto! Oni vidis suspektindulon en la ĝardeno.
- Bone… – li murmuris per tiu voĉo, kiel oni devas akcepti vanajn, ŝajne gravajn aferojn.
Mi retiriĝis… Post kvar minutoj Juvel laŭregule turniĝis duone kaj ekiris de sur sia loko… Kiam li atingis la serpentuman vojon, kondukantan al la muro, mi ŝteliĝis tra la malgranda pordo.
Mi ŝtelumis supren sur helika ŝtuparo. Mi atingis la koridoron de la servistoj. Mi ekvidis trairejon ĉe la turniĝejo, kiu kondukis al duone mallumigita galerio, kies plankon kovris ruĝa tapiŝo… Sendube, ke la privata apartamento de la gubernatoro troviĝas tie.
Nur ĝustatempe mi alvenu inter la gastojn… Singarde, apud la muro mi ŝteliris antaŭen… Lakeo aperas sur la ŝtuparo. Semtempe malfermiĝas pordo de ĉambro dekstre, kaj eleganta sinjoro elpaŝas en neĝe blanak smokingo. Rozkolora, larĝa rubando de ordeno videbliĝas sur lia blindiga ĉemizo. En lia butontruo estas la honormedalo…
Diablo vidis tiaĵon. Li ja estas…!
Alfonso la Neniulo!
- He… amiko mia – li krias al la servisto. – Mi vojeraris en tiu ĉi perfekta kastelo.
- Bonvolu iri dekstren… ĉiam dekstren – diras la lakeo kaj foriras.
Post kvar rapidaj saltoj mi estas malantaŭ li.
- Alfonso!
Li turniĝis, kiel turbo. Poste li metas sian monoklan antaŭ sian okulon kaj diras kun iom da malestimo.
- Estas strange, kiel vi imagas aperi dum eleganta, sinjora vesperfesto.
Li estas tiu. Ĉu vi rekonas lin? Turniĝo, preta al mortosalto. Poste malvarmsango kaj ironio.
- Atentu min… Imagu, se mi envenis tiel, temas pri grave afero.

- Atentu min… Imagu, se mi envenis tie, temas pri grava afero…
- Almenaŭ surprenu kravaton. Jen bonvolu, tie vi trovos ĉion…
- Temas pri la vivo de Hopkins…
- Hm… ĉu efektive li havas tion?
Ĝi vere estis malklara afero.
- Vidu: ĉu li vivas aŭ ne, ĝi egalas. Tio certas, ke hodiaŭ iu volas mortigi lin.
Rapide mi rakontis ĉion. Dum kelkaj sekundoj li turnadis la monoklon nervoze.
- Mi komprenas… Nun atentu min. Mi antaŭeniros. En tiu ĉi ĉambro estas ĉiuspecaj vestoj. Suprenu ion, por ke vi povu veni post min. Mi atendas vin en la blua salono.
- Kie ĝi troviĝas?
- Mi ne scias.
- Mi estos tie.
En la menciita ĉambro estis mallumo, sed la lumo de kelkaj arklampoj de apud la vojo penetris tra la kurteno de la fenestro.
Mi tuj rapidis al la ŝranko. Bedaŭrinde nur soldata uniformo estis en ĝi. Kun epoletoj de generalkolonelo!
Ne! Oni mortpafos min pro tio. Kaj kial sidu Alfonso la Neniulo sola en la karcero ĝismorte? Ĉar oni punos nin per tiom da jaroj, eĉ se ni havus civilan vestaĵon, se ni estos kaptitaj.
- Trovite! En la angulo estas brila, minca, kaŭĉuka mantelo, kian la oficiroj portas super la uniformo. Kaj longaj rajd-botoj, en mia mano ĉapo… Tie estas aktujo… Ek…
Laŭeble rapide kaj kun ŝtorm-taŭzita, moroza vizaĝo antaŭen! Ne halti eĉ por momento.
Mi jam sciis la direkton. Dekstren, ĉiam dekstren!
Mallaŭta muziki plifortiĝas, kiel mi porksimiĝas sur la longa, ruĝa tapiŝo al brila, grandega vitropordo… Mia mano estas sur la klinko.
Nu, kio okazis, Ŝinketo? Ĉu eble vi timas?
Antaŭen!
Grandega salono, blindige scintilanta lustro el vitro, marmor-kolonoj kaj delikata parfumodoro en la aero…
Mi iras plu kun rapidaj, duraj paŝoj… Milda, rozkolora lumo, violkoloraj kaj verdaj sofoj: ĉambro por mumantoj… Ek plu.
- Bonvolu halti, mi petas vin!
Mi devas halti. Alta, saĝa generalo kun gaja vizaĝo, kiu havas grandegajn ordenojn kaj…
Mi konsterniĝis iomete.
La gubernatoro! Kaj apud li staras barba, magralonga divizia generalo… Kie mi didis lin jam?
Mi stars en streĉa pozo! Tiu divizia generalo estis la barba pasaĝero! Kiu descendis de la jaĥto! Poste Alfonso kaj mi trovis tie virinan kaptiton! Ĉio ĉi okazas dum momento, la divizia generalo jam tuj paŝas al mi afable ridetante…
- Bonvenon! Mi estas divizia generalo Rouban.
La ĉefkomandanto!… Haltas mia spiro.
- Sezbrzin – mi murmuras ion rapide.
- De kie? – li demandas ridetante.
Mi kunfrapas miajn maleolojn.
- Divizio Doumont…
- Mi aŭdis tiun esprimon en la kontoro de la kompanio.
- Ĉu vi serĉas markizon de Surenne?
- Jes, ekscelenco!
- Iru tien, li etas en la kupola salonego.
Mi kunfrapis miajn maleolojn… Mi saviĝis. Sed nun mi povas iri nenien, ol la diritan direkton… Do divizia generalo Rouban tenis kaptita tiun belan virinon…
Silenta koridoro sekvas post la kupola salonego, turbana, mongol-vizaĝa frakulo paroladas kun du damoj. Iu virino rigardas sur min.
Kio okazas hodiaŭ?! Tiu virino estis kaptita sur la jaĥto!
La virino, de kiu ni akiris ducent frankojn tel rezolute, kiam Alfonso la Neniulo kaj mi insistis la kuracadon de Hopkins.
Unu momenton pli frue divizia generalo Rouban, kiu tenis ŝin en kaptiteco, kaj nun ŝi, kiu rifuĝis en la nokto
Rekte ŝi venas al mi. Iom pli forte ŝi ekpremas mian manon… Kvazaŭ ŝi donus signalon.
- Kiun vi serĉas?
- Kapitanon.
- Ĉu kiu havas kapopafon?
- Jes…
- Iru en la bluan salonon. Tien…
Kaj ŝi montras la direkton.
- Iru trankvile. Ankaŭ mi servos vin tiuj.
Mi ne komprenas. Tiam estas bone, se oni kunfrapas siajn maleolojn. La virino ridetis.
- Via amiko, kiu pro eraro en blanka smokingo venis partopreni la veperfeston de la gubernio, atendas vin!
Tiu povas esti nur Alfonso…
Mi kunfrapis miajn maleolojn. Mi iris rekte en la bluan salonon.
Sen frapeto mi malfermis ties pordon.
Alfonso la Neniulo staris apogiĝinte la libroŝranko. Vid-al-vide al li sidis Hopkins la Ŝtipulo komforte en la plej granda fotelo, fumante la plej grandan cigaron, antaŭ li staris botelo da delikata konjako Napoleono kaj ŝlifita vitroglaso, plenumanta vanan taskon, ĉar Ŝtipulo de tempo al tempo trinkis el la botelo per longaj tiroj.
- Saluton, Ŝinketo – diris la kapitano leĝere.
- Ŝtipulo, kiel dieble…
- Atendu – rompis Alfonso mian voĉon. – Post dudek minutoj ni devas gardostari sur nia posteno. Mi ne havas tempon fabeli. Kion Ŝtipulo scias per si mem, ĝi estas sufiĉe malmulte, tion mi rakontos al vi. Nun ni priparolos dum dekkvar-dudek minutoj nur la plej necesajn mallonge kaj rapide.
- Estas plej necese, ke ni havu bonan humoron. Supren la kapon, kanboj… – diris Hopkins per sia sterotra, raŭka voĉo kaj eltrinkis la restintan, duon-botelon da konjako Napoleono…
- Kie estas la kapitano? – mi demandis.
- Li ankoraŭ ne venis – respondis Alfonso kaj elprenis “tigro-ringon” el sia poŝo.
Ĉu vi konas tiun ĉarman instrumenton? Ĝi estas ŝtala ringo, kiun oni devas tiri sur la manon. Kunpreminte ĝin, kvin dornosimilaj, delikataj klingoj eliĝas el ties interno, simile al la kurbaj ungegoj de tigro. Se oni ekbatas iun per ĝi, tio kaŭzas gravan korpan lezon, ĝenerale resaniĝanta trans la eterneco.
Kara estis la knabo, kiel li staris tie, kun la tigro-ringo, tirita sur sian manon. Sur lia nigra, densa hararo brilis la lumo de la lampo, Alfonso tre zorgeme kombis sin. Liaj hararo kaj dentoj brilis konkurse unu kun la alia.
- Mi ne ŝatus, se okazus io malbona al tiu kapitano – mi diris. – Li estas simpatia knabo.
- Sed ankaŭ mi estas tute kara – rimarkis Hopkins. – Kaj mi ne volas, ke li mortigu min. Se la ulo intencus fari tiaĵon al mi, mi rompos lian kapon. Ankaŭ sen la helpo de Alfonso.
- Tiu kapitano estas el fero. Vi ne povos venki lin, Hopkins. Nek vi havas multe da ŝanco, Alfonso la Neniulo. Sed mi opinias, ke ia eraro estas en la afero.
- Ne estas – respondis Hopkins. – Ankaŭ mi mortigus lin, se la afero estus inverse. Oni priaŭskultis min en la afero, kiel sav-atestanton, kaj kompreneble mi memoris nenion. Mi diris, ke mi havas kapopafon. Neniam mi sciis, ke tiaĵo konvenos al mi, eventuale. Mi bedaŭras, ke mi nocis al li tiel. Sed se mi estus dirinta la veron, ke mi ne estas kapitano, mi ne scias, kiel mi venis en la militan hospitalon, kaj mia malhonesta nomo estas Hopkins la Ŝtipulo, tiam mi devintus sidi en karcero longe. Kaj mi ne ŝatas la inferan komforton.
La knabino envenis sen frapeto. Kiu estis kaptito sur la jaĥto.
- Ĉu li estis ĉi tie?… – ŝi demandis rapide de Alfonso.
- Ankoraŭ ne.
- Sed jes.
La kapitano staris antaŭ ni. Li elpaŝis el malantaŭ la kurteno de la pordo de la balkono, en mia vestaĵo.
Sur la poŝo de Alfonso estis videbla, kiel lia pugno streĉiĝas per unu premo. La tigro-rigno estis preta por bati. Hopkis ekprenis la kolon de la botelo, sed senkonsidere de tio li sidis trankvile kaj maĉis sian cigaron. Mi faris unu paŝon.
La kapitano okulmezuris nian trion. Ŝajnis sur lia vizaĝo, ke li pensas pri ni kun iom da rekono.
- Viktoro… – flustris la knabino kaj iris al li. La kapitano rigarids ŝin longe.
- Tiu… homo… diris ĵus… – ŝi montris sur Alfonson.
- Ili estas strangaj homoj – turnis sin la kapitano al ni. – Koncerne vian maltrankvilon, vi povas esti trankvilaj. Mi subaŭskultis ĉi tie malantaŭ la kurteno. Mi kaŝiĝis sur la balkono de la alia ejo, kaj mi vidis, ke la ŝercema centestro venas ĉi tien. Mi venis sur tiun ĉi balkonon por draste trakti lin. Nun jam mi scias, ke tiu ĉi homo ne estas tiu, pri kiu mi pensis. Stulta, malbonŝanca hazardo, kio okazis, sed ĝi ne malbonisas mian aferon. Se la vera kapitano Mander ne estas ĉi tie, ĉio vanas.
- Ĉu vi fuĝoss?… – demandis la knabino.
- Ne. Mi recevis kelkhoran forpermeson.
- Sed kial… vi ne… fuĝos?…
- Neeblas, kaj mi tute ne volas… Diru unu vorton… Lucy: Ĉu vi kredas tion?
- Ne! – respondis la kanbino tuj kaj firme.
La kapitano ĉirkaŭbrakumis ŝin.
- Ĝi estis grav por mi. Dankon.
- Mi petas vin… – interrompis Alfonso. – Nun tri homoj ĉeestas, kiujn ne eblus elekti pli bone el la plej rezolutaj homoj de la mondo… Ĉu ni ne povus fari ion?…
- Ne. Mi vidas, ke vi estas frenezaj homoj, sed mia afero finiĝis.
- Reiru, sinjoro kapitano, en la prizonon, kaj ni fuĝigos vin – mi proponis entuziasme.
- Dankon. Mi kredas, ke vi eble povus fari ankaŭ tion. Sed mi ne povas apartigi la nociojn de la vivo kaj la honoro.
- Interese – miris Hopkins la Ŝtipulo, kaj metinte la kolon de la botelon antaŭ sian maldekstran okulon, sen ĉiu espero, preterkure li rigardis en ĝin.
La knabino timeme, kun malesperiĝinta atendo rigardis de iu homo al la alia.
Rideto trakuris sur la pala vizaĝo de la kapitano.
- Adiaŭ, kanboj. Eblas, ke vi ne apartenas al la honesta socio, sed vi esta kuraĝaj, kavaliraj, rezolutaj, bonkoraj uloj. Ankaŭ vi, dika impertinentulo, vi plaĉas al mi, kaj mi ne koleras vin. Nun ni rapidu. Post kvin minutoj vi devas gardostari. Mi dankas.
- Viktoro…
- Ne estas plu, Lucky. Oni starigos tiujn du homojn antaŭ la militan tribunalon, se ili malfruiĝos al la deŝanĝon, kaj ankaŭ mi devas reveni en la prizonon…
- Mi… estos apud vi, Viktoro… Mi iros al la respublikestro…
- Neeblas. Vi devas pensi pri via patro. Vi ne povas helpi min, vi nur helpus, ke la intenco de markizo de Surenne sukcesu…Vi, dika fripono, forportu vian felon de tie ĉi, ĉar se okazos malbono, vi ne saviĝos sen mortpafo…
Mia gorĝo striktiĝis tiom, kvazaŭ ŝnuro estus ĉirkaŭigita ĝin, kiam la kapitano kaj la knabino manpremis kaj rigardis en la okulojn unu de la alia dum kelkaj sekundoj.
Poste la knabino eliris.
- Ni iru.
- Haltu!
Serĝento Potrien staris en la pordo.

Kvina ĉapitro

Ni komplotas.

La okuloj de la serĝento elstariĝis tiel, kvazaŭ ili tuj eliĝus el ties kavoj. La eleganteco de Alfonso la Neniu konsternis lin pleje.
- Kiel vi venis ĉi tien, tiel…
Alfonso la Neniulo staris antaŭ lin. Lia poŝo reliefiĝis denove:
- Kial vi kriadas ĉi tie… serĝento! Mi estas Raverdan, la sekretario de la konsulejo!
- Kiel?! Ĉu vi pensas, ke per tio… – li hapis. – Oni mortpafos vin…
- Gardez vouz!
Ŝtipulo estis tiu! Li staris indigne antaŭ Potrien.
- Kial vi ne mansalutas?! Kiel vi staras ĉi tie?!
La serĝento statis tiel rekte, kiel paliso.
- Mi raportas obeeme al sinjoro kapitano… tiuj du homo fuĝis… ĉi tien… el la gardejo…
- Ĉu vi freneziĝis?! Kiel vi parolas pri markizo Raverdan?…
- Mi raportas obeeme, en la gardejo… mi opinias… – li balbutaĉis – la sinjoroj…
- Venu do… Mi kontrolos la postenenajtojn kun vi. Atendu min ĉi tie, kara markizo, kaj ankaŭ vi – li diris al mi. – Sekvu min, serĝento…
Kiam ili estis ekstere, ni jam kuregis.
Mi devis interŝanĝi vestaĵon nur kun Laméter, sed Alfonso kaŝis sian uniformon aliloke.
Kiel mi eksciis poste, la inspekto de la gardistoj okazis jen tiel, fare de Hopkins kaj Potrien. La kapitano ekiris el la blua salono, kaj Potrien sekvis lin. Hopkins en ĉiu salono paroladis kelkajn vortojn kun iu.
La serĝento staris sur pingloj. Sed la kapitano manĝis kelkajn sandviĉojn ĉe la bufedo, poste li petis la serĝenton en la ŝtuparejo, ke li memorigu lin pri la kanto, kiu komenciĝas jene: "Vi estas blonda Mary"… La serĝento ne konis ĝin.
En la halo generalo trampletis nervoze… Li lasis siajn okulvitrojn en la bufedo.
Ŝtipulo tuj ordonis al Potrien, kiu estis duonfreneza pro la malpacienco:
- Tuj alportu la okulvitrojn!
- Potrien kuregis kaj puŝiĝis al leŭtenanto.
- Haltu!
- Pardonon, mon adjutant.
- Kiel vi iras ĉi tie sur la ŝtuparo? He?! Ĉu vi pensas, ke ĝi estas ĉevalejo?!
- Mallonga instruo pri la okulfrapa diferenco inter la ĉevalejo kaj la palaco de la gubernio.
Kvin minutoj.
Li kuregas plu. Ĉirkaŭ la bufedo sinjoroj baras lian vojon. Tie li ne povas entrudi sin. Li devas stari, kiel la paliso, ĝis fine li povas aliri.
Malsupren kun la okulvitroj. Nur la kapitano estas tie.
- Rapidu en la kabineton. La sinjoro generalo iris tien por telefoni, portu la okulvitrojn post lin.
La generalo paroladas interurbe kun Toulon, li devas atendi ĝis tiam.
Dek minutoj… fine li venas.
Jen viaj okulvitroj, mon commandant.
- Merci, mon chef.
…Kiam li alvenas malsupren, la deŝanĝo jam okazis.
La diabnlo miksiĝis en la ludon! La du homoj staras tie sur la ŝtuparo, kiel du statuoj, en la manplato kun la kolbo de la fusilo.
Eblas, ke ili ŝanĝis vestaĵon… Ili malsuprenvenis sur alia vojo. Sed kion ili faris supre? Du senranguloj, el la gardejo, en la vesperfesto de la gubernatoro…
Tiaĵo ankoraŭ ne okazis. Li kuregas al la gardistejo.
- Gardestro!
Li staras antaŭ la melankolian ruson
- Roportu!
- En ordo.
Tiun vorton, ke "ĉio", li ŝparis.
- Kie estis la deŝanĝitaj gardistoj?
- Ĉi tie.
Ankaŭ nun tri homoj staris en ordo antaŭ la benko. Sur la tablo estas ŝakludo, gazetoj kaj samovaro. La akvo tuj eliĝos, se Potrien ne finos la inspektadon.
- Rompez!… Gardestro! Ĉu vi estas certa pri tio, ke la ripozantaj gardistoj ne forlasis la ĉambron?
- Certas.
- Ĉu vi estis ĉi tie kun ili,
- Kun ili…
La serĝento malbutonumas la kolumon de sia kamizolo, li jam preskaŭ sufokiĝadas pro kolero.

2

La gardistoj havis maltrankvilan tagon. Ili sidadis nek duonhoron, kiam la gradestro ekkriis:
- …Zarm!
Oni devis kompreni tion, ke *"aux armes"*. – Al la armiloj! - Venis dikstatura kapitano.
- Ĉu ĉio estas en ordo? Ĉu ĉio estas en ordo? Nu ripozu nur, knaboj… Kia rumo ĝi estas? Estas malpermesate enporti eksterlandan alkoholaĵon…
- Ĝi estas franca, mon commandant.
- Nu, nu… Mi kontrolos tion…
Li gustumis duon-botelon el ĝi.
- Jes, ĝi estas franca. Ĉu vi ne havas anglan rumon?
- Eĉ unu guton ne…
- Domaĝe. Nu, faras nenion… Kie estas la ekipaĵo de la gardistoj?… Ĉu?
- Jen estas la dorsosakoj kun la laborvestaĵo.
La tornistroj staris sur breto. Oni tuj demetas la paradan uniformon post la gardostaro.
La kapitano zorgeme kontrolis ĉiun dorsosakon kaj foriris.
Neniu vidis, ke li ŝovis leteron inter la aĵojn de Alfonso.
Tio okazis, dum ni gardostaris.

3

Poste alvenis, je la tria horo posttagmeze, la lasta deŝanĝo, kaj ni revenis en la gardistejon. Ni komencis demeti la parandan uniformon. Ni elprenis la blankan, drelikan labor-kamizolon.
- Jen rigardu…
Alfonso trovis leteron, al kiu estis aldone metit ankaŭ blua splipo.

"Venu tuj al la Kvar-korna Kato.
T. H."

Iu parto de la alia papereto estis tajpita
- Zarm!
La serĝento. Jen li staras antaŭ ni. Liaj okuloj fiksiĝas al ni, kiel du pintaj pingloj, liaj penikosimilaj lipharoj leviĝis minace.
- Kie vi estis antaŭ la deŝanĝo?
- Ĉi tie en la ĉambro, mon chet.
- Jes… Kiu ordonis la gardiston promeni en sia postenejo… Ĉu? – kaj li rigardis sur min.
- Mi ne sicas, mon sergeant.
- Vi ĉiuj venu kun mi!
Alfonso fiksiĝis en streĉa staro, inda al la raporto.
- Ni ne povas fari tion, sinjoro serĝento
- Kiel?…
- Ni havas gravan aferon.
Li montis al li la bluan papereton.

La senrangaj soldatoj n-ro 9 kaj 45 anonciĝu je urĝa servo ĉe nia kompanio kaj ili atendu pluan ordonon ĉe la gardistejo. Baltalionestro.

Subskribo, stampo…
Potrien ekspiris tre profunde. Pluraj eksterordinaraj surprizoj trafis lin en tiu tago, ol dum lia ĝisnuna soldatservo entute.
- Iru… vi, vi… Ni ankoraŭ renkontiĝos…
La bona, olda Potrien tute ne konjektis, ke la "kapitano" vizitis la urbkomandanton en la balon kaj petis, ke la du deŝanĝitajn postenantojn, ĉar ne estas alia soldato ĉemane, li donu libertempon al ili, ĉar li ŝatus rigardi la noktan havenurbon, kaj li ne volas vagadi sola. Pro la kapopafo.
…Pasis la dua horo, kiam Alfonso la Neniulo kaj mi estis sur la strato.
- Nun rakontu – mi diris.
- Kion mi rakontu?
- Kiu estas la virino.
La vizaĝo de Alfonso nubiĝis.
- La virino estas la filino de divizia generalo Fréderic la Bouban.
Mi fajfetis. Tiel ŝi partoprenis tiun vesperfeston. La nomon de Fréderic la Rouban oni konis ĉie en la kolonio. La grandega militista aparato en Franca-Afriko dependis de li.
- Mi estas en Oran pli linge, ol vi. Pli bone mi konprenas ankaŭ la aferon de Laméter. Tiu kapitano Laméter fianĉinigis la filinon de divizia generalo Fréderic de la Rouban, Lucy de la Rouban-on. Eĉ tion mi sciis pri la afero, kiam vi rakontis ĝin tie sur la koridoro. Mi ekiris por estis apud Ŝtipulo, kiam tiu kapitano atakos lin. Post unu paŝo kaj la bela virino staris antaŭ mi, kiun ni liberigis de sur la ŝipo. Tiam eĉ konjekton mi ne havis, kiel grava homo estas ŝia patro. Sed vi povas imagi, ke ĝi estis iom ĝena por mi.
"Vi do… vi mensogis la lastan fojon", ŝi diris ekscitite. "Vi estas la membro de la sekreta servo! Dungito de markizo de Surenne. Tial vi liberigis min, ke mi kompromitu mian patron! Sed vi eraris…"
"Mademoiselle", mi respondis; "bedaŭrinde ne tio estas la situacio. Mi gardostaris ĉe la pordego kaj kaŝe venis ĉi tien pro familia afero. Tial mi rakontis ĝin sincere, ĉar mi opinias vin kavaleria virino, kaj mi ne timas tion, ke vi perfidos nin, ĉar mi kaj mia amiko traktis vin tiel takte."
- Vi parolis vere bonege – mi konstatis sincere, ĉar mi estas alta estimanto de ĉiu oratoro.
- Mi ne scias, kiel, sed mi fidis tiun knabinon, kaj mi rakontis ĉion sincere. Kiam ŝi aŭdis, ke Laméter estas ĉi tie, en via vestaĵo, ŝi preskaŭ svenis. Poste ŝi kondukis min en la bluan salonon. La ceterajn vi jam scias.
- Kiel venis tiu knabino sur la ŝipon?
- Sia patro tenis ŝin kaptita, ĉar la knabino volis stari apud sian fianĉon antaŭ la tuta mondo. Ĝi vere estintus stulta heroaĵo. Post kiam ni liberigis ŝin, la patro tamen sukcesis konvinki ŝin.
- Sed kiel venis Hopkins en tiel bonan societon? Kun lia kondutmaniero?
- Nek li mem scias tion. Li sidis sur la barĝo kaj atendis vin, por ke vi alportu vestoj de ni. Li aŭdis knalon, sentis baton, kaj rekonsciiĝinte li kuŝis sur blanka lito, milita kuracisto klinis super lin, kiu diris: "ĉu vi fartas pli bone, sinjoro kapitano?" Li estis en la hospitalo de la garnizono. Li trovis egitimilon en sia poŝo, kiu estis tiu de kapitano Mander. Poste, ĉar la manĝaĵo bongustis al li kaj ankaŭ la sinjora traktmaniero, li do elpensis la rakonton pri la kapopafo… Li estas ruzulo…
- Kian rakonton pri la kapopafo?
- Do Ŝtiulo ne estas tiel klera, kiel kapitano, kaj dirinte ian idiotaĵon, li palpadis sian nukon, ke li havas kapopafon. Li ne memoris sian nomon, li ne sciis, de kie li vienis: kapopafo. Oni uzis elektran terapion, oni kuracis lin, sed vane. Fine oni konstatis, ke la kuglo trafis gravan nervon ĉe la nuko de la kapitano, pro kio li perdis sian memoron kaj bonedukitecon.
- Sed kian problemon havis kapitano Laméter, rilate lin?
- Kiam li resaniĝis, oni pridemandis lin en la prokurorejo, ĉar tiun kapitanon Mander oni jam atendis de semajnoj el Sudokcident-Afriko. Li estintus grava atestanto en la afero de Laméter. Ankaŭ tie li diris, ke memoras nenion. Laméter, kiu asertas, ke oni koncepcie persekutas lin, kaj certe li pravas, li pensis tion, ke ankaŭ la kapitanon direktas nevideblaj manoj, rilate lian konfeson. Ĉar li havis la lastan esperon, ke tiu kapitano faru sav-ateston. Kiam li sciiĝis, ke ĝi okazis ne tiel, ĉiu malaespera kolero ekbolis en li, kaj li preskaŭ mortigis Ŝtipulon.
- Nun fine ni ĉiuj estas en la meza mezo de afero, kiun ni ne komprenas, kaj ni havas nenian rilaton al ĝi.
- Ni vidos, kio fariĝos el ĝi. Nun estas nenia problemo.
- Nur Ŝtipulo sidas en peĉo bele.

- Li elturniĝos.
Ni iris sur malvasta, serpentuma, longa stratetaĉo, profunde en la havenkvartalo.
Tie estis la drinkejo *"Kvar-korna Kato"*, kie li volis renkontiĝi kun ni.

4

Kvastiĉ, la kuracisto, havanta grandan, pufan vizaĝon, fortepianis, kaj dume li dormis. Li havis grandan praktikon pri tio.
La drinkejmastro, kiam ni enpaŝis, montris al la kurteno malantaŭ la bretaro:
- Tien…
Aparta ĉambreto estis ĉi tie, kie niaj komplicoj, ricelistoj kaj aliaj negocpartneroj intertraktis kun ni dum labortagoj. Nun Stipulo atendis interne, kaj…
Lucy de la Rouben!
Vane ŝi vestis sin tiel trivite, kiel nur la vestaĵaro de la ĉambristino permesis tion, tamen ŝi okulfrapis el la ĉirkaŭaĵo, same kiel Hopkins la Ŝtipulo, malgraŭ la eleganta uniformo, tute diferencis disde la gastoj de la palaco de la gubernio, en la salonegoj kun polituraj plankoj. Hopkins cetere ĉeestis la societon kun sia kutima, treege trampa eksteraĵo. Li malnova ĉapelo estis ŝovita sur lian nukon, el lia buŝangulo pendis estingiĝinta cigaro, sur lia terura torako sidis poreca trikotaĵo, plekita el ŝnuro, lia jako estis ĵetita sur lian ŝultron, kaj sur lia pantalono, kradita blanke-nigra, videbliĝis triangula, verda fliko. Tiaj dandaĵoj, kiel ŝtrumpo aŭ laĉo, vekis en li nur malestimon. Li apogiĝis sur sian dikan, harkovritan, nudan antaŭbrakon kaj gapis akvoglason da brando.
- Mallonge – diris Alfonso. – Ni devas reveni je la veka trumpeto, ĉar Potrien mortpafigos nin ambaŭ.
- Pri kio temas? – mi rimarkis, por ke ne ĉiam Alfonso la Neniulo parolu.
- Pri tio, ke ni aliĝu al modesta diamant-minejo, kiu estas mirinde valorega, nur tion oni ne scias, kie ĝi troviĝas – respondis Ŝtipulo kaj eltrinkis la glason da brando. – Miaparte mi partoprenas la aferon. Mi ĉiam enviis la posedantojn de la minejoj, ĉar ili enspezigas multe.
Ankaŭ mi aprobis tion.
- Mi ne scias, kion atendi de vi – diris la knabino. – Sed tiel strange vi aperis en mia vivo, kaj tiom mi havas neniun, de kiu mi povus atendi komprenon kaj helpon.
- Mi povas certigi vin, fraŭlino, ni tripoe estas apud vi, kiel viaj kavaleriaj aŭ plej humilaj servistoj.
Li estis tiu. Alfonso la Neniulo. Li parolis tiel, kiel vera cigno-kavaliro.
- Mi opinias – mi interrompis –, kapitano Laméter diris tion, ke morgaŭ oni mortkondamnos lin. Ĉu ĝi vere estas tiel?
La knabino ĝemis, kaj ŝia liprando ekkonvulsiis.
- Jes…
- Ni devas fuĝigi lin!
- Eh… se Viktoro volus fari tion, li irus en Fongi-on… kaj li malkaŝus la friponojn. Li trovus la postsignojn de la malaperinta ekspedicio… Li malhelpus, ke tiom da sango verŝiĝu…
Hopkins eklevis sian ŝultron
- Ni do liberigos lin.
- Ĉu… el la milita arestejo?
- La konstruaĵo ne gravas… ni elpensos ion… Nur la kapon supren, estas nenia problemo, oĉjo Hopkins aranĝos ĉion.
Li eltrinkis glason da brando kaj englutis la estingiĝintan cigaredstumpon.
- Mi opinias, ke estus plej bone – interompis Alfonso –, se vi rakontus ĉion al ni, kio okazis?

Sesa ĉapitro

La lavango ekruliĝas.

1

- Laméter estis la kapitano de la krozŝipo *General du Negrier.* Ĝi estis iu el la du militŝipoj de la legio. Ĉiu antaŭdiris belan futuron al Laméter. Li estis la plej bone kvalifikita maroficiro, la plej juna kapitano. Ni gefianĉiĝis antaŭ ses monatoj. Kvazaŭ tio estus kaŭzinta la malfeliĉon, tiam komenciĝis la kalvario de Viktoro. Lordo Peevbrock ekvojaĝis al Senegalo por ĉasadi en Okcident-Afriko. Ĉar li ne donis vivosignon pri si jam du monatojn, oni informis la garnizonon en Timbuktu por serĉi Peevbrock-on. Fine oni trovis lin en hospitalo de Gambio, kie li kuŝis en la lito malsana je tifo. Ankaŭ lia ĉasista kolego, kaptano Mander estis flegita pro la sama infekto.
- Li estas tiu – rimarkis Ŝtipulo, kaj li elprenis alian cigarstumpon el sia poŝo –, kun kiu oni intermiksis min.
- Jes. Persone neniu konas lin ĉi tie. Ni scias laŭ onidire, ke li estas dikstatura, stranga junulo, li do hazarde memorigas vin. Antaŭ dek jaroj li pensiigis sin pro malfideleco de virino, li forlasis la soldatservon en Madagaskaro, kaj li vivis sola en la ĝangalo de Okcident-Afriko. Neniu alia kontaktiĝis kun li krom sia ĉasista kolego Peevbrock. Pro virino.
- Ni ne similas en tio – diris Ŝtipulo. – Ĉe mi la virino estus forvaginta en la ĝangalon… Kelnero! Refreŝigilon… Ĝi povas esti ankaŭ rumo…
- Lordo Peevbrock kaj kapitano Mander resaniĝis. Evidentiĝis el ilia raporto, ke ili trovis grandegan trezoron. Trans la ĉefurbo de la indiĝena tribo Fongi, norde de Tamaragda troviĝas minejo, riĉa je diamanto. Ĝi estas eksterodinare grava afero por la instanco. La diamant-minejo estas tiu de la ŝtato. Kiu trovas ĝin, nur tiu ricevas parton el ĝi. Privatulo ne rajtas mini krudan diamanton, kaj li ne rajtas komerci per ĝi. La ŝipo *General du Negrier* ricevis ordonon, ke ĝi liveru sur ties ferdeko bone ekipitan ekspedicion, provizitan kun konvenaj fakuloj kaj rimedoj, ĝi navigu kun ili de sur la maro sur la rivero Senegalo, ĝis la akvonivelo permesas tion, kaj ĝi atendu, dum la societo atingas sian celon. Tial ricevis Laméter tiun komision, ĉar li jam plurfoje ennavigis en la riveron Senegalon per la ŝipo *General du Negrier,* kaj Laméter havis bonan amikan rilaton kun la tribo Fongi, ankaŭ la tribestro Mimbini estis lia bona amiko. Tial oni neniam konkeris tiun terenon. La kolonia administrado regis meran regionon de la rivero Senegalo kun diplomacio kaj bonvolo, kiel la paca tribo Fongi vivis. Dume oni kaptis spionon, ĉe kiu troviĝis enigma letero. Ĝi tekstis jene: *"Ni subaĉetis la kapitanon. Mimbini pereigos la ekspedicion."* Post semajno la ŝipo revenis, kaj Laméter asertis tion, ke li ricevis radigramon, en kiu kapitano Mander informis lin, ke li atingis sian celon, kaj li petas, ke la militŝipo returniĝu, ĉar ĝi maltrankviligas la indiĝenojn. Oni tuj arestis Laméter-on, ĉar dume elvenis raporto el Senegalo, ke la societo ne alvenis en Tamaragda-on, la aviadiloj ne trovis ilian spuron, kaj ili ne respondas je la radio-alvoko. Verŝajne la ekspedicio pereis. Tiel la letero, trovita ĉe la spiono estis terura pruvaĵo kontraŭ Laméter.
- Sed ja la radiisto devis scii, ĉu alvenis sciigo, aŭ ne?
La knabino ĝemis.
- En la rivero Senegalo svarmas la krokodiloj, kaj la radiisto falis en la akvon de sur la ŝipo, du tagojn antaŭ la reveno. Oni pensas, ke iu mortigis lin… Kaj ŝajnas, ke oni akuzas Viktoron ankaŭ per tiu teruraĵo.
El ekstere aŭdiĝis cincado de sitro.
- Nun… Laméter-on… – ŝi apenaŭ povis eldiri –, oni mortkondamnos… lin… Ekveturos milita punekspedicio por okupi la teron de la dento Fongi… Tiel… neniiĝos ĉefa celo de la vivo de mia patro. Li estis adepto de la kolonia regado sen elverŝo de sango… Li fiaskos pri tio, ĉar li neniam volis okupi Fongi-on.
- Ni do faros ion – esperigis ŝin Hopkins. – La afro estas ne tiel danĝera. Nur supren la kapon, mi petas vin…
- Se mi komprenas bone – demandis Alfonso la Neniulo –, ĉu la kapitano havis bonan kontakton kun la tiea tribestro, kaj se li liberiĝus, li solvus la enigmon?
- Mi estas certa pri tio!
- Li do liberiĝos – diris Alfonso post mallonga hezito.

2

Tia knabo li estis.
- Mi esperas… nenion… Vi estas bonanimaj, ĝentilaj homoj, sed kion vi povus fari, kontraŭ la tuta mondo… triope?
- Ne tiel talenta estas tiu ĉi Mondo, por ke tri saĝaj homoj ne povus trompi ĝin – mi diris, kun mia kutima instruiteco.
- Ĉar, se iam evidentiĝus la solvo de la enigmo, tiam ni ricevus altan premion… Ja perdiĝis ankaŭ minejo de diamanto… La tantiemo signifus grandan enspezon al tiuj, kiuj trovus ĝin.
- Ni provos tion – kapjesis Alfonso la Neniulo. – Nun iru hejmen, kaj morgaŭ ni savos la kapitanon de la mortkondamno. Mi havas pretan planon. Ĝi estas unika en la historio de la krimaferoj.
En la okuloj de la knabino revadis espero, malgajeco, dubo kaj ĝojo, kiel ŝi rigardis siajn tri sovaĝaspektajn kavalirojn unu post la alia.
- Dio mia… se ĝi okazus tiel.
- Ĝi estos tiel. Nun ni venigos aŭton, kaj ĝi sukcesos.
Kiam ni restis triope, sekvis mallonga interkonsiliĝo. Poste ni inkludis en ĝin ankaŭ profesoron Kvastiĉ de sur la fortepiano.
Je la matena, veka trumpetado ni alvenis al la pordego de la fortikaĵo St. Therese, kaj ni iris kontente, sen ripozo, por alviciĝi.
Ni savis la kapitanon.

Sepa ĉapitro

Mi eniĝas en la pli altan diplomacion.

1

"La prezidanto malfermis la proceson, oni laŭtlegis la nomon de la atestantoj kaj la asignitaj ekspertoj."
La ĵurnalo skribis jene la sekvan tagon. Antaŭ mi estas la malpuraj, ŝiretiĝintaj paĝoj, ĉar mi konservis tiujn. Atestantoj, atestantoj kaj denove atestantoj… Absolute sensignifaj militistaj kaj geografiaj fakdemandoj…
Venas la akuzito, la degradita kapitano…
- Ĉu vi estas Viktoro Laméter! Ĉu vi neos ĝis la lasta momento?
- Mi diris nur la veron. Mi estas senkulpa.
- Rakontu la historion de la laŭdira radiomesaĝo. En kronologia ordo.
La akuzito faris mallongan paŭzon.
- …Estis sufoke varma nokto. La ŝipo staris sur la rivero Senegalo. La ekspedicio jam ekiris kvar tagojn de sur la kirasŝipo al la lando Fogni… La siroko ofte penetras el la direkto de la maro al la regiono de la rivero, kaj ĝi stagnas inter la arboj… Tiam mi estis nerviza, langvora kaj deprimita. Ankaŭ tiun tagon okazis tiel. En la kalmo infere penetris la varmega, okcidenta blovo… Humida vaporo ekkuŝis sur la rivero…
- Ĉu ankaŭ alifoje kaptis vin malbonfarto en la siroko? – demandis la prokuroro de Laméter.
- Jes. La ŝipkuracisto povas pruvi tion.
- Daŭrigu!
- Dumtempe okazis la akcidento. Aŭdiĝis krio, kaj ni ankoraŭ vidis sur la akvo Rolf-on, la radiiston, en kirliĝanta odo-ringo, droni inter skvamoj, konvulsiiĝantaj ĉirkaŭ li.
- Kie vi estis, kiam ĝi okazis?
- Antaŭ mia kajuto.
- Ĉu iu vidis vin senpere antaŭ la morto de Rolf?
- Ne… Kiam Rolf jam ŝrikis el la akvo, mi samtempe alvenis tien, de kie li falis, kun la stiristo Matiaso, kun la unua oficiro kaj kun du matrosoj.
- Daŭrigu!
- Nokte la siroko blovis kun pli forta premo.La malbonodora haladzo de la rivero, la vaporoj de la riverborda ĝangalo kovris la ŝipon, la lampoj apenaŭ flagretis en la profundo de slia haloo. Mi kuŝis en mia kajuto kun lancina kapokramfo, mi trinkis konjakon, sed ĝi havis malbonan guston, kaj mi multe pli naŭzis pro tio…
- Ĉu vi trinkis multe?

- Mi ne estis ebria.
Mallaŭta murmurado. La advokato de la kapitano malbonhumore frap-metas la notoj unu sur la alian. La akuzito mem malbonigas la mildigan cirkonstancon.
- Mi ne estis ebria – li ripetas kategorie. – Mi estis langvora kaj narkotita, sed mi memoras ĉion klare.
- Daŭrigu vian konfeson!
- Noktomeze la unua oficiro frapetis. Fininte sian kontrol-rondiron, li raportis al mi…
- Ripetu laŭvorte tiun interparoladon, se vi memoras tiun – diris la prezidanto.
- Bone. Higgins raportis:
"Sinjoro kapitano! Mi finis la kontrolon je la 12-a horo kaj dudek minutoj. Ĉio estas en ordo…"
"Dankon, Higgins… De kiam vi deĵoras?"
"Dek du horojn… sinjoro kapitano."
"Ripozu."
"Ĉu sinjoro kapitano transprenos la deĵoron apud la radio anstataŭ Rolf?"
"Kompreneble."
Mi ekstaris, sed mi kapvertiĝis iomete…
"Permesu, ke mi suprenkonduku vin, diris Higgins. Sufoke varma, profunda nebulo kovris la ŝipon. De tagoj ne pluvis, tamen akvo gutis de sur ĉio. Mi ŝanceliĝis kapvertiĝante… Eĉ unu paŝdistancon oni ne vidis… Sen Higgins mi ne povintus atingi la kajuton. La oficiro malfermis la pordon, kaj mi enpaŝis.
"Bonan nokton, Higgins."
"Bonan nokton, sinjoro kapitano… Ĉu vi deziras preni kininon?…"
"Dankon…" Mi restis sola kaj ekdormis. Mi ne sciis, kioma horo estis, kiam mi vekiĝis. Kun terura kapokramfo. La radio, kiu havis senĉesan kunligon kun la ekspedicio, eksonis:
"Négrier… Négrier… Négrier." Ĝi estis nia vok-signalo.
"Négrier…"- mi respondis.
"Kapitano Mander… La ekspedicio estas en Fongi. La senditaj esploristoj trovis la minejon… Ĉio estas en ordo… Via ŝipo revenu en Oran-on kun la raporto. La indiĝenoj maltrankvilas pro la krozŝipo. Ĉu vi komprenas?"
"Mi komprenas… Morgaŭ mi ekveturos… Ĉi tie estas kapitano Laméter…"
"Kial ne la radiisto?"
"Li mortis." Mander diktis mallongan liston pri la bezonataj objektoj.
- Ĉu ĝi estas tiu? – demandis la juĝisto.
Laméter rigardis la paperon.
- Jes. Ĝi estas mia manskribo.
- Daŭrigu!
- Mi havas nenion diri. Sekvan tagon malankrinte, ni navigis sur la rivero al la maro kaj alvenis hejmen.
- Ĉu sinjoro prokuroro volas levi damandojn?
- Ĉu vi konis kapitanon Mander? – demandis la prokuroro.
- Li veturis ne sur la ŝipo *"General du Negrier"*. Li atendis la ekspedicion kun lordo Peevbrock en Fongi.
- Ĉu vi konis lin aŭ ne?…
Mallonga paŭzo.
- Mi… konis lin…
- Kial vi diris, ke li estas ĉarlatano, kiam li eksciis, ke li ne faris sav-ateston?
- Mi neas la respondon.
- Ĉu vi sciis pri io tute certe, ke Mander parolas?
- Jes. Sed mi ne konfesas pri tio.
- Ĉu vi konus la voĉon de kapitano Mander, se vi aŭdus ĝin?
- Mi ne scias.
- Do vi ne laŭ la voĉo sciis certe, ke li parolas, sed li diris ion, kio estas persone intima inter vi.
- Jes. Sed mi ne konfesas pri tio!
- Eksidu! – La akuzito iris sur sian lokon. – Sekvas la priaŭskulto de kapitano Mander, kiel atestanto.
Enpaŝis la "kapitano". Li estas interesa homo. Iom dika, kaj li ofte palpebrumas.
- Ĉu vi estas kapitano Mander?
- Jes… mi pensas tion…
- Ĉu vi havas kapopafon?
- Jes.
- Ĉu vi memoras la cirkonstancojn de la vundiĝo?
- Mi ne memoras…
- Sed vi scias tion, ke vi estas kapitano Mander…?
- Mi estas tute certa pri tio… Ĉar… – li palpadis sian kapon.
- Ĉu vi konas la akuziton?
Li rigardis sur la kapitanon.
- Mi ne memoras.
- Ĉu vi memoras nenion…?
Li frotadas sian frunton…
- Mi vidas senarbejon… Iu prenas mian brakon… li minacas min… Sed ankaŭ tio estas malklara…
La kapitano ekstaras mirante.
- La akuzito eksidu!
Murmuro. Ĉiu sentas, ke okazas io eksterordinara.
Akrigu vian cerbon… Kun kiu vi estis sur tiu senarbejo? Ĉu vi ne vidas vizaĝon antaŭ vi?
- Tute malklare…
- Ekzemple impresojn…
- Jam… ke mi... nu… Kion mi diru?
- Provu diri impreson.
La atestanto glutis…
- Mi petas vin… Mi havas kapopafon.
La prokuroro leviĝas subite. Ĝis nun li flustradis kun iu.
- Oni nun informis min, ke nokte okazis neatendita evento. La polico, laŭ sennoma denunco, arestis homon, kies pridemandadon mi petas. La koncernulo estis Fedor Kvastiĉ, la ŝipkuracisto. Pro krimafero oni prohibis lin poreterne praktiki sian profesion.
- Mi ordonas lian pridemandon – apborbis la prezidanto. – Ĝis tiam sinjoro kapitano Mander sidiĝu sur la benko de la atestantoj.
Venis profesoro Kvastiĉ. Li estis grandega, blankhara homo kun dormemaj okuloj, konata figuro de la krimula mondo. Apud li staris policoficiro.
- Kiel vi nomiĝas?
- Fedor Kvastiĉ.
- Kiam vi naskiĝis?
- En jaro 1886, en Rigo.
Skribinte liajn indikojn, la prezidanto turnis sin al la policoficiro.
- Kial vi arestis tiun hjomon, sinjoro kapitano?
- Aŭrore iu telefonvokis la deĵoranton en la centro – komencis la policoficiro –. kaj li diris, ke la vera farinto de la Laméter-afero estas Kvastiĉ Fedor, bone konata homo ankaŭ por la polico. La voĉo ne nomis sin, li diris nur tion, ke Kvastiĉ trompis lin, kaj tial li venĝas nun. Tiajn informojn ĝenerale ni akceptas tre serioze, ĉar la farinton de pluraj nesolveblaj krimoj jam donis en la manon de la polico la venĝo de la krimula mondo. Kvastiĉ fortepianas en diboĉejoj, kaj li estas registrita en la dosieroj, kiel neplibonigebla kontrabandisto de narkotaĵoj. Ni tuj venigis lin en la policejon. Intertempe ni jam konstatis, ke la ruso ne restadis en Oran dum la krimafero, okazinta en Sanegalo…
- Kie vi estis dum la krimafero?
- En Gambio…
- Kiel vi scias, kiam okazis la krimo?! – ekstridis la prezidanto – tiun daton la milita novaĵagentejo ne komunikis al la ĵurnaloj, kaj estis malpermesite publikigi tion…
- Mi… – balbutaĉis la atestanto… – mi aŭdis…
- De kiu?!
- Mi… jam… ne memoras…
- Kial vi mensogas?! Morgaŭ ni ekscios el Gambio, ĉu vi vere estis tie?
- Mi nur… traveturis tie.
- De kiu lando, kien?
Silento.
- Ĉu vi konas la landon Fongi?
- Mi jam… estis ĉe ili… Mi konas…
Nun la "kapitano" malrapide antaŭenvenis de la benko de la atestantoj, li frotadis sian frunton konfuzite kaj rigardis la atestanton.
Kiam Kvastiĉ ekvidis lin, li retropaŝis timiĝinte.
- Ĉu vi konas la kapitanon? – demandis la prezidanto rapide, kiam li rimarkis la embarasiĝon de la atestanto.
La ĵurnaloj skribis ĝin jen tiel:
"Kvastiĉ retroiris timiĝinte, kaj kapitano Mander sekvis lin konsternite… En la ĉambro estis morta silento, streĉa ekscitiĝo, nur Laméter, la akuzito kondutis nekompreneble. Li ekstaras konstante, kvazaŭ li volus diri ion, li gratss sian kapon kaj turniĝadas nervoze. Ĉiu sentas, ke la afero atingis decidigan turnopunkton…"
- Ĉu la atestanto memorigas vin pri iu? – demandis la prezidanto la "kapitanon".
- Jes… sed mi ne scias… Kvazaŭ ie en duopo…
- Ĉu vi estis en Senegalo, somere? – turnis sin la prezidanto al la nova atestatno. – Gambio ne situas malproksime de tie…
- Mi jam ne memoras… Sed eblas… Tamen…
- Folter! – kriis nun la "kapitano" stertore. – Fol… ter… – li balbutaĉis poste pli malcerte…
La prezidanto rapide foliumis inter la aktoj.
- Jen tio estas skribita en malpli nova protokolo: "En la unua radigramo de la ekspedicio, kiun ankoraŭ la mortigita telegrafisto notis, oni menciis pri certa Folter, kiu iris por akcepti la blankulojn, komisiite de la tribestro Mimbini. Folter asertas tion, ke la anglo, kiel observanto restadas ĉe la fongi-anoj, li estas la amiko de la ĉefo." Laméter mem konfesis tion.
La akuzito ekstaras. Li parolas heziteme, kun stranga mieno:
- Jes… sed mi opinias, ĉi tie… io…
- Ĉu la mesaĝo tekstis tiel? – demandas la prezidanto kaj energie frapetas per sia skribilo.
- Jes. Kaj oni petis min kontroli la indikojn.
- Ĉu vi kontrolis?
- Oni arestis min dum la tago de mia alveno.
- Eksidu…
- Sed mi petas…
- Nun diru nenion! – Kaj li turniĝis al la atestanto: - Kiel vi opiniis pri ĉio ĉi?
La atestanto balbutaĉis.
- Mi petas… mi estis Folter… Tial mi neis tion, ĉar… mi timis, ke mi suspektiĝos…
- Ĉu vi estis angla observanto?
- Ne…
- Ĉu vi iris por akcepti la ekspedicion?

- Jes.
- Ĉu vi aliĝis al la ekspedicio?
- Mimbini… sendis min… mi komencadis kun li…
- Dio mia…mi nur memorus… – diris nun ŝajne nervoze la “kapitano”-Folter! – Ie ni staris… kune… Palmoj… tendo kaj dratoj…
- Ĉu vi konas tiun sinjoron kapitanon? – demandis la prezidanto.
- Mi… konas…
- Ĉu vi staris kun li ie sur senarbejo aŭ en arbaro?
- Jes… La sinjoro kapitano estis tre amikema kun mi… ĉar mi havas belan voĉon, kaj… mi kantis… anglajn… militkantojn…
- Kio estas via vera nomo?
- Kvastiĉ.
Nun la “kapitano” paŝis antaŭ lin tremante. En la ĉambro sidis silento, streĉita ĝiskreve.
Nur la akuzito frostis sian postaĵon al la seĝo konstante tiel, ke la prezidanto admonis lin.
- Mi… kantis tion… – balbutaĉis Kvastiĉ –, ke *“Baby,Baby I’love jou”*
Eksplodis la dramo!
- Fripono! – kriis la “kapitano”, kaj li ĵetis sin sur la atestanton. Per iu mano li kaptis lian gorĝon, per la alia li ekbatis ties vizaĝon, ke ĝi krakis.
Kvar suboficiroj devis lin reteni. En la ĉambrego fariĝis nekredebla kaoso. La prezidanto frapetis kaj kriadis, poste li leviĝis.
Sed la prokuroro superkriis la bruon.
- Mi proponas ne suspendi la proceson, sinjoro prezidanto. La atestanto nun memoras!
Ekestis silento. La prokuroro parolis plu:
- Ni ne preterlasu la okazon, kiam la grave vundita atestanto, ŝajnas, regajnas sian memorkapablon…
- Kondutu trankvile – diris la prezidanto amikeme al “Mander”. – Ĉu vi memoras ion?
- Jes… – li respondis ekscitite. – La dissenda aparato estis en mia tendo! Tiu… homo… ĝuste kantis… kaj envenis iu… amiko… kiel li nomiĝis?
- Peevbrock – helpis la prezidanto.
- Peevbrock!! – li kriis… – Jes! Li! Kaj li diris tion… mi sendu raporton… al la ŝipo… Ni estis en malagrabla situcio… Ni vojeraris en la ĝangalo.
- Kaj vi kion diris?
- Ke… supren la kapon… Jes… tion… kaj kiam ni restis denove en duopo… mi alturniĝis… al la dissendilo… kaj tiu homo… batis min je la kapo…
Li staris spiregante.
- Fedor Kvastiĉ! Kion vi povas aldoni al tio? Ĉu vi neas ĝin?
- Mi petas… – li balbutaĉis… – Mi konfesas ĉion… Laméter estas senkulpa.
- Mi pensas… – leviĝis la akuzito nervoze. – Ĉi tie io…
- Eksidu, kaj ne parolu, ĝis mi ne permesos tion… Kvastiĉ! Kiel kompreni tiun vian lastan frazon?
- Sinjoro prezidanto… dum mi sentis, ke mi povos elsaviĝi de la afero, mi ne zorgis pri la kapitano, kvankam kelkfoje mi havis animriproĉon. Sed nun jam mi ne evitos la punon, mi do redonos la honoron de la sinjoro kapitano, kiu estas senkulpa.
- Parolu! Ĉu vi estas kapabla, sinjoro kapitano, kontroli tion?
- Kiel… Kion mi devas?… – demandis Ŝtipulo nervoze
- Mi komprenas tiel, ĉu vi estas malkapabla?
- Mi petas… – li balbutaĉis – mi havas kapopafon…
- Bonvolu sidiĝi, se vi malbonfartas. Diru ĉion unu post la alia, Fedor Kvastiĉ!
- Internacia spiono, kun kiu mi renkontiĝis en Gambio en junio...
- Kiel li nomiĝis?
- Méridée… sed eblas, ke ĝi estas pseŭdonomo. Li donis dekmil frankojn al mi kaj promesis kvardek mil, se mi entreprenos la aferon. Laŭ liaj instrukcioj mi iris al la tribo fongi, kvazaŭ mi estus reveninta en Gambion, kaj mi iris por akcepti la ekspedicion. Tie laŭ la ordono de Mérimée mi renkontiĝis kun la kapitano. Sur iu senarbejo, kiun oni nomas *“Elefant-Ripozejo”*…
- Elefant-Ripzejo! – kriis la “kapitano”, kvazaŭ li ekmemorus ion – jes! Ĝi estis… tiu loko.
- Daŭrigu vian konfeson!
- Tie, mi batfaligis la kapitanon en la tendo, poste mi kontaktiĝis pere de la radio kun la ŝipo *“General du Negriér”*, kaj mi parolis en la nomo de la kapitano.
- Kian mesaĝon vi diris al li?
- Tian, ke: “ni atingis la tribon fongi… ĉio estas en ordo… La krozŝipo maltranviligas la indiĝenojn, ili returniĝu, kapitano Mander.”
…La akuzito staris sur sia loko kun mirantaj okuloj kaj malfermita buŝo. Kelfoje kvazaŭ li volus ridi. Ĉu li freneziĝis?
Ĝi estus komprenebla… Oni preskaŭ mortkondamnis lin, senkulpe!
- Poste – daŭrigis Kvastiĉ – mi donis signalon per pistolpafo, kaj el la densejo elkuris Mérimée kaj liaj homoj; antaŭ ol kiu ajn povintus pensi pri defendo, ili kaptis kaj ŝnurligis ĉiun.
- Kiuj estis la homoj de la bandito? Ĉu eŭropanoj aŭ indiĝenoj?
- Jam… do… ilia plimulto estis… negroj…
- Ĉu el la tribo fongi?
- Ne… ili estis… alispeculoj…Mérimée venigis ilin… De kie, mi ne scias tion.
- Kio okazis poste?
- La negroj restis tie kun la kaptitoj. Sur alia senarbejo ni sidis en malgrandan sport-hidroplanon, kaj matene ni descendis en Gambio. Mi revenis en Oran-on.
Tiel bonega homo estis tiu Kvastiĉ. Tia estas maloftaĵo eĉ inter la filmverkistoj. Nur unufoje diris ĝin al li Alfonso aŭrore, kion li devas fari. Kaj antaŭtagmeze li diris ĉion tiel bonege, al kio fraŭlino Rouban liveris la indikojn. Kaj tiel lerte, balbutante, rifutante sin mem li suspektiĝis, kiel vera krimulo… Mi rimarkas, escepte tiun aferon, li estis tiu. Mi konfesas, ke mi havas neĉiutagan sagacecon, sed nek mi estas pli saĝa ol Kvastiĉ. Li bonege koincidigis ĉion. Kvastiĉ somere estis en Kairo kun la kontrabandistoj, kaj tiel la polico tre facile konvinkiĝis pri tio, ke la konata “sinjoro Profesoro” de la krimula mondo, en la donita tempo ne estis en Oran. Sed de kie li prenis tiun Mérimée-on, ĝi estas enigmo.
La akuzito vane volis alparoli. La ekscitiĝo, la neatendita turniĝo malebligis la daŭrigon de la krim-proceso.
La prezidanto ordonis la areston de Fedor Kvastiĉ kaj prokrastis la proceson. Sed unue la adokato-defendantoprezentis peton.
- Mi proponas subkondiĉe liberigi la akuzaton. Mi opinias preskaŭ senduba, ke la verdikto estos absolva.
- Miaparte mi aprobas la proponon de la pledanto! – deklaris la prokuroro.
La milita tribunalo post unu minuta interkonsiliĝo decidis tiel, ke ĝi akceptas la proponon de la pledanto kaj tuj subkondiĉe liberigos la akuziton, ĉar oni ne devas timi lian fuĝon.
Kaj pri tio la prezidanto eraris.
Tagmeze je la unua horo kapitano Laméter forlasis la domon de la milita tribunalo.
Posttagmeze je la kvara horo jam radio, telegrafo kaj telefono portis la sciigon al ĉiu parto de Afriko: Ricevos kvindek mil frankojn da premio tiu, kiu kaptos kapitanon Laméter aŭ donos decidan informon al la polico pri lia restado.
Krome estas serĉata ankaŭ malalta, dikstatura, larĝ-nuka homo kun okulfrape mallongaj brakoj, kiu faris diversajn krimojn en Oran sub la pseŭdonomo “kapitano Mander”…
Sed la kapitano kun la stranga centestro malaperis senspure.

2

La afero ne estis facila. La antaŭaĵojn jen tiel rakontis Hopkins poste.
La kapitano iris al la “tranoktejo de la centestro” tuj post sia liberiĝo. Ŝtipulo loĝis en eleganta hotelo, kaj ĉiusabate, apelaciante sian kapopafon, li rifuzis kategorie la pagon de la fakturo.
Laméter sukcesi lerte rifuĝi de antaŭ la ĵurnalistoj, kaj en la ĉambro de Ŝtipulo li jam senĝene povis ĝui sian neatenditan liberecon.
- Aŭskultu min, amiko mia: vi havas unu horon por fuĝi.
- Kiel vi vidas, mi jam pakis ĉion. – Pruvante tion, li elprenis kravaton kaj duonon da noktoĉemizo el sia poŝo. – Ĉu vi permesas, ke mi iru kun vi, sinjoro kapitano?
- Ĉu en la prizonon? Ĉar mi atendas nur tion, ke vi fuĝu, kaj mi tuj anonciĝos ĉe la prokuroro. Mi rakontos ĉion al li tiel, kiel ĝi estas efektive.
- Ĉu vere ne?
- Dankon, kion vi faris! Ĝi estis genia, kuraĝa kaj grandanima. Kiu estas tiu homo, kiu rolis sub la nomo de Folter?
- Mia familia kuracisto.
- Kiel vi persvadis lin pri tiu frenezaĵo?
- Ni diris l li, ke temas pri diamant-minejo. Se li entreprenos la rolon, oni aŭ enkarcerigos aŭ pendumos lin, aŭ li fariĝos ĉefdirektoro. Li taksas sian vivon nek tiom, kiel rompiĝintan butonon de mantelo. Li kapjesis langvore. La afero plaĉis al li… Jam delonge li ŝatus fariĝi ĉefdirektoro.
- Dankon, kion vi faris… Ĝi estas kortuŝa… sed…
- Vidu, sinjoro kapitano, se vi pruvos, ke vi estis senkulpa, tiam oni elkarcerigos Kvastiĉ-on jubilante. Se nun vi anonciĝos ĉe la prokuroro, ni ricevis minimume dek jaran punon pro la komedio.
- Unuavice vi fuĝos.
- Eĉ se Kvastiĉ restos ĝisorele en la peĉo? Mi tute ne faros tion. Mi ne estas fripono.
- Kion mi faru? Mi estas nek vagabondo, nek ĉarlatano…
- Oni kondamnis vin, kiel senkulpulon!
- Ĝi ankoraŭ ne estas kaŭzo al tio, ke mi mensogu kaj mistifiku. Soldato, amiko mia, batalas, obeas, kaj se necesas, li mortas.
- Tio estas en ordo. Provu serĉi la farintojn, kaj se ĝi ne sukcesos, tiam anonciĝu. Eĉ tiel vi povos morti trankvile. Pri tio vi ne malfruiĝos.
- Ĉu ĝi estas tiaĵo, ke mi…
- Krome… vi kompromitus fraŭlinon Rouban-on.
- Kiel miksiĝus… ŝia nomo en la aferon?…
Ŝtipulo vidis, ke li komencis atakon ĝustaloke.
- Ni ricevis la indikojn de ŝi, bezonatajn al la komedio. Ĝi tre interesos la membrojn de la tribunalo. Kiel ni sciis la militajn sekretojn, koncernantajn la aferon? Kaj eble… oni torturkonfesigus ŝin…
La kapitano ĝemis.
- Teruraj uloj vi estas.
- Ne tiel grandmezure. Neniam ni havis diamant-minejon, kaj ni sentas tiel, ke nun jam alvenis ĝia tempo.
- Sed… kiel vi komencos tion?… Vi havas nek monon, nek ekipaĵon.
- Mi ŝtelos ĉion – instigis lin Ŝtipulo. – Mi estas sperta pri ekonomiaj aferoj.
- Ĝi ne estas tiel, amiko mia. Vi ne rajtas ŝteli kaj mensogi apud mi.
- Eĉ iomete ne?… – li demandis malgaje – ĉar, mi havas kapopafon…
- Tiam vi ne povas veni kun mi…
- Sed… ĝi jam resaniĝas… Ĉu vi do decidis, sinjoro kapitano?
- Jes. Mi provos trovi la verajn kulpulojn!
- Mi sekvos vin ĉien!
- Se la vojo ne sukcesos, mi memvole iros en la prinonon.
- Escepte tien…
- En ordo. Kaj nun gvidu min, amiko mia, ĉar mi ne estas sperta pri fuĝo kaj kaŝiĝo.
- Supren la kapon, sinjoro kapitano! Pri tiu fako mi povus malfermi prosperan katedron en la universitato. Nun ni malaperos tiel, kiel la ora horloĝo.
- Kiel?… Mi avertas vin, ke tiu mistifiko baldaŭ evidentiĝos. Ni povas danki la ankaŭ momentan, avantaĝan situacion nur pro la sugestiveco de la sceno, sed la konfeso tiomloke estas mankohava, primitiva, ke post nelonge oni divenos la veron.
- Tiam ni jam estos la *honoraj* membroj de la legio.

Oka ĉapitro

La problemo komenciĝas tie,
ke virino estas en la afero.

1

La kapitano kaj Hopkins la Ŝtipulo vere fariĝis honoraj legianoj. Interesa titolo kaj karaktero. La tuta okazis tiel, ke Hopkins jam la matenon de la proceso kalkulis tion, ke eble baldaŭ nedezirata interesiĝo montriĝos rilate lian personon. Tial matene li iris al la urba komandejo.

Li vizitis en la kontoron de la bataliono de la legio, kie oni postenigas la alvenintajn rekrutojn, kaj li iris al juna leŭtenanto.

Tiam li jam portis uniformon de kapitano. La oficiro tuj salte leviĝis kaj rapidis por akcepti lin.

- Nur sidiĝu, amiko mia – diris Ŝtipulo… – Tiel… dankon… mi ne cigaredas… mi fumas nur cigaron… – La leŭtenanto tuj sendis soldaton por cigaro. Li timis iomete. Kion volas la kapitano? Ĉu li venis kontroli?…
- Ordonu pri mi, sinjoro kapitano.
- Mi estas kapitano Delarcon, de la ĉefstabo. – Jam delonge li demetis la nomon Mander. Ĉi tie aperas tiom da soldatoj ĉiutage, ke liaj spuroj forviŝiĝas, kiam li elpaŝos de ĉi tie. – Du novegaj knaboj vizitis min hieraŭ. Ies patro iel havas parencecon kun mia edzino. Antaŭ nelonge ili dungiĝis al la legio. Estante stultaj knaboj, ili ne sciis, ke estas malpermesite iri vizite de la haveno, kaj surbordiĝinte ili venis al mi. Nun mi reakompanos ilin en la kazernon. Sed mi ne ŝatus, se ili ricevus punon… Do ni konsideru, ke ili povis foresti laŭ mia ordoni pro milita afero.
- De kiam ili estas en Oran?
- Unu tagon. Ili ankoraŭ ne havas uniformon kaj ne ĵuris.
- Tial verŝajnas, ke la suboficiro faris raporton pri ilia foresto, kaj oni registras ilin, kiel dizertintojn… Do mi skribos deĵoran kvitencon, per ĝi iros glate ĉio ĉe la kompanio. Bonvolu viziti la divizion D en la strato Sadi Carnot, numero 7, kaj laŭ la deĵora kvitenco oni elstrekos ilin el la registro…
- Dankon… Ĝi estos bona.

La leŭtenanto plenigis bluan papereton. Li skribis sur ĝi, ke senrangaj soldatoj Varins kaj Linge, laŭ la ordono de la batalionestro, pro militafero, forlasis la kolektiĝejon en la haveno. Hopkins iris al la adreso strato Sadi Carnor, numero 7, por ke oni elstreku la nomon de la legianoj el la registro. Li enpoŝigis la bluan papereton kaj aperis en la proceso.

Posttagmeze, kiam li konvinkis kapitanon Laméter, ke estos pli bone, se li akceptos la pretan situacion, li jam sciis, kien fuĝi, se evidentiĝos la mondskandala mistifiko, kaj ĉiuj policanoj de la kolonio persekutos ilin.

Ilifariĝos *honoraj* legianoj.

…En la posttagmeze varmego ni sidadis dormeme kun Alfonso la Neniulo antaŭ la kantino. Nun ni povis ripozi iom. La sangon de la novaj rekrutoj glaciigis serĝento Potrien kaj la suboficiroj.

Subite ni vidas, ke la gardostaranto transprenas bluan papereton, li staras flanken, poste… malvarma frostotremo kuras tra mia korpo: enpaŝas la kapitano kaj Hopkins la Ŝtipulo en civila vestaĵo. Ankaŭ Neniulo vidas ilin.

- Mi varmas – diras Alfonso la Neniulo indiferente.
- Jes… – mi respondis kaj ekfumis cigaredon. La kapitano ekvidas nin, li faras unu movon al ni, sed Ŝtipulo kaptas lian brakon kaj kuntiras lin. Li montradas, kvazaŭ la kapitano estus surda.

Kia mistifiko ĝi estas denove?

- He, rekrutoj! Ĉu vi serĉas ion? – krias Alfonso al ili.
- Ni tovos ĝin ankaŭ sen via helpo – respondas Ŝtipulo malĝentile, poste li gestadas per sia mano kaj kuntrenas la kapitanon.

Kion signifas tiu gestado?

Ni lokiĝas komforte kaj pigre sur la benko, ni suprentiras eĉ niajn krurojn, tiel ni sidas, ŝajne indiferente. Kio ĝi povas esti? Ĉu oni persekutas ilin? Ĉu ili dungiĝis al la legio?… Se Hopkins ne venis al ni, tiam estas problemo. Ĝi signifas tion, ke li ne volas miksi nin en la aferon.

Bladaŭ kaporalo de sapeistoj venis tien. Li alparolis la soldatojn, tumultiĝantjn ĉirkaŭ la kantino.

- Kiu konas la norvegan lingvo el vi?

Je mia plej grnada surprizo Alfonso la Neniulo leviĝis.

- Mi!
- Venu kun mi!

Ili iris. Mi sekvis ilin je kelkpaŝa distanco.

La fortikaĵo St. Thereze estas milita formikejo. Precipe nun, komence de la pluva sezono, kiam komenciĝas la operacioj. Spahioj, sapeistoj, legianoj, senegalaj, nigraj pafistoj, eĉ annamitaj soldatoj, alvenintaj per ŝipo el Hindoĉino svarmas en la granda korto de la fortikaĵo. Iu kompanio venas, la alia iras. Oni senarmigas, ekipas, dividas, postenigas la homojn de disigitaj taĉmentoj, do ĝi estas la kolekt-baseno de la armeo, tumultado, kriegado, ekzercado, formarso kaj lego de la nomlisto, kun babela akompan-muziko.

Hopkins la Ŝtipulo kaj la kapitano staradis malantaŭ la kantino pacience.

- Ĉu vi estas norvego? – demandis la serĝento de Neniulo.
- Jes.
- Demandu, kien vi estas postenigitaj

Alfonso, kiu parolas en ĉiu lingvo de la mondo per leĝere eleganteco, diris ion al la kapitano.

- Ĉu vi dungiĝis al la legio?

La kapitany, kiu bone parolis la nordajn lingvojn, diris:

- Ne. Ni nur envenis kun komisia bileto. Mi opinias senespera, ke ni povos kaŝiĝadi ĉi tie.
- Kial vi faras, Hopkins, tiun komedion per tiu gestado, kaj kial ni diras, ke ni ne scias france?
- Ĉar neniokaze mi mensogas. Tiam proponis via amiko, ke mi tute ne parolu, kaj li diris pri mi, ke mi estas norvego, kiu ne scias france. Mi bedaŭras, se mi miksis vin en la aferon.
- Ni ĉiel estas en ĝi.
- Nu?! – deamndis la serĝento malpacience.
- Tiu homo rakontas tre interesajn aferojn. Li estas norvega popolkantisto, kiu tial dungiĝis al la legio, ĉar li estas altestimanto de Francio, kaj li ŝatus ricevi violonon, por ke li povu kelkfoje muziki.

La serĝento kaptadis aeron pro kolero

- Vi estas frenezulo! Demandu lin pri tio, kian postenon li havas?

Ŝtipulo ekparolis.

- Ĵus kiam mi renkontis lin, li venis ĝuste de la regimentikuracisto. Sanitara soldato diris tion.

Alfonso komprenis ĝin. Li interŝanĝis kelkajn vortojn kun la kapitano. Poste nelonge mi eksciis, ke ili parolis jene tion:

- Ĉu vi ne scias, sinjoro kapitano, kion volas Ŝtipulo?
- Li ŝatus eniri en la hospitalon.
- Ĝi ne estas bona, ĉar ĉio evidentiĝos dum la akcept-registrado.
- Ankaŭ mi samopinias.
- Sed eblas fari alian aferon… – Li turnis sian al la serĝento: – Li diras, ke li alvenis per tiu ŝipo, kie iu malsaniĝis je ĥolero…
- Kiel?!… Diru al tiu ĉi frenezulo, ke li tuj anonciĝu ĉe la desinfektejo… Kaj ankaŭ la dika kanajlo iru kun li… Mi men akompanos ilin. Antaŭen! Antaŭen!… Tian friponaĵon.

La serĝento malaperis kun ili.

- Kial vi sendis ilin en la desinfektejon?
- Tie ne estas identigo, registro, kontrolisto ne iras tien, oni aranĝas la aferojn dum momentoj, kaj tiom da vestoj kaj aĵoj troviĝas tie, ke mi trompiĝus pri Hopkins, se li ne ŝtelus ion.

Sed pri Hopkins ne trompiĝis amiko, kiam tiu kalkulis lin. Vespere ni ekvidis Ŝtipulon en la kantino, li kartludis kun la bluaj husaroj en la prunokolora uniformo de la sudanaj infnterianoj, kaj ankoraŭ steleto estis sur lia kamizolo, kio vere estas bela komenco de militista kariero, se ni konsideras, ke antaŭtagmeze li ankoraŭ estis civilulo.

- La pordon! Idioto!- li alkriaĉis min, kiam mi enpaŝis, ĉar forta vento blovis el la direkto de la maro. – Kiu dismetas la katrojn…? Neniu havas manon, ke ĝi rompiĝus, kiomfoje oni ne fermas la pordon… Mi havas kvar damojn, mi gajnis… ok soldoj estas la banko… Ne malĝoju, kanboj! Supren la kapon! La fortuno en la kartludo estas sanĝiĝema…

Tio veras, sed ne tiam, kiam Hopkins la Ŝtipulo miksas la kartojn. Sed la ludpernteroj ne sciis tion. Hopkins ŝvitis, cigaris, dismetis, mendis vinon kaj gajnis la soldojn, konsolante kaj kuraĝigante la ludantojn per sia raŭk, forta voĉo. Li tute ne rigardis sur min.

Kiam Alfonso la Neniulo enpaŝis kaj rigardis lin, li diris:

- Kie vi lasis la norvego?
- Ĉu?!… – li demandis bruske.
- Kie vi lasis la norvegon?! Ĉu eble vi estas surda?

Unu steleto ne multe gravas ĉi tie, precipe el alia soldatarspeco.

- Pri kia norvego vi parolas?! Mi konas nenian, fian eksterlandanon, kaj fermu vian buŝon, ĉar mi rompos vian kapon, vi, kampulo… La pordon! – li kriegis, sed lia voĉo mutiĝis, ĉar Potrien enpaŝis.
- Kiu estis tiu? – li demandis minace.

Silento.

- Ĉu vi ne aŭdis?! Kiu hurlis?!
- Mi!

Mi lepaŝis. Kion fari? Ŝtipulo riskis sian vivon, mi maksimume kalk-tagan enkarcerigon. Vane, Potrien ĉiupaŝe renkontis min, kiam li estis kolera.

- Nu… Do vi malvarmas! "Potrien", demandos la sinjoro kolonelo, "kian novan ekipaĵon vi proponas por la legio"? Kaj mi anonciĝos: "kelkajn peltmantelojn, ĉar estas iu, kiu malvarmas, kaj mi ne ŝatus, se li havus nazkataron…"

Mi staris tiel, ke mi kovru Hopkins-on. Ĉar se Potrien rekonos lin…

- Nun iru sur la ekzercterenon kaj rastu ĝis vespero por alkutimiĝi iom al la venta vetero.

Kolere mi iris por la rastilo kaj komencis rasti. Iom pli poste mi ekvidis la kapitanon en la vestaĵo de la sanitaraj soldatoj, surbrake kun ilia rubando. Li kunportis litotukojn en la hospitalon.

Mi mansignis al li. Li venis tien iom maleme.

Mi gestadis, ke li donu cigaredon al mi. Dum la ekfumo, mallaŭte, sen buŝomovo mi diris:

- Hopkins estas en la kantino.
- Mi scias.
- Kiel statas via afero?
- La dikulo ekiris vestojn, kaj nun ni iradas tiel. Sed pli-malpli poste oni rimarkos la trompon. Nun la deponisto donis al mi blankaĵojn, ke mi portu tiujn en la hopsitalon…
- Baldaŭ estos iel. Nia kompanio ekmarŝos pos dek tagoj.
- Kien?
- En Senegalon. Mi scias tion de la skribisto. Ni aliĝos al marŝkonolo, kiel antaŭgvardio. Okazos ofensivo.
- Ĉu tamen… – li flustris malgaje.

Suboficiro proksimiĝis. Mi geste signalis al la kapitano, kaj mi deturniĝis…

Baldaŭ Alfonso venis tien…

- Ni devas fari ion kontraŭ Potrien.

Ni sidis sur la muron de la fortikaĵo, de tie bone videblis, se proksimiĝis suboficiro. Trans la muro kondukis ŝoseo tra aleo al la urbo, ĉaroj, aŭtoj, piedirantoj rapidis, ke ili atingi tion ĝis vespero.

La vento pelis la polvon antaŭ si funele.

- Kion vi volas fari, rilete Potrien-on? – mi demandis.
- Ni devas fari ion, ke li ne okupiĝu pri ni konstante, ĉar… Kio ĝi estas?…

Mi ja ĵetis min tra la muro per unu salto. Bonŝance la gardisto estis ĝuste ĉe la turniĝejo. En la sekva momento mi kuregis sur la vojon, sekvante homon…

La Turka Sultano venis tiudirekten!

Vi povas imagi, kion mi sentis ekvidinte la Turkan Sultanon, kun liaj hoka, granda nazo, longa lat-staturo kaj maldikaj gamboj, similaj la tiuj de cikonio, sur kiuj trolarĝis la tuboj de la pantalono.

Kaj kia pantalono! Mi estas iom sperta pri la sinjora vestiĝado, multaj homoj opinias min mondulo – kaj ne sen iu kazo –, do se mi asertas tion, ke la vestaĵo de la Turka Sultano povintus esti inda al veraj aristokratoj, tiam vi povas kredi ĝin trankvilanime. Inter lia pantalono, farita el stria ŝtofo kaj liaj blankaj, tolaj ŝuoj kun blua enmetaĵo streĉiĝis helflavaj maleolŝirmiloj sur liaj piedoj. Tiel pitoreska eleganteco eĉ ĉe tre altrangaj grandsinjoroj estas maloftaĵo. Sur lia brikoruĝa, hejma jako pendaĉis sufiĉe grandaj, orumitaj butonoj, kaj li portis blue punktitan, blankan bantokravaton al sia griza, silka ĉemizo.

Nek reganto povis vesti sin kun superkolora eleganteco!

En lia mano (mi ĵuras, ke ĝi estis tiel!) li tenis ĉapelon! La Turka Sultano eĉ ĉapon ne povis porti en la haven-kvartalo, ĉar ĉiu policisto estus legitiminta lin, pro la nekutime lukso. Sed ĉapelo?! Perfekta, blanka, mola pajloĉapelo?! Kaj gantoj?! Eĉ promenbastono! Do ne plumba kaj ne guma, sed promenbastono! Tiuj multe de admirindaj cirkonstancoj, preskaŭ pridubis lian personan identecon! Bonŝance perfidas lin liaj senordaj, buklaj, farungrizaj, blankiĝantaj, longaj haroj, kiuj eĉ nun hirte pendaĉas sur la mezon de lia frunto, sed tiel, ke oni povus pensi lin ebria filmaktoro aŭ duonidiota portret-pentristo, kiu pruntepreniis sufiĉe elegantan vestaĵon de inteligenta kliento.

Sed li estas tiu! Li estas tiu, kiu plurfoje lasis siajn amikojn en peĉo, li trompis ilin, kiu staris apud fiajn kanajlon kontraŭ ni, kiu estas komplico de malnoblaj embuskmurdistoj, kiu rompis la solan, grandan leĝon, kiu eĉ en la krimula mondo distingas la morale bonan kaj malbonan homon: la komplican solidarecon.

Ne gravis por mi forlasi la fortikaĵon sen permeso, ke Potrien senfeligos, aŭ li buĉos min glave: trovite la Turko!

Mi kuregis zigzage inter aŭtoj kaj ĉaroj, sed kvazaŭ li estus sentinta la danĝeron, li turniĝas flanken.

Kaj li ekvidas min.

Por momento ŝajnis, ke liaj bruvoj suprenkuras ĝis lia verto, kaj ili haltas ie ĉe lia nuko.

Poste, kiam mi jam preskaŭ estus atinginta lin per mia etendita mano, li kuregas!

Antaŭen!

Mi estas bona kuranto. Per la ora medalo distingita konkurasanto de la Korpekzerca Klubo de la Policaj suboficiroj en Kolombo, kiu kuras cent jardojn dum dek kvar sekundoj, li diris tion, ke li ne estus atinginta min sen dorsovento, kaj eĉ tiel nur tiam, kiam li trifoje alpafis min.

Mi do estas sportisto. Sed la Turka Sultano kun siaj longaj gamboj, similiaj al tiuj de cikonio kuris, kiel ĉamo. Ambaŭflanke de la ŝoseo estas dezerto. Li ne povas eskapi… Autoj zigzagis preter mi, sed mi zorgis pri nenio, ĉapelo, gantoj kaj bastono jam longe ne estas en liaj manoj… Per grandega salto mi feliĉe displatigas la pajloĉapelon, kvazaŭ ties mastro kuŝus sur la vojo…

Nu atendu…!

La homoj gapas post nin…

Ni jam atingas la antaŭurbon… La sistanco iom malpliiĝas… La koro kaj la pulmo estas gravaj faktoroj dum kurado. La energion al la moviĝo servas ne la muskoloj, sed la spirorganoj, almenaŭ la kuracisto de la prizonula hispitalo en Rio de Janeiro diris tiel.

La longaj gamboj de la Turkla Sultano per ĉiam pli malregulaj kaprosaltoj provis pligrandigi la distancon, sed vane… Mi atingos lin en la mallarĝa strato, kaj sekvos la terura venĝo!

Li jam apenaŭ havas forton kuri… Li returniĝas spiregante, senkonsila timo sidas sur lia vizaĝo…

Hop!… Nun li saltas tra la pordo de ejo… Ĝi estas kafejo, aŭ ancamuzejo, aŭ tiaĵo… Ŝajnas, ke li volis veni tien…

Ek post lin!…

Dudek paŝoj, kaj ankaŭ mi atingas tien. Eleganta kafejo… Mi ensaltas. Kie li estas?

Tie, apud mi! Mi nur devus etendi mian manon, sed anstataŭe mi rigidiĝas en streĉa staro, kunbatante miajn maleolojn, mi mansalutas.

La fripono sidas ĉe la tablo de kapitano kaj majoro. Li spiregas iomete…

- Amokulo… persekuris min… – rakontas al siaj samtablanoj. – La malsano eksplodis sur li en la araba kvartalo…

- Ĝi ofte okazas en tiu ĉi sezono, precipe inter la indiĝenoj… – rimarkas la majoro, preterkure kapbalancinte al mi. – Do, sinjoro barono rakontu la aferon…

Kiel? “Sinjoro Barono??!” Ĉu tiu ĉarlatano simple fariĝis “sinjoro barono”?…

Mi iras iom flanken. Ĵus alvenas kelnero al la drinkejbreto kaj diras stentore:

- Mazagran-on al la sinjoro barono, duoble…

Mi glutis. La Turka Sultano kiel barono, kun majoroj! Granda friponaĵo kaŝiĝas malantaŭ tio.

- Ĉu vi deziras ion?

- Viskion…

Bongustis la freŝa drinkaĵo al mi. Dume mi ne deprenis miajn okulojn de sur la Turka Sultano. Se li sidos du tagon ĉi tie, mi atendos tion. Mi estos sur lia spuro, ĝis ni ne staros vid-al-vide unu kun la alia, ni duope!… Fine ja li ne estas alfiksita al la oficiroj!…

- Sinjoro…

La kelnero staris apud mi.

- Damo ŝatus paroli kun vi.

Mi sekvis la rigardon de la negra knabo. En iu loĝio, en la obskura fono de la ejo sidis virino.

Sed kia virino! Haltis mia spiro. Ŝia speciala, malhel-violkolora, silka robo eble estis farita en la plej eleganta, pariza tajlorejo. Per sia eta, neĝe blanka mano ŝi ĵus levis cigaredon al sia buŝo, kaj dum ŝi enspiris ies fumon, ŝiaj belaj, grandaj, nigraj okuloj fermiĝis. Ŝiaj admirinde longaj okulharoj grandarke elkliniĝis el inter la palpebroj… Do… ŝi estis tiel eksterordinare bela virino, ke mi ekmiregis.

Mi tuj iris tien, kun mia denaka, leĝera, sinjora korpoteno.

- Eksidu, sinjoro – diris la virino, post kiam mi prezentiĝis. – Mi estas grafino La Roschelle.

Mi ne sciis, kion respondi.

- Mi vidis vin enveni, kaj mi atentis, kiam vi sidis vid-al-vide tie. Vi havas honestan, virecan vizaĝon.

La virino parolis sencera-voĉe, sed cetere ŝi povintus veki nenian suspekton, kion ŝi diris, ĉar vere mi havis kuraĝan, honestas kaj virecan vizaĝon. Tio jam okulfrapis ankaŭ al aliaj homoj.

- Mi ne scias, kiel – ŝi daŭrigis –, sed mi sentis tiel, ke vi kuraĝe entreprenus, se virino petus vian helpon, minacata de granda danĝero.

- Vi povas esti certa pri tio! – mi respondis entuziasme, kaj la mondo preskaŭ mallumiĝis antaŭ mi pro tiu stranga bonodoro, kiu ĉirkaŭŝvebis la virinon. – Grafino – mi daŭrigis –, vi ne povas peti de mi tiaĵon, ke mi ne staru feliĉe kaj ĝis mia lasta sango apud vin

- Mi petas nur tion, ke vi akompanu min hejmen. Eblas, ke dungitaj murditoj kaŝatendas min survoje. La legianoj ĉiuj estas ĝentilaj homoj…

- Vi povas esti trankvila, mi defendos vin…

- Jes… ankaŭ mi pensas same. Vi havas tiel inteligentajn, esprimplenajn okulojn.

Vere estis tiel. Jam ankaŭ aliaj diris, ke en miaj okuloj estas ia speciale inteligenta kaj esprimplena.

- Kaj kiuj estas tiuj, kiuj kaŝatendas junan virinon, irantan hejmen?! Kiaj malnoblaj, fiaj ulaĉoj povas esti tiuj…

- Dungitaj sikarioj!… Nun mi ne rajtas rakonti pli…

- Mi ne volas esplori viajn sekretojn, grafino!

- Dankon. Nu do iru antaŭen, kaj atendu min ekstere.

Mi preterpasis la tablon de la Turka Sultano. Miaj manoj pugniĝis, sed kion fari?

Virino petas mian helpon. Mi devas iri! Post kelkaj minutoj ŝi estis apud mi, sur la strato, la grafino.

Jam estis vespero. Ŝi gvidis min ne al la interna urbo, sed rakte al la malborda promenejo, kie troviĝas la vico de la vilaoj de la grandsinjoroj.

Mi vidis neniun, kiun mi povintus supekti.

Kvankam la vico de la vilao de la grandsinjoroj estas sufiĉe senhoma vespere. Tre malofte preterveturis nin kelkaj aŭtomobiloj.

La virino haltis antaŭ grandega konstruaĵo, simila al kastelo.

- Mi alvenis hejmen… – ŝi diris. – Ŝajnas, ke via akompano fortimigis la atakantojn. Vi estas ĝisosta, batalema viro! Kvazaŭ vi estus reviviĝinta statuo.

Vere estis tiel. Mi havas virecan, muskolan fortikan staturon. Ĝi okulfrapus eĉ el inter mil homoj.

- Tiuj ratoj, kiuj kaŝatendas virinojn, ĝenerale estas malkuraĝaj – mi respondis, kun mia denaska, natura modesteco.

- Ĝis kiam vi havas forpermeson?

Hm… Potrien nun jam eble estas nervoza.

- Mi ne havas forpermeson. Mi saltis tra la muro de la fortikaĵo.

- Ĉu vi dizertis?

- Ne tute. Se mi anonciĝos ĝis la morgaŭa vespero, tiam ĝi kalkuliĝas senpermesa forlaso de la fortreso. Kaj mi anonciĝos eĉ hodiaŭ.

- Ŝe ĝi estas tute egale… Mi invitus vin volonte trinki tason da teo…

Kaj ŝi mallevis siajn okulojn. Ŝajnas, ke mi forte impresis ŝin.

- Feliĉigus min, grafino – mi respondis respektoplene, kun tiu sento, ke mi devus unugenuiĝi.

- Tiam venu…

La pordegenirejo malfermiĝis al grandega, bruna, intrazia ĉambrego. Paradvestitaj lakeoj rapidis antaŭ min en brial lustrolumo. Kia pompo kaj lukso.

Miregante mi iris apud ŝi sur la ŝtuparo.

Sur la muroj estis kolore brilantaj, kvadratforme tegitaj pentraĵoj laŭ ties tuta grandeco, larĝo kaj longo. Ĉar mi ofte vizitis altrangajn societojn, mi scias, ke tiuj mur-pentraĵoj havas la nomon gobelino. Oni kulturiĝas, kiam oni vivas socian vivvon.

Ĉiuscpecaj lum-brakoj elstaris, kaj reliefaj flormotivoj ornamis la plafonon, tielnomtaj feskoj. Se tiuj defalas kaj malpruiĝas, tiam kiu ajn muzeo pagas altan sumon por ili.

Ni trairis tre multe da ĉambroj, ĝis fine en malpli granda, intima salon la lakeo, kiu iris antaŭ ni, li eklumigis starlampon, kovritan per flava, silka lampoŝirmilo. Ĝi lumis per milda, familieca, varma lumo, kaj la malpli proksimaj anguloj de la ĉambro restis obsukraj.

Post nelonge la lakeo aperis denove kun ĉareto, en kiu oni kutimas porti bebojn, sed sur ĝi estis vitrotabulo kun trinkaĵoj, keksoj kaj cigaredoj.

- Vi povas foriri Louis.

Kiu jam multfoje vizitis altrangan societon, nur tiu scias, kiel elegante estas tie, kie oni nomas la lakeon Louis.

Ŝi proponis al mi viskion, ni cigaredis kaj konversaciis.

- Kara John – ŝi diris kaj kliniĝis al mi super la apogilo de la brakseĝo. – Hodiaŭ vi faris tre grandan servon al mi. Mi neniam forgesos tion…

- Ba… Ĝi estis vere bagatelo. Mi bedaŭras, ke mi ne povis lukti por vi, grafino. Kredu min!

Mi volonte estintus kuratakinta kompanion da spahioj por pruvi, kiel mi amas vin! Ŝi apenaŭ trinkis, sed mi malplenigis per unu gluto kvar glasojn el la bongusta viskio.

Baldaŭ kun impona kuraĝo mi klinis min sur ŝian manon, kiel ĝi ripozis sur la brakapogilo, kaj mi kisis ĝin…

Ŝi ne kontraŭis…

Suprenrigardinte sur ŝin, mi vidis, ke ŝi mallevas siajn okulojn kaj ridetas. Sed kia rideto ĝi estis!

Tiu virino ridetis tiel, kvazaŭ ŝi estus ploranta. Mi do nomis ŝin en mi: “la ploranta-ridanta grafino”.

- Vi estas kuraĝa, sed vi ne ofendis min, ĉar vi ne estas tudiĝema…

Ĝi estas tiel. Mi iomete pliproksimiĝis kun la brakseĝo, sed la piedoj de la malbenita meblo korĉ-implikiĝis kun la tapiŝo, ke mi preskaŭ renversiĝis, kaj mi debatis la botelon de la viskio pro la embarasa situacio.

- Pardonu min…

- Ĝi vere estas bagatelo… Antaŭnelonge ĝi same okazis ankaŭ al markizo Valois.

Ĝi vere okazas ankaŭ al eminentaj sinjoroj. Fine kaj tio gravas, mi sidis en ŝia proksimo. Mia koro batis tiel forte, kvazaŭ ĝi estus elsaltonta tra mia kamizolo. Mia gorĝo tremis, kaj ĉiu vejno streĉiĝis ĝiskreve en mia cerbo pro la odoro de la jasmena parfumo, ŝvebanta al mi.

- Kial… vi dizertis el la kazerno? – ŝi demandis kaj kliniĝis tra la brakseĝo, ke ŝi preskaŭ ektuŝis min.

Mi povis nur balbutaĉi.

- Mi vidis kanajlon… de sur la ŝtonmuro, kaj mi komencis persekuti lin…

- Kiel vi venis tien… en la kafejon, poste…

- Mi sekvis lin… ĝis tie…

Dume, kiel zorgema dommastrino, ŝi plenigis la viskion fervore, kaj mi trinkis, ĉar la drinkaĵo faras la homon agrabla konversacianto.

- Estas varme ĉi tie…

Ŝi ĝemis, ekstaris kaj iris al la ornamita kameno. Mi ĵuras, ke mi ankoraŭ ne vidis pli belan staturon, similan al ŝi. Kaj ŝia paŝado, ĝi estis preskaŭ muziko, kun ties elasta, malrapida ritmo.

…Poste ŝi fortepianis kaj kantis… Mi ankoraŭ ne travivis tian plezuron. Profesiaj, drinkejaj kantistinoj povintus lerni de la grafino.

Kiam ŝi finis la kantadon, mi genuiĝis:

- Grafino… plej volonte mi mortus pro vi – mi flustris kun simpleco de viro. Kaj… kaj…

Jes… Ŝi karesis mian klinitan kapon afable. Mi torporiĝis ĝis miaj kalkanoj pro tiu ektuŝo.

- Mi scias… Mi ne konas vin, John, sed mi sentas, ke vi estas kuraĝa, firmkaraktera, grandanima kaj saĝa…

For la ĉapelon antaŭ tia homkonantino!

- Aŭskultu min… – ŝi daŭrigis. – Mi konfidas al vi mian plej sanktan, plej grandegan sekreton…

- Ho, grafino…

- Jes! Mi bezonas iun, kaj vi estas tiu karaktero… kiu… je la unua ekrigardo… Do…

- Vi povas fidi min, kiel vin mem, grafino.
- Aŭdkultu do min… Mi patro estis diplomato.
- Mi konjektis tion!
- Kiel?
- Vi havas tiom da aristokratan ĉarmon, ke nur dipomato povis esti via patro.
Mi diris tion.
- Dankon… Vi estas ne nur kuraĝas, sed klera.
Ŝi diris tion.
- Sed nun atentu min, mi petas. Mia patro fariĝis viktimo de politika intrigo senkulpe. Virino preparis la insidon kontraŭ li. La hispana princino Annunziata Ermagnola. Mia patro rakontis sian sekreton al ŝi, kaj tial li devis fuĝi. Mi pensas, ke vi jam aŭdis similajn historiojn.
- Kompreneble. Simila afero okazis al cigno-kavaliro Lohengrin, sed tie la virino ne estis hispana, sed oper-kantistino…
Mi kaptis la okazon veki favoran opinion pri mia klereco.
- Simila afero – ŝi diris mirante kaj ridis.
- Kial vi ridetas, grafino?
- Ĝi estis amara rido… – ŝi respondis serioze. – Nur tiel mi povis savi mian patron, ke mi etendis mian manon al grafo Larochelle… Kvankam mi malamis lin…
- Horore!
- Mi ne longe eltenis la teruran naturon de la grafo. Li turmentis min kun senbaza ĵaluzo, kaj li gardis min en sia fortikaĵo, kiel kaptiton.
- Fia ulaĉo…
- Kaj iun tagon mi fuĝis…
- Saĝe!
- De tiam mi vas en teruro… Li faras ĉion por perforte reporti min en sian fortikaĵon…
- Ĉu la polico permesas tion?
- Grafo Larochelle estas granda sinjoro! Lia frato estas ministro.
- Nu kaj? Ministor ne ordonas la tutan landon.
- Lia juna frato estas prefekto ĉe la polico!
- Tiu veres estas granda sinjoro… Mi konas kelkajn prefektojn… socie… Ili estas tre vervaj homoj…
- Nokte mi ne kuraĝas iris sur la straton, eĉ tage mia vivo estas plena de timego… Oh, John… nun vi scias mian sekreton… Vi estas la sola homo…
Ŝi ĝemis. Larmoj tremis en ŝiaj okuloj. Ŝi estis tiel bela, kaj tiel malfeliĉa.
- Grafino! – mi kriis entuziasme. – Ekde hodiaŭ vi ne estos sola! Mi ĵuras tion!
- Dankon, John…
Kiel ŝi staris antaŭ mi, ambaŭmane ŝi prenis mian vizaĝon kaj rigardis min tiel. Mia lango estis tiel seka, kiel ligno, kaj mi vidis el la kontraŭa spegulo: sur mia vizaĝo dikfingre ŝveliĝis vejo super mia brovo.
Mi ĉirkaŭbrakumis ŝin.
Ŝi lasis tion… Eĉ… ŝi klinis sian kapon sur mian virecan ŝultron… Ankaŭ ŝia hararo eligis jasmenan odoron…
- Mi amas vin… – mi flustris duonfreneze
- Oh… John… ĉu vi ne vidas… ke ankaŭ mi am…
Mi kisis ŝin dum la duone eldirita vorto…
- John… – ŝi diris profunde ĝemante. – Mi komprenas, ke vi estas malkonfida…
- Sed grafino!
- Diru, ke Nora!
- Nu… Nora…
- Mi rakontis mian sekretojn… Foje… se vi vere amas min, kaj vi fidas min, ankaŭ vi rakontu ĉion, ke abolute nenio disigu nin…
Mi hontis. Tiu virino blinde fidis min, ŝi estis sincera kaj sindonema. Mi sekretadas…
- Grafino… Nora… Grafino Nora. Ankaŭ mi rakontos ĉion, ĉion.
- Ho, ne kredu, ke ĝi estas scivolemo…
- Tute ne… estas bone tiel, ke ankaŭ mi rakontu la grandan sekreton, en kies mezo…
Iu frapetis.
Ŝi salte leviĝis el mia sino timiĝinte.
- Kiu estas tiu?
- Telefono…
La lakeo, nomata Louis venis kaj portis telefonon sur pleto, sur kiu pendis longa kablo.
Nur en tre eleganta loko okazas, ke oni portas la telefonon sur pleto.
Ŝi levi la aŭdilon al sia orelo.
- Jes… – ŝi diris nur tion. – Ankoraŭ ne… sed jam certas… Ne… Bone… Mi atendas vin… Ĉu per aŭto?… Bone… Bonan vesperon.
La lakeo eliris.
- John… nun mi devas renkonti iun. Malnova amiko de mia patro venos ĉi tien per aŭto… Atendu… ĝis kiam… mi parolos kun li…
- Se eble mi longe estis ĉi tie , tiam vere…
- Ne… ne… mi ne scias, kiam mi revidos vin… – ŝi respondis, kaj denove sekvis kisoj…
Baldaŭ la lakeo frapetis denove.
- Mi rapidos – ŝi flustris kaj lasis min sola.
Mi eltrinkis glason da viskio. Mi eksidis en la fotelon kun vertiĝanta kapo. Subite aŭdiĝis mallaŭta frapeto.
En la transa angulo de la ĉambro, apud la lampo, mi vidis nur nun, pordo estis tranĉita en la tapeton, kaj papereto ŝoviĝas sub tio kun stranga bruo.
- Kio do ĝi estas?!
Mi iris tien kaj levis la paperon. Jen tio estis skribita sur ĝi:

"Kara Ŝinketo!
Vi, idiota ĉevalo, kiu vi estas! Tiu virino estas danĝera ŝorĉistino. Ŝi ekspluatas, ke orgojla homo falis en sian reton. Ne parolaĉu! Forportu vin de tie ĉi, ĉar povas okazi tre facile, ke iu simple mortpafos vin. Minimume oni kuntrenos vin. Vi sidas en peĉo. Vi ne konas ŝin, ŝi estas danĝera sorĉistino.

Ne sciu kiu."

El la letero mi sciis post la unua vorto, ke la Turka Sultano skribis ĝin. Ĝi estas mensogo de ties komenco ĝis la fino.
Rapide mi malfemis la tapetitan pordon. Mi kaptos la kanajlon!
Mi estis en malgranda ĉambro. Kompreneble la fripono fuĝis.
Sed kiel li envenis ĉi tien absolute?… Kaŝe…
En la sekva ĉambro mi haltis kun mirego por sekundo.
Ĝi estis dormoĉambro kun ĉielbluaj, silkaj muroj. Meze pendis lucerno, obtuza lumo radiis el ties ruĝa lampo.
Sur la transa flanko estas malfemita pordo… Kurteno kovras ĝin… Aŭdiĝas malproksima parolado…
Mi iris tien piedfingre… Trans la kurteno sekvis budoaro, kaj de tie malfermiĝis tiu ĉambro, kie oni parolis. Same kurteno kovris ĝin.
Mi rekonas ŝian voĉon!
Tiun malgajan, profunde muzikantan, delikatan, melodian vortabundon, kiu sonas-sonoras filtiĝante tra la nazo, kiel ia lulkanto.
Ŝi diras ĝuste tion:
- Mi sukcesis facile trakti tiun ŝlemilon, kaj se via ekscelenco ne venintus, mi jam scius ĉion.
Hm… ĉu eble pri kiu temas?

Hm… eĉ ebe pri kia temas?
Nekutime basa, trankvila voĉo de viro respondis.
- Tamen mi devis paroli kun vi, sinjorino Mander…
Ĉu sinjorino Mader? Ĉu ŝi ne estas grafino?… Kiel?!
Ja… Mander… estis tiu kapitano, kies rolon ludis Hopkins la Ŝtipulo
Rapide, piedfingre mi rapidis tien.
Ili estis duope, en la malgranda salono. La onidira grafino kaj…
Eĉ mia spiro haltis!
Markizo de Surenne, la registara komisaro.

3

Mi ne skribis pri tio. Kvankem oni bone konas lin ĉi tie. Markizo de Surenne estis admiralo, plenrajtigita, kolonia, registara komisaro. Firmkaraktera, servera soldato. Kontraŭo de la divizia genarlo De la Rouban, kiu laboris per la rimedoj de la diplomacio kaj pacenco. Lia longa, blanka hararo, penetraj okuloj, razita, energia vizaĝo estis ĝistede enua en Afriko.
La grandega, aglonaza admiralo sidis vid-al-vide al la ploranta-ridanta virino.
- Ĉar lastfoje la hontindan trompon – diris De Surenne – post la proceso rilate la aferon de Laméter vi malkaŝis malfrue, vi havas multon rebonige fari en tiu afero. Ĉu vi trovis la spuron de la komplicoj?
- Iu el ili ĵus estas kofesota. Li estas sufiĉe granda stultulo, orgojla, malvashorizonta ulo, kiun mi pridemandos facile.
…Vi povs imagi, kiel mi staris tie? El kia alteco mi falis? Mi kaj stultulo! Kun mia denaska modesteco…
Ho, kiel doloris mia koro…
Do la kiso, la brakumo, la bonodora ĝemo, kiel ŝi kliniĝis al mia vizaĝo, estis mensogo…
- Estu singarda – diris la registara komisaro. – Ofte evidentiĝas pri la plej stulta homo, ke li estas tia ne en ĉiu situacio.
- Li estas fidinde idiota.
- Mi do petas vin, sinjorino, estus sincera. Ĉu vi scias ion pri la afero?
- Mi scias, ke la fongi-anoj tenas la ekspedicion en kaptiteco. Ilia ĉefo estas fripono.
- Kio estas la pruvaĵo?
- La taglibro de Mander, kiun ricevis divizia generalo Rouban antaŭ nelonge.
- Jes… jes, sed tiu nederlanda bankiero, Van der Ruffus, ankaŭ li agas kontraŭ ni…
- La maljuna bankiero havas molan koron.
- Mi kredas, se vi diras. Vi devas scii tion
- Van der Ruffus helpis min en mia ĝena situacio, sed cetere li plie estas mia malamiko, ol mia amiko.
- Mi petas vin… tio ne koncernas min. Mi venis por informoj.
- Via ekscelenco forgesis, ke vi promesi kvardek mil frankojn, se…
- Se estos utila, kion vi diros.
- Bone. Mi fidas vian promeson. Do Laméter trovis neatanditajn helpantojn.
- Kiuj ili estas? – demandis De Surenne.
- Tri aventuristoj. Ili estas sufiĉe danĝeraj internaciaj uloj, sed ili ne povos esti utilaj al li en tiu ĉi afero.
- Nur laŭ la faroj oni eblas prijuĝi la homojn. Kion vi pensas, kio okazis al la kapitano Mander, la vera?
- Iu mortpafis lin. Verŝajne la komplicoj de Laméter mortigis lin. Ankaŭ tiun ulaĉon, namatan Hopkins iu vundis, kaj oni vestis lin per la vestoj de la mortinta kapitano. Tiel li miksiĝis en la aferon.
- Ne multe valoras viaj informoj, sed mi volas tion, ke vi sentu vin devontigita… Jen prenu…
Kvardek mil… Li ĵetis kvar-dek-mil frankojn tien.
La virino kaptis ĝin kun brilaj okuloj. Kiel ŝi ŝatas la monon!
- Vi estos kontenta pri mi via ekscelenco – ŝi respondis. – Se tiu soldato donos bonan spuron, tiam unue mi informos la militan policon por agi senprokraste.
- Bone… – La registara komisaro ekstaris, kapbalancetis al la virino kaj foriris.
Ankaŭ mi iris… Reen en la ĉambron. Hoho… Ni vidos, ĉu mi estas stultulo?!…
Baldaŭ venis ankaŭ ŝi.
- John… – ŝi flustris – ne koleru, ke mi atendigis vin…
- Karad grafino… – mi respondis kun ĝuste tiel amanta voĉo, kvazaŭ nenio estus okazinta.
- Nun mi estas nur la via… neniu ĝenas nin.
- Kaj… kaj mi rakontos ĉion sincere… Sed ĉu vi amas min? – mi demandis.
- Tre…
. Grafino… Mi scias tiel grandan sekreton… kio… kio povas kosti la vivon de pluraj homoj, kaj kion ŝatus scii po mil homoj…
- Ĝi estos enterigita ĉe mi…
Mi agis tiel, kvazaŭ mi estus pensanta.
- Nu? – ŝi demandis ekscitite
- Grafino… mi rakontos tion… se jam mi scios certe, ke nia amo estas vera kaj plena…
- Ĉu nun vi ne sentas tion?…
- Jes… Tamen… Ni atendu, ĝis nenio disigos nin de tio, ke ni rakontu ĉion sincere.
…Ŝi ĉirkaŭprenis, kisi, brakumis min… Oh kiel domaĝe, ke tiu virino, kiel la Turka Sultano karakterizis ŝin bone: estas *sorĉistino.*

4

…Aŭrore ŝi sidis antaŭ miaj piedoj kaj klinis sian kapon sur mian genuan, kiel ia flatema katido.
- Nun rakontu al mi… kavalerio mia.
Mi eltrinkis glason da drinkajo.
- Eksciu, grafino, ke mi konas la kaŝejon de kapitano Laméter….
- Oh!
Kiel ŝi miris. Kiel ŝi ŝajnigis la surpriziĝon.
- Jes. Kun miaj du amikoj mi savis lin
- Kiuj estis ili?
- Iu estis dika knabo, tiu ludis la rolon de la kapitano, kaj li fuĝis sur ŝipo, kiu liveras muskaton sur barĝo el Oran al Rus-Ĉuk tra la Nigra Maro.
- Kaj la alia?
- Li nomiĝas serĝento Potrien, el la legio… Iam li estis mia samlernejano, kaj dum la milito li soldatservis sub la komando de Laméter…
- Jes… – ŝi spiregis.
- Li estis la iniciatinto de la afero. Li havas bonan kontakton kun la kantistino, kaj tiu kaŝas Laméter-on en kelo, inter lavitaj vestoj, sur la avenuo Maréchal Joffre, numero 9.
- Oh… mi ĵuras, ke ĝi restos inter ni… Nun adiaŭ… Mi esperas, ke baldaŭ mi revidos vin.
Mi iris sur la straton kun vertiĝanta kapo…
Ke mia ebria kapo, ebria por la multe da viskio, resobriĝu, mi eniris en la plej proksiman drinkejon kaj eltrinkis kelkajn glasojn da rumo. Poste mi ripozis iomete kaj haste tralegis la ĵurnalojn.
Mi havas tempon. Nun jam mi aŭ elturniĝos, aŭ mi ricevos tridek tagojn da puno en obskura ĉelo, katenita per kurta ĉeno. Sed mi eltruniĝos!
En la ĵurnalo estis tre interesaj novaĵoj.
La klopodo de divizia generalo Rouban por la paco de la regiono de Senegalio ne pruviĝis sukcesa. La fongi-aj negroj eĉ plu neis, ke ili scius ion pri la membroj de la ekspedicio aŭ pri la diamant-minejo. Sed multe da pruvaĵoj estas kontraŭ ili. Precipe kapitano Mander, reveninta el la kaptiteco, kies nomon lastatempe misuzis ĉarlatano. La vera kapitano, kiam li estis survoje el Senegalio, malaperis. Sed la taglibro kaj la mapo, kiu signalas la vojon de la ekspedicio, alvenis perpoŝte, kaj ĝi klare pruvas la kulpecon de la tribo fongi. Admiralo De Surenne denove komencas agi kun sia konata vervo por gvidi esploran kaj pun-ekspedicion. Divizia generalo Rouban certe ricevos gvidan postenon ĉe la armeo en Hindoĉinio. La fortamana politiko de la registara komisaro restarigos la aŭtoritaton de la kolonia armeo, kiu suferis fiaskon rilate la diamant-minejon en Senegalio.
Kie estas la minejo?
Kie estas la ekspedicio, kiu malaperis?
"Nia ĉiu respekto estas tiu de la bonfida, idealista divizia generlo Rouban, kiu eble baldaŭ forlasos sian afrikan postenon… Kaj ĉiu nia entuziasmo estas tiu de markizo De Surenne, kiu restarigos la malnovan, militistan reputacion de la francaj kolonistoj per sia pli severa politiko…"
Tiel oni skribis en la ĵurnalo.
La tuta kritiko odoris pri la okazonta fiasko de la divizia generalo Rouban. Krome montriĝis la antaŭsignoj de baldaŭa pulvo- kaj sang-odoro, pri kio la sinjoro ĵurnalisto ni sciis.
Jen tiel mi pensis.
Mia kapo bele resobriĝis pro la multe da rumo, kaj mi ekiris al la milita komandejo. Estis la sesa horo matene.
- Mi ŝatus paroli kun altranga oficiro – mi diris al la gardostaranto.
- Kial?
- Se mi dirus tion al ĉiu frenezulo, tiam mi ne volus paroli kun la oficiro…
La gardostaranto ankoraŭ murmuris ion, poste li vekis la dejoranton.
La oficiro butonumi sian kamizolon kun dormemaj okuloj kaj rigardis sur min tiel, kvazaŭ li dezirus, ke mi iru en la inferon.
- Kion i volas.
- Fari raporton, mon adjoutant.
- Pri kia afero?
- Spiono volis ruze allogi min.
En la kazernoj de la kolonia armeo estas videblaj ĉiuspecaj tabuloj:

HOMOJN, SUSPEKTEBLAJN PRI SPIONADO
TUJ RAPORTU AL LA MILITA KOMANDEJO!

- Parolu!
- Virino invitis al si dirante, ke ŝi estas grafino La Rochelle, kaj se mi liveros indikojn al ŝi pri militista krimafero, tiam ŝi donos monon al mi...
- Atendu! Tiu raporto apartenas ne al mi. Eksidu en la alia ĉambro, dum mi telefonos al la koncerna loko.
Mi sidiĝis en la alia ĉambro.
La oficiro venos post nelonge:
- Antaŭen!
Ni enaŭtomobiliĝis ĉe la pordego. La oficiro diris nenion, kaj mi ne rajtis demandi. La aŭto kuregis kun ni jam ĉirkaŭ kvaronhoro.
Kien ĝi portas min? Ni forlasis la antaŭurbon de Oran, ni veturis sur la marbordo, preter platanoj kaj oleander-arbustoj. Fine ni haltis antaŭ ruĝa, fortikajsimila konstruaĵo, ĉirkaŭita per altaj kradoj.
Du stiletaj gardistoj postenis ĉe la pordego.
- Avizu oficiron Jouhac al la divizio D.
Ankaŭ mi sciis tion, ke ĝi estas la kontrŭspionada divizio.
Sed estas tute ne simple eniri tien. Nek por oficiro. Li staras tie kaj atendas, dum iu gardisto avizas lin.
Majoro malsuprenvenas. Li estas maldika soldato kun flava haŭto, brilaj okuloj, mallarĝaj lipoj. Mi ne scias, kial, sed mi pensas pri tio, ke estas malbone al tiu, kiun li koleras.
- Dankon, sinjoro leŭtenanto…
La oficiro salutas kaj iras. Mi paŝas tra la pordego kun ambivalanecaj sentoj.
Kiam mi staris en la kelodora, malnovega, duonluma antaŭhalo, malantaŭ mi kun la malvarmkonduta, flav-vizaĝa majoro, mia koro iomete kunpremiĝis.
Ni iris senvorte, sur volbaj koridoroj, tra senhomaj trairejoj…
Armita gardisto staras ĉe ĉiu turniĝejo, krada fer-pordo estas ĉe ĉiu trairejo, kiujn oni malfermas kaj fermas kaj denove ŝlosas malantaŭ ni…
Ni iras pli kaj pli profunden, sekvas aliaj ŝtuparoj. La krepusko estas ĉiam pli densa, la aero ĉiam pli malvarmiĝas sur la mucidaj koridoroj, inter dikegaj muroj.
Kien li kondukas min? Ĉu eble oni enkarcerigos min?… Oficiala ejo ne estas en la kelo, tio certas…
Ĝi estas la "Ruĝa Citadelo". Mi jam aŭdis pri tio. Kiu venas ĉi tien, por tiu ĉesis la nocio de la tempo. Spionoj kaj ribeluloj, politikaj aventuristoj malaperas ĉi tie. Laŭdire oni ne multe demandadas pri tiaj homoj, kiujn oni vidis lastfoje veni ĉi tien…
Sed kion oni volas de mi?…
Ni iras malsupre sur lakoridoro de la kelo. Dekstre kaj maldeksre estas kradaj pordoj. Po unu homo sidas aŭ staras en ĉiuj malvastaj ejaĉoj, fermitaj per krado. Vizaĝe al la muro… Po unu persono en ĉiu ĉelo.
Spionoj kaj patrujperfiduloj!
Odoro de salpetro kaj mucidaj ĉifonoj pezas la aeron de la koridoro… Ĉiu gardisto signalas per kunbato de siaj maleoloj, ke li slutas.
La majoro diras nenion. La plimulto de la senvizaĝaj malliberuloj, starantaj en ŝiriĝintaj vestoj, kovritaj per polvo de la brikoj, estas timige maldikaj.
Sur ilia maleolo videblas dika ringego kaj kelfoje grincado… Ili ĉiuj estas katenitaj…
Kvazaŭ mia gorĝo iom kunpremiĝus…
Oni malfermas duoblan ferpordon, kaj ni denove estas en la ŝtuparejo. Nun ni iras ĉiam pli supren sur la ŝtupoj sub niaj plandoj.
Kien kondukas min la majoro?
Tiam io trafulmas mian cerbon subite. Kial ni malsuprenvenis ĉi tien, se ni denove iros supren? Ĉu nur tra la malliberejo oni povas iri sur la etaĝon?
Hoho!
Estu prudenta, Ŝinketo! Tial vagis la majoro kun vi tra la kelo, por ke vi timiĝu! Kiu trapasas ĉi tie, tiu venas antaŭ la pridemandanton anime rompita. Kion li decidis, kion li volas mensogi, tiu fariĝos balbutaĉo sur la vojo tra la kel-prizono kaj mutaj. koridoroj, malantaŭ la flava majoro
Atenton!
Mi rektigis min kaj klopodis ŝajni indiferenta… trankviliĝi interne…
La koridoro kondukis tra krudaj, malsekaj rok-volbaĵoj…
La gardisto ŝirmalfermas pordon. Ni alvenas en malgrandan ĉambron. Kelkaj oficiroj salte leviĝas. La majoro mansignas.
Viro kun revema rigardo kaj timiĝinta vizaĝo, en ŝiriĝinta vestaĵo sidas meze de la ĉambro. Liaj vangoj estas enkaviĝintaj, liaj manoj tremas.
Grandega oficiro staras antaŭ li en ĉemizo. Ĉe la tablo skribas alia soldato, la plumos krepitas. Estas terura varmo.
Ni iris plu.
Mi estis tiel trankvila, kvazaŭ mi irus sur la strato. Mi jam sciis, pri kio temas. Mi rigardis la murojn kun intereso. La majoro turnis sin al mi. Iu lia brovo leviĝis iom pli alten, kiam li rigardis sur min.
Sed li diris nenion.
Nun jam ni pasis sur etaĝaj koridoroj kun farbitaj muroj kaj grandaj fenestroj. Kelkloke pendis bildoj aŭ tabeloj.
La majoro haltas antaŭ pordo, li frapetas kaj enpaŝas. Poste li revenas.
- Eniru!
- Mi rektigas min kaj enpaŝas. Vid-al-vide al la prdo, ĉe la muro, malantaŭ nigra skribotablo sidas la registara komisaro!
Nun mi vere timiĝis!

Naŭa ĉapitro

Ĉio implikiĝas

1

- Venu pli proksimen!
Du grandaj paŝoj… mi premas mian ĉapon al mia femuro, maleoloj klakas.
- Ĉu vi estas John Fowler?
- Jes.
- Laŭ la moknomo Ŝinketo, Plurfoje punita, neŝanĝebla kontrabandisto. Vi naskiĝis en Birmingham en jaro 1904, la nomo de via patrino estas Karolina Fidler, laboristino el Nederlando, via patro estas Gustavo Fowler, stiristo. Ĉu ĝi estas tiel?
- J…jes… ekscelenca moŝto!
Li ne legis la indikojn. Li diris ilin parkere! Dio mia… do tiuj… altrangaj sinjoroj… pri senranga soldato scias eĉ tion, ke li havis patrinon, li naskiĝis kaj… estas Fowler.
- Antau kvar jaroj oni fostrekis vin el la libro de maristoj. Kial?
- La rodkapitano ekbrulis en mia ĉeesto…
- Ĉu vi insultis lin?
- Mi jetis nur brulantan lampon al li.
- Kial?
- Li akuzis min pro delikto kontraŭ la sano. Li asertis, ke mi kunportis kontaĝon sur mia ŝipo.
- Ĉu tio ne estis vera?
- Mi raporta obeeme, mi ne estas kuracisto.
- Sed la rodkapitano diris tion, ke la koncernulo estas malsana.
- Nek la rodkapitano estas kuracisto.
Li rigardis min, kuntirinte sian iun okulon. Lia grandega frunto direktiĝis al mi kun atakema, saĝa trankvilo. Nun li mezuris min. Li trarigardis min.
Markizo De Surenne estis timige forta, respektopostula viro. Kiam li ekstaris, liaj ordenoj ektintis, lia rekta staturo iom antaŭenkliniĝis, kaj li rigardis tiel en mian vizaĝon. Lia densa, blanka prizorgita hararo etendiĝis ĝis lia nuko, tiel, kiel oni kutimas prezenti malnovajn, famajn scienculojn sur portretoj.
Li krucis siajn brakoj.
Kaj nun ni povas paroladi, amiko mia. Kion vi volas raporti?
- Mi faras raporton pri stranga afero al via ekscelenco, kiun mi ne povas prijuĝi kun mia simpla cerbo.
Li staris antaŭ min, kor-al-korpo.
- Ĉu vere vi havas tiel simplan cerbon? – Li frapetis mian frunton. – Eĉ tiam vi starus tiel trankvile ĉi tie, se vi scius, ke mi povas enrigardi ankaŭ en vian kranion? Ĉu? Nek tiam vi timus? Respondu, amiko mia!
- Eĉ tiam mi ne timus, mon excellence.
- Nu. Kiel vi motivas tion?
- Tiel, ekscelenca moŝto, ke legiano timas neniam kaj nenion!
- Hej! Amiko mia, ne preterparolu, ĉu vi aŭdas, kaj ne distordu la vortojn!
- Bonvolu aŭskulti mian raporton…
- Mi konstatas, ke vi komencis bone ĉe mi. Vi ne mensogis. Nun antaŭ ol vi raportus, mi faras kelkajn demandojn: kiel vi venis el via gardoservo en ununura kaŭĉuka mantelo en la vesperfeston de la gubernatoro?
- Iu pruntepetis mian vestaĵon.
- Kiu?
- Kapitano Laméter.
Kun granda paŝo li denove staris antaŭ mi.
- Ĉu vi scias, kian punon vi meritas pro tio?
- Okaze de indulgo dumviva kaptiteco en fortikaĵo.
- Ĉi sube… en la kelo… Ĉu vi ne fortimiĝis?
- Mi timas nenion.
- Kio okazis tiun nokton?
- Nur tiam mi eksciis, kiu estas Laméter, kiam mia vestaĵo jam estis sur li. Mi sevis lin al la vesperfesto por reakiris mian uniformon!
- Ĉu poste?
- Ne plu mi vidis lin.
- Ĉu vi diras tion je via soldata honorvorto?
Mi silentis.
- Mi atentigas vin, ke ni havas efikajn rimedojn, se iu silentas obstine. Malsupre en la kelo vi povos pensadi…
- Ekscelenca moŝto: tie sube sidas nuraj perfiduloj, almenaŭ estos iu, kiu tial venos tien, ĉar li ne volis fariĝi perfidulo.
Li rigardis min. Li iradis tien-reen kun manoj dorsenmetitaj.
- Vi estas hazard-ludanto, amiko mia, sed ne stulta. Kaj ĝisoste viro. Domaĝe, ke vi baldaŭ rompos vian kolon. Laméter estas patrujperfidulo! Ĉu vi scias?
- Laŭ mia opinio li estas senkulpa.
- Kiel?!… Ĉu vi kontestas, kion mi asertas.
- Ekscelenca moŝto, mi ne timas la kaptitecon en la fortikaĵo. Pro tiom da krimfaro mi jam entreprenis elmerititan punon, ke iam estus bone suferi pro la afero de vera homo. Bonvolu katenigi min, enkarcerigi, kvaronumi, kaj eĉ tiam mi asertas tion: Laméter estas senkulpa, senkulpa, senkulpa! La unusola vera Dio helpu min.
Li staris antaŭenkliniĝinte kaj fiksrigardis min.
- Bone… Min ne interesas, ĉu oni kaptos Laméter-on, aŭ ne. Ĝi estas la afero de la polico. Kion vi volas raporti?
- Damo en la kafejo invitis min posttagmeze. Ŝi kondutis tiel, kvazaŭ mi plaĉus al ŝi. Mi tuj vidis, ke ŝi trompas kaj ŝajniĝas.
- Hm… ĉu vere?
- Jes. Mi ne estas memkontenta homo. La virino invitis min al si, kaj ŝi konstante regalis min per krudaj laŭdoj. Sed mi travidis ŝin…
La registara komisaro rigardis sur min, kuntirinte sian maldekstran okulon, kvazaŭ li sentus, ke ia ruzeco latentas malantaŭ miaj vortoj, sed li ne scias, kio ĝi estas.
- Daŭrigu!
- Je via ordono. Ŝi diris konstante tion, ke mi devas scii pri Laméter, kaj ŝi ricevus tre multe da mono, se mi dirus tion al ŝi…
- Hm… Soldato… Vi ŝajnas tre sagacega…
- Mi raportas obeeme: mi ne komprenas vian ekscelencon.
- Vi… nun ĉi tie… elturniĝas el la malagrablaĵo. Mi ne scias, kial, sed mi sentas firme, ke ĝi estas tiel…
Li havis tian nazon. Li eksentis la aferojn.
- Mi parolas sincere.
- Ĉu vere?… Daŭrigu!
- Mi ŝatintus eksciis ion. Mi pensis, ke mi mensogos ĉion. La sinjoro suboficiro instruis nin pri tio, ke ni agu tiel, rilate la homojn, kiuj estas suspekteblaj pri spionado, kvazaŭ ni logiĝus, ĉar gajninte ilian fidon, estas facile malkaŝi ilin
- Jes. Ĉu vi sekvis tiun ordonon?
- Laŭvorte.

- Diru plu!
- Mi mensogadis ĉion, poste kompreneble mi tuj anoncis la aferon en la komandejo.
Nun okazis tute stranga afero. La resistara komisaro staris antaŭ min, li prenis mian nazon per siaj du fingroj kaj movis ĝin dekstren-maldekstren kun milda premo.
- Vi… Vi ĉarlatano, kanajlo, fripono… Vi! Vi estas orgojla, vanta ulo, kaj vi logiĝis fare de la bela virino. Sed iel vi reprudentiĝis kaj elturniĝis el la peĉo. Almenaŭ vi pensas tion.
Li okulmezuris min.
- John Fowler, ĉu vi volas transposteniĝi al la bluaj husaroj, en mian kompanion? Vi povas eniri en la suboficiran lernejon, mi zorgos pri tio, ke oni forgsu vian paseon. Ĝis nun mi proponis tion ankoraŭ al malmulte da homoj. Neniu el ili pentis tion. Ĉiam vi havos monon, kaj dependas de via kuraĝo kaj menso, kion vi atingos!
La bluaj husaroj ne akceptis kiun ajn eĉ por senranga soldato.
- Ĉu vi pensadas?
- Ekscelenca moŝto… mi estus feliĉa en via servo, sed se nun mi akceptus vian grandaniman proponon, mi ne estus honesta.
- Kaj kial?! Ĉu vi konspiras kontraŭ mi?
- Se vi ordonas, kiam ajn mi oferos mian vivon por via servo.
- Ne parolu, kiel advokato, vi… sprite ruza, skota sagaculo! Parolu sincere! Ĉu vi estas membro de mafio, kontraŭ mi?
- Mi ĵuras, ke ne!
- Se vi ne konfesos tuj ĉion, mi forkondukos vin en la prizonon, kaj vi restos tie! Dum vi vivos! Ĉi tie ne bezonatas vedikto! Ĉi tie je unu vorto matene oni mortpafos vin sur la remparo, kaj oni publikigos en la ĵurnaloj nur tion: “Je la ordono de la registara komisaro estis ekzekutita John Fowler, la malamiko de la respubliko!”
- Mi scias tion bone, ekscelenca moŝto. Sed mi ne meritus vian ĵusan grandanimecon, se nun mi perfidus miajn amikojn pro timo.
Jen tion mi diris!
- Vi povas respondi ĉion, amiko mia! Tio ne estas kutima en la armeo… Nu bone…
Li diris tion.
Mi konfesas, ke mi sentis varmon, dum li tamburis sur la tabulo de la sonorilo per siaj longaj, ostaj fingroj.
- Vi povas foriri. Sed se vi ankoraŭfoje implikiĝos en la plej malgrandan suspekton, tiam ne estos pardono. Vi jam certe aŭdis pri mi, amikom mia. Mi preferas la kuraĝajn homojn, sed mi ne konas indulgon kontraŭ miaj malamikoj. Ĉar tiuj estas la malamikoj ankaŭ al la patrujo. Ĉu vi komprenas?
- Jes, ekscelenca moŝto.
- Iru do sur tiu ĉi vojo, nur konspiru kontraŭ mi… Vi reprudentiĝos malfrue… Forportu vin!
Mi falis en belan situacion: Senrangulo, kiun koleras markizo De Surenne, la registara komisaro.
- Kial vi staras ankoraŭ ĉi tie?
- Mi raportas obeeme, se mi revenos, mi devas anonciĝi al pridemandado. Ĉu mi rajtas rakonti ĉion ĉi al la serĝento, kio okazis hodiaŭ?
- Ne!
Rapide li skribis kelkajn liniojn sur paperon kaj stampis ĝin.
- Jen prenu!
- Dankon, ekscelenca moŝto.
- Forportu vin!
Mi ekspiris profunde, kiam la bonkora antaŭtagmeza sunbrilo denove ekkaresis mian vizaĝon…
Kaj mi estis lebera! Dio mia, donu nur tion, ke mi neniam plu revenu ĉi tien. Mi mortu libere, en la dezerto, aŭ sur la maro, inter malvarmaj, salaj ondoj, eventuale pro rapida flava febro (sed se eblas elekti, tamen prefere sub libera ĉielo, kaj laŭeble ne en nuba vetero), nur ĉi tien mi ne revenu, kie demandas homoj kun malvarma rigardo en obskuraj ĉambroj, kaj poste oni reakompanos min en la kelon, kie la arestitoj devas stari vizaĝe al la muro…
Kiel feliĉiga, belega bruo estas la sonorileto de tramo ie en la proksimo!…

2

Oni atendigis min en la gardistejo apud la pordego, ĝis Potrien alvenos. Li diris, ke ĝi devas esti tiel…
- Vi bele sidas en la kaĉo – diras kompate Juvel, iu gardisto.
- Ni vidos tion.
- Cetere Potrien havas malbonan tagon. Aŭrore alvenis aŭto kun oficiroj kaj forportis lin kaj la kantistinon. Vi scias, kun kiu onidire li havas intiman rilaton.
- Ĉu oni forportis lin?
Mi tre miris pri tio. Kion oni volas de la bona, olda Potrien? Kaj de la kantistino?
- Ne pasis unu horo, ke li revenis. Nek liaj lipharoj staris bone. Ŝajnas, ke li havis malagrablaĵon.
- Hm… Interese.
Aperis Potrien.
Li avizaĝo etis taŭzita, kaj liaj hirtaj brovoj konvulsiis. Li blovis kaj spiregis, kiel tigro saltonta. Poste li ekŝrikis, ke la fortikaĵo ektremis pro tio.
- Kie vi estis, honto de la armeo?!
- Mi raportas obeeme, mi estis en la urbo pro grava afero.
-Ĉuu… Kaj se la ekscelenco de la urba komandanto iun tagon venos inspekti, kaj li trovos nur min en la fortreso, li diros: “kara Potrien, kie estas nia simpatia Oran-a garnizono?…” Respondu senrangulo, kion mi diros tiam?
- Mi raportas obeeme, mon sergeant vi diros tion: “ili havas multe da afero en la urbo, sed eblas, ke baldaŭ ili revenos…”
- Impertinentulo! – Haste li etendis sian manon al la glavo.
Dum momento ŝajnis, ke mia vivo pendas sur hareto.
- Pro tio vi staros antaŭ la militan tribunalon! Nepriatestita foresto, provo de dizerto…
- Jen estas la priatesto de la foresto, mon sergeant.
Mi transdonis la papereton.

“La senranga soldato numero 21, je mia ordono, ĝis la hodiaŭa antaŭtagmezo pro militista afero restadis en la urbo.

divizio “D” de la Ĉefstabo
markizo De Surenne,
registara komisaro.”

Por minuto lia vizaĝo fariĝis violkolora. Laŭ mia opinio li estis en serioza vivdanĝero.
- Rompez… fripono… Rompez, ĉar mi dishakos vin…
Tiu tago mi opinias, estis la plej obskura periodo de la vivo de Potrien. Servosoldaton li sendis por 30 taga karcerpuno en la kazerno, ĉar tiu ne portis rimenzonon, kaj li ordonis al prizorganto de ĉevaloj plenumi dudek kvar horan deĵoron, ĉar li trovis olemakulon sur iu buŝbridaĵo. Ĝi estis la signo de profunda melankolio ĉe Potrien.
- Kie vi estis?
Alfonso la Neniulo staris apud mi.
- En la urbo. Pro militista afero. Ĉi tie mi ne povas paroli pri tio.
Ni staris. Diablo forportu, ĉi tie ne eblas paroladi. La homoj svarmegas en la grandega fortikaĵo.
Ĉu vi ne vidis dikan soldaton ie?
La demando koncernis Hopkins-on, li sciis tion.
Evidentiĝis, ke Ŝtipulo la tentas kiel sanitara soldato en la alia parto de la konstruaĵo. Li akompanas Laméter-on kiel malsanulon dum la tuta tago. Se iu ekvidas ilin, li tuj rapidas kun la kapitano en iun hospitalon aŭ laboratorion kaj ekzamenigas tiun. Oni jam prenis sangon de li, faris rentgenbildon pri li, priradiis lin per kvarclampo, kaj li ricevis kelkajn vakcinadon kontraŭ tifo, ĥolero kaj flava febro. Ili freneziĝos…
Ni iris en la kantinon kaj trinkis, kion alian ni povis fari? En teura bruo, ĉiu reprezentanto de la franca soldatarspeco svarmis ĉirkaŭ ni.
- Kie vi estis nokte? – demandis Alfonso la Neniulo.
- Mi sekvis la Turkan Sultanon
…La kanton “Ca ira” kantis multe da ebriaj soldatoj kaj batis la tablon. Fumo, bruo, raŭka kriado, vin- kaj ŝvitodoro ŝvebis en la kantino
- Multe da strangaj aferoj okazis nokte. Virin-historio… Mi devas urĝe paroli kun vi…
La vizaĝo de Alfonso la Neniulo nubiĝis por momento. Li signalis okule al iu proksima tablo.
- Tie sidas iu. Li atendas min pro virin-historio.
Mi rigardis tien. Malalta, magra, pala homo li estis kun elstaraj vangoostoj. Liaj ardaj, brunaj okuloj gluiĝis al mia amiko.
- Ĉu li atendas vin?
- Jes. Li volas mortigi min.
Li eltrinkis glason da virno.
- Virin-historio – li diris kun stranga vizaĝo. – Ĝi ne signifas bonŝancon… Kaj… Eĥ, egalas! Atendu min ĉi tie… Mi serĉos la dikulon kaj la *norvegon*.
Li foriris.
La homo kun ardaj okuloj nun rigardis min.
Mi malaestimas la kverelemajn homojn. En tiu ĉi mondo ili estas ĉiam intrigantoj, tromemfidulj, rilate sian forton faras ĉiun malbonon. Sed fine ja mi trovis tiel nekomprenebla tiun konstantan rigardadon, ke mi diris ĝentile al li:
- Kial vi gapas min?
La flava homo ekstaris kaj venis al mia tablo. Vera, interbatiĝema karaktero, ĝis estas malbona trajto.
- Ĉu vi parolis al mi?
- Ĉu eble vi estas surda? – mi demandis kompate.
- Parolu en konvena voĉo kun mi!
- Iru en la inferon – mi respondis eviteme.
Tiam li vangofrapis min, ke mi falis sur la plankon, kuntreninte tablon, seĝon, glason, kaj dum minutoj ĉio mallumiĝis antaŭ mi.
Kiun ajn vi povas demandi: mi estas sperta pri la vangofrapoj. Sed pri tia survango eĉ sonĝi mi ne povis. Kvazaŭ la plafono estus falinta surmin.
La publika spektaklo vekis ĝeneralan plaĉon, multaj homoj aplaŭdis la flavan homon, kaj rpunita mondĉampiono, kiu servis sian kvaran jaron, asertis je sia honorvorto, ke li vidis tian vangofrapon nur dum la olimpiaj ludoj en Stokholmo, dum la boks-matĉo por ĉampionoj. Ĉaplehava homo ricevis ĝin de la deĵoranta polica suoficiro sur la spektoteraso.
Kiam mi ekstaris, li tuj batis denove, sed mi saltis flanken, kaj mi prezentis al miaj kamaradoj maldekstraman, rektan baton. Mi povas diri malmodeste, ke oni respektas miajn maldeksramanajn batojn de la Arkta Maro ĝis la Hinda Oceano kaj en Melbourne eĉ nun ĉiu konas Takamaku-on, kiu laŭ la nomo “La sovaĝa taŭro de la pampoj”, kiel profesia boksisto turneis en la mondo, sed de kiam mia maldekstraman, rekta bato trafis lin, li okupiĝas pri vendado de galanteriaĵoj kaj bildkartoj.
Oni levis la verŝ-stablon de sur la flav-vizaĝulo, per vinagro oni ĉesigis la sangadon kaj aplikis artefaritan spiradon ĉe li.
Dume oni iel-tiel reordigis la ejon.
Jam vesperiĝis, kiam la koncernulo malfermis siajn okulojn. Mi sciis, kio konvenas laŭ la societaj formalaĵoj, mi do paŝis al li.
- Mi opinias, ke estas la plej urĝa la tempo prezentiĝi. Mi nomiĝas Ŝinketo…
- Mi… ĝojas – li diris, kiel tio eblis pro siaj ŝveliĝintaj lipoj. – Sandro Mazzea…
- Ĉu vi estas portugalo?

- Hispano…
Ni eliris el la kantino. Estis infera bruo. Alvenis ĉaristoj.
- Mi gratulas pro via vangofrapo. Mi apenaŭ aŭdas per mia maldekstra orelo – mi ĝentiladis.
- Bagatelo. Mi iom malfortiĝis, dek monata servo en Saharo, ĝi estas grava afero. Iam mi donis tute normalajn vangofrapojn… Sed via maldekstramana bato estas pompa.
- Domaĝe, ke ĝi deglitis – mi respondis modeste –, cetere ĝi estus pli bone sukcesinta…
Ni ekfumi cigaredon. La aero vibris pro la stentora kriado de furiozaj suboficiroj. Oni maljungis la ĉevalojn kaj demetis la mitraloj de sur la muloj.
- Kian problemon vi havas, rilate mian amikon – mi demandis.
- Mi mortigos lin…
- Mi timas, ke ĝi ne iros glate. Alfonso la Neniulo estas la plej danĝera homo en la mondo.
- Eblas, ke mi mortpikos lin el dorsdirekto, aŭ kiam li dormos, sed tio certas, ke mi mortigos lin.
Li elspiris la fumon trankvile, kvazaŭ konsiderante en si mem, kion li elektu.
- Kian kaŭzon vi havas por fari tion?
- Li mortigis mian fraton.
- Hm… tiaĵo povas okazi… Alfonso estas tre kaprica homo…
Iu ekparolis apud ni en la mallumo, kiun ni ne aŭdis proksimiĝi. Nur Alfonso iras tiel senbrue.
- Ĉu la sinjoroj interkonatiĝis? Ĝi estis superflua.
La flav-vizaĝulo foriris. Alfonso postrigardis lin. Mi ne ŝatintus, se iam li postrigardus min tiel. - Ĉu vi vere mortigis lian fraton?
- Ne… Venu. Ni parolos *kun ili.*
- Ĉu ĉi tie… en la fortikaĵo?
- Jes… Jam estas konvena loko.
Li ekiris, kaj mi sekvis lin.
- Tiu flava homo diris, ke li mortigos vin.
- Malfacila afero. Lia frato, kiu mortis, etis mia plej bona amiko.
- Li pensas, ke vi mortigis lin.
- Rajte. Ĝi okazis per mia revolvero.
Hm… Tio estus ankaŭ al mi suspektinda.
- Mi ankoraŭ al neniu parolis pri mia paseo, Ŝinketo. Sed mi ne volas, se eble tiu frenezulo mortigus min, oni dirus, ke Alfonso la Neniulo embuske mortpafis sian amikon… Ĉu vi silentos pri tio, kion mi nun rakontos?
- Vi povas fidi min
- En Lisabono… mi loĝis, kaj bela, katalana, juna kamparanino purigis la klinikon…
- Ĉu vi estis malsana?
- Kiel?… Jes… Tiu knabino nomiĝis Katarina, ŝi havis nur dek kvin jarojn. Sed ŝi estis admirinde bela. Dum purigado ŝi kantis, ŝi havis belegan voĉon… Mazzea kaj mi komencis okupiĝi pi ŝi. Ŝi ricevis belan vestaĵon de ni, kaj ni ne zorgis pri tio, ke Katarina estas servistino, kaj infano nur de kaparanoj. Andreo Mazzea, la frato de tiun flav-vizaĝa Mazzea, edinigis ŝin. Mi pensis, ke mi freneziĝos. Sed mirinde la virino kondutis tiel, kvazaŭ ŝi amus min. Foje ŝi diris, ke ŝi tial edziniĝis al Mazzea, ĉar Andreo ĵuris, ke li mortpafos min, se Katarina ne edziniĝos al li. Fine ni decidis fuĝi kune en Sud-Amerikon. Mi atendis ŝin en Barcelono, dum la tago de la ekveturo de la ŝipo. Post kiam ŝi alvenis, mi legis en la ĵurnaloj, ke oni trovis Andreon Mazzea-n mortintan, kun trapafita kapo. Mia revolvero kuŝis apud li.
Dume ni trairis la grandegan, senhoman ekzercterenon. Nur tie kaj ĉi tie vagadis kelkaj soldatoj…
- Sed kiu do mortigis… Mazzaea-n?
- Katarina.
Ĉu vi jam aŭdis tiaĵon? Dek ses jara knabino. Ĉar tiam ŝi jam havis tiom da jaroj. *"Jen"*, dirus iu mia favorata klasikulo, *"kien venigas virinon la flirtemo"*.
- Kial vi ne rakontas la veron al tiu ĉi malalta frenezulo?
- Li ne kredus tion, kaj… mi ne volas, ke li persekutu Katarinan. Mi estis freneza. Ŝi diris al mi, tial ŝi suspektigis min per murdo, ke tiu sekreto eterne ligu min al ŝi. Ĉar se mi forlasos ŝi iam, tiam ŝi pendumigos min… Mi aŭskultis kun vertiĝanta kapo, ke ŝi tiom amas min… Nur kiam ŝi forlasis min, mi serĉesploris ŝian paseon. Ĉar tiu dek ses jara virino havis paseon… Se oni iam estingos mian vivkandelon, tiam vi scios la veron, Ŝinketo, kaj rakontu tion en la havenoj…
- Ĝi estas tre malbela krim-historio, sed en miaj legaĵoj rolis sinjoro, nomata Lohengrin, kiu poste fariĝis cigno sen ĉiu transiro, kaj mi bone tiris el tio la instruojn de la trompiĝo: ni estu singardaj, rilate la virinojn.
Ni pretériris la muron de la tombejo. Ankaŭ ĝi troviĝis interne de la fortikaĵo. La fortreso Therese estas aparta urbeto. Stratoj, domoj, ekzercereno, kinejo, tombejo, etkomercejo, hopitalo: ĉio estas en ĝi.
Ni iris al la gardisto de la tombejo. Alfonso montris al li papereton.
- Kio ĝi estis? – mi demandis, kiam ni elvenis.
- Hopkins posttagmeze aliformiĝis al kontor-servisto. Havante krajono apud sia orelo, li galopis kun dokumentoj, Laméter sekvis lin, portante ledan aktujon. Li ŝtelis kelkajn konvenajn blanketojn kaj stampis tiujn. Nun ni estas la homoj de la ĝardenisto de la tombejo…
En la fino de la tombejo Alfonso la neniulo, kvazaŭ li estus hejmeniranta, li malfermis la enirejon de iu kripto. La ferpordo apertiĝis.
En la interno de la kripto, ĉe la lumo de lucerno kun eterna lumo, sidis Hopkins sur la katafalko de kolonelo Birerre, en uniformo de sensuspekta spahio. La kapitano iradis tien-reen malrapide en la aperta frenezula jako. Posttagmeze li kaŝiĝis inter la furiozantoj, ĝis fine Ŝtipulo helpe de konvena blaketo elvenigis Laméter-on el inter la frenezuloj por preni "cerbospinan likvaĵon".
Kion tiu homo kuraĝis, tio certe estas senekzempla en la mondhistorio. Li kuradis kiel civilulo tien-reen, surpreninte ĉiun ĉemanan uniformon, kaj antaŭ ol oni estus rekonintaj lin ĉe iu grupo, li kaŝiĝas en alia grupo en malsama uniformo, dume li manaĝeris en tiu absurda situacio ankaŭ la kapitanon, kiu ne povis ŝajnigi…
- Saluton, knaboj – li kriis afable, kvazaŭ li tute ne estus en kripto. – Ĉio iras glate! Supren la kapon!
- Silentu – mi rimarkis. – Dekses homoj laboras en la tombejo nokte.
La kapitano haltis, kaj dum momento li vindis la du baskojn de sia frenezula jako, kiel certaj artistoj, portantaj ruĝan togon en grekaj dramoj.
- Pli-malpli poste oni kaptos nin – li diris.
- Estus plej bone, se Ŝinketo rakontus, kio okazis nokte – proponis Neniulo.
- Ni volas aŭdi! – kriis hopkins entuziasme, kvazaŭ li estus instiganta la oratoron de komuna vespermanĝo.
Neglektinte kelkajn etajn detalojn, mi rakontis mian aventuron.
- Priskrubu pli precize la aspekton de la koncerna virino.
Mi rakontis ĉion, kio karakterizis la eksteraĵon de la laŭdira grafino.
- Kaj… de kie vi scias, ke… divizia generalo Rouban estas malsukcesinta homo? – demandis la kapitano pale?
- Tio estas sentebla ankaŭ el la ĵurnaloj… Oni jam adiaŭas lin.
- Ĝi signifas tion, ke multaj homoj mortos… superflue… Markizo De Surenne estas brava soldato… Sed nur soldato… La malamikoj de la divizia generalo Rouban bone ekspluatis la aferon de la malaperinta ekspedicio kaj tiun de la diamant-minejo. – klarigis Laméter.
- La militiro komenciĝos post horoj. Tio estas videbla laŭ la prepariĝo – diris Alfonso.
- Kontraŭ la senkulpa popolo fongi.
- Kaj se ilia senkulpeco evidentiĝus, antaŭ ol la unua pafo ektondrus? – mi demandis.
- Tiam… granda malfeliĉo forpasus super la kapo de tuta mondparto.
Fariĝis mallonga silento. Sur la sarkofago de la mortinta marŝalo per mallarĝa ombro dancis la brileto de la pala lacerno kun eterna lumo… En la krepusko la silueto de grandega kurcifikso faris timiga la fonon de la kripto, kie ĉiu vorto eĥis, kvazaŭ samtempe pluraj homoj ripetus ĉion laŭsone.
- Pensadu, sinjoro kapitano kaj ordonu pri ni – diris Alfonso.
- Ni ĵuris fidelecon al vi – mi aldonis.
- Vivu! – aliĝis Hopkins.
La rigardo de Laméter emociiĝinte glitis de sur iu homo al la alia.
- Dankon knaboj… Dio donu, ke vi ne vane estu je la dispono de vera afero tiel kuraĝe.
Li ekpremis nian manon unu post la alia.
- Nun unuavice ni devas scii, kiu estas tiu virino – mi diris –, kiu estas nia plej danĝera kontraŭulo.
- Ĝi ne estas sekreto – rimarkis Laméter.
- Kiu estas la koncernulino?
- Mia edzino – respondis la kapitano.
Ni longe silentis, konsternite, senmove.

4

La virino, kun kiu vi estis kune dumnokte – li turnis sin al mi – vere estas grafino La Rochelle. Tio estas la nomo de ŝia unua edzo. Baldaŭ ŝi eksedziniĝis de tiu certa grafo La Rochelle, kaj ŝi fariĝis la edzino de kapitano Mander. Foje kiam mi restadis sur la insulo Madagaskaro dum longa tempo, ŝi fuĝis kun mi per mia ŝipo. Mi edziĝis al ŝi en Parizo. Sed post kelkaj monatoj mi ricevis anoniman leteron kun tiaj indikoj… kiuj… do malgraŭ la anonimeco, ĉiu aserto de la letero estis pruvebla… Kaj… mi forlasis la virinon… Tiam ŝi denove portis la nomon de kapitano Mander, ĉar evidentiĝis, ke ne validis ŝia divorco. Ŝi aranĝis ĝin tiel… Poste mi ankoraŭ vidis ŝin kelkfoje… ŝi konstante estis en la societo de Van der Ruffus. Li estas riĉa, bonanima, nederlanda bankiero, li donis multe da mono por helpi aliajn… Mia sola iama konato, kiu vizitis min en la malliberejo kaj demandis, ĉu mi bezonas ion… Ankaŭ li deprenis sian protektan manon de sur mi… Laŭdire, ankaŭ ĝi okazis pro anonima letero…
Malgraŭ la antaŭaĵoj tre surprizis min ĉio, kion mi aŭdis.
- Ĉu ankoraŭ troviĝis neniu – miregis Hopkins –, kiu draste vangofrapus tiun virinon provizore?!
- Jen estas la tempo transiri al la afero – rompis Alfonso la Neniulo la pluan romanan konversacion. – Laŭ mi ni devas provi pli frue alveni en Senegalon, ol la armeo. La grandan parton de la vojo ni faros kune kun la soldatoj, poste ni fuĝos…
- Infana ludo! – mansvingis Hopkins la Ŝtipulo.
- Sed ni devus havi tiun taglibron pri la vojo de la ekspedicio, kiun kapitano Mander sendis al la militista komandejo – meditis la kapitano.
- Ni devas akiri tiun taglibron – diris kategorie Alfonso la Neniulo.
Hopkins la Ŝtipulo karesadis sian mentonon.
La kapitano mansvingis malgaje.
- Ĝi estas en la ferŝranko de divizia generalo Rouban.
- En la intereso de vera afero ni povas okupiĝi ankaŭ pri kasorabado.
- Ĉu vi rompoŝtelos… en la militistan arkivejon?
- Estimata sinjoro kapitano! – diris Neniulo. – Vi respondecas pri la senegala parto de la afero, ni agis eĉ ĝis nun ĉi tie, kaj ankaŭ poste ni direktos la prepariĝojn.
Laméter ĝemis.
- Kelkfoje mi konvinkiĝis poste, ke vi pravas. Nun jam mi ne kuraĝas oponi…
Post tio ni revenis en la kazernon.

Deka ĉapitro

La Bajonet-rulcilindro ekiras.

1

Sekvantagon matene ni ricevis unutagan forpermeson. Ĝi signifis tion, ke la kompanio ekmarsos al milito. Duobla cigared- kaj rumporcio. Duono da servo.
Kaj terura kaoso!
La ekiro do pendas en la aero.
Unu tago da libertempo estas bela afero. Ankaŭ por mi, kiu laŭ Potrien iom familiare konsideras la soldatservon.
Kiam mi preteriras la pikedon, kiel la serĝento persone ekzamenas la aspekton de la soldatoj, ĉu ĝi estas laŭregula, Potrien okulmezuras min.
- Áááá… dr!!!
Ĝi signifas tion, ke "á droite".
Mi turniĝas.
- Áááá…s! – li krias akre (á gauche!).
Kaj se li trovus eĉ unu faldaĵon sur mia kamizolo, li resendus min.
Sed li ne havas kaŭzon fari tion, li do nur okulmezuras min:
- Ĉu ni havos feliĉon rilte sinjoron senrangulon okaze de la militiro? Mi atentos pri tio, ke iu rompu la laŭregulecon de la kolumno, kaj se eble la kolonelo estos ĉi tie, kiam la ekiros, kion vi pensas, kion li diros al mi, se li vidos vin marŝi?
- Li dirus: "Kara Potrien…"
- Ne diru tion! Marŝ! Marŝ!… Forportu vin! Porko! – li kriegis – forportu vin ĉar mi batos vin per la glavoplato!…
Mi iris al mia preferata drinkejo *"Kvar Gajaj Kadavrorabistoj*, troviĝanta en la havenon.
Sed mi apenaŭ trinkis la dekan glason da konjako, kiam ŝoforo ektuŝis mian ŝultron.
- Iu atendas vin ekstere, sinjoro. Ŝi deziras paroli kun vi.
Mi iris antaŭ la restoracion.
Grafino La Rochelle klinis sin el aŭtomobilo kaj ridetis afable!
- Ĉu vi koleras? – ŝi demandis.
- Gra… grafino… – mi balbutaĉis…
- Ĉu vi timas ensidi en la aŭton?
Kompreneble mi tuj eniĝis. En la interno de la aŭto kiel peza nebulo ŝvebis la penetra odoro de la jasmeno.
- Palais de Danse!… ŝi diris al la ŝoforo.
- Sed… grafino… ĝi estas eleganta loko, kaj mi…
- Nu… Permesu al mi, ke mi gastigu vin, kiel legianon, ekmarŝontan al milito.
La gastigado de la militirontoj estas tre malnova modo inter la burĝoj de la urbo. Post kelkaj minutoj ni descendis antaŭ la amuzejo, kaj mi paŝis kun la grafino tra la pordego.
Mi ne estas vanta homo, vi povis vidi ĝin el tio, kion mi skribis ĝis nun, sed mi konfesas: estis agrable al mi, ke mi aperos kun tiel eleganta, bela virino en tiel eleganta amuzejo.
Nur ne glitus miaj ŝuoj kun najlitaj plandumoj sur la pargeto. Mi kroĉiĝis al nesingardema kelnero dum mia falo, kaj kelkaj tasoj da kafo falis en la sinon de malgranda societo…
La virinoj en silkaj roboj salte leviĝis ŝrikante, kaj mi ekskuzis min, konvene al la reguloj de la ĝentila konduto
- Padonon… sed tiu idiota kelnero… – kaj per mia manplato mi komencis sekigi la kostumon de iu virino, sed pro tio ŝi komencis ŝrikadi multe pli laŭte. Blankhara homo kun afabla izaĝo liberigis min el mia situacio.
- Gesinjoroj! Ekmilitironta legiano venis inter nin. Ni akceptu lin kun amo! Vivu la legio!
Oni ludis fanfarion kaj ovaciis min.
La blankhara sinjoro prezentis sin.
- Mi estas Van der Ruffus.
- Mi ĝojas. Miaflanke: John Fowler.
Nun li ekvidis la grafinon. La vizaĝo de la afabla nederlandano fariĝis malvarmkonduta. Li kliniĝis profunde.
La soldato estas mia gasto, Mynher.
- Tiam… mi ne ĝenas vin… grafino…
Li kliniĝis denove kaj foriris.
- Venu, ne sidiĝu…
Mi mendis viskion. La grafino petis vinberojn kaj kekson.
- Nu, kara ĵohn… kial vi tiel gape rigadas min?
- Mi pensis, ke vi koleros min.
- Kial mi kolerus?… mi vidis tiel, ke vi estas malsaĝa stultulo. Baldaŭ mi divenis, ke vi estas saĝa, kuraĝa. Ĉu vi ankoraŭ ne aŭdis tiaĵon, ke virino poste enamiĝas iun ĝuste tial, ĉar ŝi lernas de sia damaĝo, ke ŝi havas kontakton kun saĝa viro?
Vere, mi jam aŭdis tiaĵon.
- Unue mi volis mortigi vin. Poste mi ploris dum tagoj, fine mi jam volis nur vidi vin… Mi petas vin, ne tiumu. Mi ne demandos viajn sekretojn. Vi pravas, se vi ne fidas min… Mi atendos ĝis iom post iomi mi regajnos vian konfidon. Mi interkverelis kun la registara komisaro, ĉi-foje mi zorgis pri neniu… Mi amas vin, John… – ŝi flustris kaj kaptis mian manon – viaj sekretoj ne interesas min… nur amu min, kaj ĉirkaŭprenu min kelkfoje per tiuj viaj virecaj brakoj.
Vere mi havas fortajn, virecajn brakojn. Tial mi denove komencis kredi al tiu ĉi virino. Se ŝi ne volas scii miajn sekretojn, fine ja mi absolute ne devas suspektadi ŝin.
- Grafino… mi amas vin, kaj doloris min, kiam mi rimarkis per mia eksterordinara akravido, kiel vi misuzis mian entuziasman admiron.
- Mi ĝojas, ke ĝi okazis tiel. Ĉar mi eksciis, ke vi estas ne nur kuraĝa kaj forta, sed ankaŭ saĝa.
Mi vere devis kredi tion.
- Venu… venu al mi, kie ni estos nur en duopo, kaj neniu gaprigardos nin.
Vere ĉiu gape rigardis. Kvankam mi trinkis kun eleganta mangesto, tenante mian etfingron dise de la glaso, kiel la sinjoroj.
Sed mi trinkis el la glaso, kiu oni uzas por lavi la vinberojn. Sed kiu pensas pri tio, ke duonlitra, kristala vazo servas ĉi tie ne por trinki alkoholaĵon, sed por lavi fruktojn?
Mia ĉiu supekto forvaporiĝis. Sed tio estis vere komprenebla. La grafino estis afabla, humila, ŝia ploranta-ridanta vizaĝo radiis, ŝi brakumis, kisis kaj petis min, ke mi gardu min en kuglohajlo, ĉar ŝi ne transvivus, se mi mortus.
Ĝi sonis sufiĉe verŝajna.
- Mi estos tie, John… kiel ajn… Mi venos, kaj mi preĝos por vi en via proksimo.
- Vi tre estimas min… – mi respondis feliĉe.
…Matene mi ekiris al la kazerno rapide. Ŝi amas min!
Apenaŭ mi faris kelkajn paŝojn, infaneto venis al mi.
- Jen prenu leteron. Sinjoro sendas ĝin.
Jen tio estis skribita en la letero:

"Vi estas granda, mult-ĝiba kamelo! Mi jam skribis al vi, ke vi evitu la sorĉistinon! Ŝi volas reti vin, kiel har-plektaĵon. Kaj fine oni bele mortpafos vin. Vi vidos tion. Vi, ĉevalo.

Ne sciu kiu!"

Vi jam povas skribi al mi kion ajn, Turka Sultano, vi, kaŝiĝanta fripono.
Ŝi amas min! Ŝi amas min! Ŝi amas min!

2

Kiam mi revenis, ni jam estis pretaj por la ekiro.
- Tagmeze estos alviciĝo.
- Tagmeze ni ekmarŝos.
Akfonso la Neniulo staris apud mi, pri kiu mi neniam sciis, kiam li venos tien. Mi ne aŭdis liajn paŝojn.
Mi frapis sur mian frunton timiĝinte.
- He…
- Kio okazis?
- Ni volis akiri… el la ferŝranko de Rouban…
- Ĉu la taglibron?
- Jes.
- Ĝi estas ĉe mi – li diris trankvile. – Mi estis en la urbo.
- Ĉu vi boris la "urson"? – Oni nomis la monŝrankon tiel.
Ĝi okazis alimaniere. Lucy de la Rouban kopiis tion. Ŝi akiris la ŝlosilon de sia patro, kaj kaŝe ŝi elprenis la taglibron por duonhoro el la ferŝrako. Terura afero. Se ĝi iam evidentiĝos… Eĉ pensi pri tio estas malbone.
- Ĉu vi ne vidis *"konaton"?* – mi demandis.
- Ne. Mi maltrankvilas pro *"niaj konatoj"*. Antaŭ la ekiro estos lego de la nomlisto ĉe ĉiu kompanio.
Tagmeze eksonis la trumpeto.
La bataliano estas preta por ekmarŝi. Ĉe ĉiu konstruaĵo de la fortikaĵo staras regulaj vicoj. Blovbruantaj aŭtomobiloj, kuregantaj suboficiroj .
Nun mi ekvidas vid-al-vide, ĉe la sudanaj ĉasistoj Ŝtipulon.
Lego de la nomlisto!
La sola maniero, ke li ne manku el la nomlisto: Li legas ĝin!
Sed kie estas la kapitano?…

3

Hopkins iras tie en la malhela uniformo de la senegaloj. Kelkfoje li alkrias kolere la posteniĝantajn malantaŭajn parojn.
Baldaŭ ankaŭ li mem posteniĝas. Hm… Nun li malaperis. Kie li povas esti?… Jen rigardu, ĉi tie venas suboficiro kurante, li bukas sian romenzonon, spiregas kaj kuras… li atingas la senegalojn…
La leŭtenanto atingas tien surĉevale.
- Kiu vi estas?
- Oni komandis min al la nova senegala taĉmento… Sed iu… enfemis min en la lavejon… kaj…
- En ordo! Vi havas bonŝancon, ke ni iras en militon… Jen estas via suboficira kolego, tiu orientos vin. – Kaj li forgalopis.
Sed la suboficira kolego malaperis.
La kaporalo ne multe interesiĝis. Li ĝojis, ke li saviĝis senpune. Kaj la soldatoj tute ne zorgas pri tio, kiu riproĉas la malantaŭajn parojn.
Sed kie estas la kapitano?
Ni iras en la havenon. Kvin ŝipoj staras unu apud la alia kaj iom pli malplroksime la bela krozŝipo, sur kies flanko estas skribite:

GENEAL DU NEGRIER

Per ĝi veturos markizo De Surenne, la registara komisaro.
- Fixez.
Ni haltas.
- Sác a terre!… Formez le faisceau!
Ni bivakas en la haveno kaj atendas la enŝipiĝon.

Relative estas agrable. Ni veturas per ŝipo.
Kiel ajn plenŝtopita kaj malpura estas la vaporŝipo, tamen multe pli bona, ol marŝi en Saharo.
Vespere, ĉirkaŭ okope, ni iris sur la ferdekon por viŝpurigi ĝin. Kompreneble mi ne ne povis ne partopreni tion.
- Vi estas mia favorato – diris Potrien kun profunda malestimo kaj kraĉis. – Vi ne enuos, ne timu. Viŝpurigu la ferdekon tiel, ke ĝi estus glita, ĉar cetere…
Fingrodika malpuraĵo kovris la ferdekon. Tamen ĝi fariĝis sufiĉe glita. Almenaŭ la serĝento postagmeze falis surdosen tiel, ke la ŝipo ektremis.
Iu fripono ŝmiris tutan pecon da sapo sur lian sojlon. Ĝi estas vere malbona ŝeco…
Mi viŝpurigis ĝis vespero. Ĝi ne estas malfacila laboro, sed mi jam ne havis sapon, tiel mi devis froti la plankon pli forte.
Fine mi staris vid-al-vide al Mazzera surgenue.
- Ni ripozu – mi proponis al la flava homo.
Estis iom malvarma vespero. La vintra klimato de Eŭropo ofte atingas la bordon de Afriko.
Sur la ŝtuparo de la interferdeko ni sidiĝis unu apud la alia.
- Aŭskultu min, vi, citrono – mi diris post mallonga silento. – Tial mi nomas vin tiel, ĉar vi estas malgranda, flava kaj tre acida.
- Ĉu vi volas interbatadi? – li demandis malgaje kaj demetis sian jakon.
- Ne. Mi batus vin volonte, sed tio kaŭzus grandan orel-zumadon.
Li residiĝis.
- Mi diras al vi, Mazzea, ke lasu Alfonson la Neniulon trankvila.
- Ĉu li… nomiĝas Alfonso la Neniulo?
- Jes.
Li diris nenion. Li enspiris profunde la fumon de sia cigaredo.
- Li ne mortigis vian fraton.
- Ĝi estas mensogo.
- Bone. Do aŭskultu min. Alfonso la Neniulo petis min, ke mi ne rakontu tion, kion li konfidis al mi. Sed mi rakontos ĝin. Estus stultaĵo, ke du bonaj figuroj vane mortigu unu la alian.
Mi rakontis al li la tutan historion. Ĉion, kion mi sciis pri Katerina, pri la kliniko kaj pri lia mortigita frato Andreo Mazzea.
Longe li sidis silente. Ie en la nebulo sonis sireno de ŝipo, ni estis malsekaj, kaj malvarmis niaj manoj.
- Vi estas stulta. Tiu Alfonso la neniulo ne estas tia knabo, kiu mortigus amikojn, eĉ ne pro virinoj, kvankam tio okazas sufiĉe ofte. Se li estus tiulo, li jam estus mortiginta vin delonge. Ĉar tio por li estas nenio. Ne estas tiaĵo, kion li ne povus fari. Li estas pli forta, ol mi, kio estas malofta inter la viroj, krome li estas pli rapida, pli lerta ol mi, kaj se li ne legis tiom, kiom mi, tamen li havas tre multe da saĝo.
- Ĉu vi ne venĝus, se iu estus mortiginta vian fraton?
- Rilate mian fraton, mi ĉiam ĝojis, se li ne mortigis iun. Sed se li estus mortigita, unue mi devus scii certe, kiu estas la farinto, antaŭ ol venĝi…
- Mi… ekscios tion…
Proksimiĝis homo en blanka vestaĵo. Li estis la kuiristo, kun antaŭtuko kaj kulero.
- Saluton! Ĉu vi ne volas vespermanĝi!? – li kriis.
Sankta Dio! Hopkins la Ŝtipulo!

5

Ni iris vespermanĝi. Mazzea rapidis antaŭen. Mi kaptis Hopkins-on.
- Ĉu ne estas problemo?
- Nu komence, kiam anstataŭ vingro mi verŝis rumon en la supon. Sed nun jam ĝi estis bona. Mi kontraŭpezis tion per ajlo, ĝi subpremas ties odoron…
Mi havis belajn esperojn rilate la vespermanĝon…
- Cetere supren la kapon – li daŭrigis gaje. – Oni devas lerte miksiĝi en la amaso, tiam okazos nenia problemo. Tiom da novaj homoj estas ĉe ĉiu kompanio, ke estas facile iradi tien-reen… Ne timu, ĝis vi vidos la maljunan Ŝtipulon, oldulo mia…
- Kaj… la kapitano?
- Nenia problemo! Li venas sur la alia ŝipo, kiel militista forĝisto…
- Ĉu li… estas sperta pri tio?
- Kial li devus estis sperta? Ĝustumu vian vespermanĝon, kaj vi tuj estos klarvida pri ĉio… Au revoire! Ne estas problemo, supren la kapon… – Kaj fajfante li malsuprenkuris sur la ŝtuparo de la kuirejo.
En la interferdeko la soldatoj rigardis la vespermanĝon malamike, moroze, ribeliĝonte. Ĝi estis supo. Kun multe da ajlo. Kontraŭ la rumo!…
Vi povas imagi!
La taĉmentestro havis la devon manĝi, kvazaŭ nenio estus okazinta. Gustuminte la vespermanĝon, mi sentis tiel, ke la taĉmentestro meritas la plej altan distingon, kiam li manĝis la supon pro plenumo de sia devo.
Nur mi sciis tion, ke post la manĝo de unu telero da supo la taĉmentestro kial kantas sentimentalajn, malnovajn, popolkantojn.

Dekunua ĉapitro

Antaŭ la decida lukto…

1

Vere ni albordiĝis ĉe Dakar.
La personaro, laŭ la kapitano, rilate la tunaron de la ŝipo, ĝi perdis preskaŭ 22 procentojn el sia viva pezo.
Kvankam en la lastaj tagoj la manĝaĵo estis iom pli bona, ĉar Hopkins la ŝtipulo akiris eceptaron de ie.
Li studis ĝin, kiam mi vizitis lin en la kuirejo. Krom mi jam neniu parolis kun li.
- Vidu Ŝtipulo – mi diris. – Ĝi ne plu estas daŭrigabla tiel. Ke vi bruletigas la supon, tio estas en ordo. Sed kiel troviĝas salo en la nigra kafo?…
- Ĝi estas bela de vi. Ĝuste mi salis rafalon por fari el ĝi paston, kiam la negro faligis sian pipon en la kafon. Mi devis elkafigi ĝin, mi do ŝovis mian salan manon en tion… Kio estas pli bona en la kafo, ĉu salo aŭ pipo?
Kion mi povis respondi al tio? Li pravis.
- Tio estas la danko por mia laboro. Mi ricevas nek soldon, mi kuiras, kiel honora soldato, kaj ĉiu buŝaĉas ĉi tie. Nun lasu vespermanĝi ankaŭ min – li diris kolere. Sur la forno staris la supo. Sed Hopkins elprenis budenon el sia poŝo, kaj li manĝis tion.
Dume estis evidenta fakto, ke oni deŝanĝos la kuiriston en Dakar. Ni restadis unu tagon antaŭ la haveno, kiam ni preparis ĉion por la elŝipiĝo.
- Mi iras venigi la kapitanon – flustris Ŝtipulo. – Nun jam sekvos la vico de la forĝisto, kaj estos problemo…
La ŝipo General du Negrier veturis malproksime antaŭ ni. Brilis ties riparo en la forta, ĝena brilego de la suno.
Tio jam estis la regiono de la Ekvatoro. Seka, sufoka vermego.
La urbo videbliĝis de proksime, la romoro filtriĝis ĉi tien el la profundo de dika polvovualo, la krepuska mondo de la obtuza bruo kaj havenaj lumoj…
Komenciĝis el elŝipiĝo. La afero eble estis vere urĝa, ĉar oni post nelonge signalis alviciĝon, elŝipiĝinte.
La teknikistoj tuj mallaŭdis la ekipaĵojn. Nervoza kaporalo kuregis ĉien, inter la soldatoj, alvenintaj per kvar ŝipoj. Li serĉis la forĝiston… Kie en la infero li estas?
- Rapide, rapide! – akre krias Potrien – kial vi promenaĉas, kiel emeritaj, maljunaj sinjoroj?… Hej, vi, urba fripono, ne trodetalumu pri la dokumentoj…diru al li, ke li ne trodetalumu, mi petegas, ĉar mi suratakos lin…
Ni marŝis tra la nokta urbo! Grincado, tintegado, bruo de la soldatŝuoj… ĉevaloj henetas…
Sur la bona, larĝa vojo, relative en malvarma nokto, ni marŝis fortostreĉe, sed gaje.
La riparo de la krozŝipo kelkfoje ekbrilis, kiam sur la vasta maro la lunlumo falas sur ĝin.
Nun aŭto preterveturas malrapide la marŝkolonon. Tio venis de malproksime, ĝi estas polvokovrita, grandega, verda, turista aŭto, kaj ties ŝoforo…
Infero kaj diablo!
Inter la antaŭenŝovita ĉapo kaj la grandaj okulvitroj de la ŝoforo nur videbliĝis lia nazpinto. Sed vidi la pinton de tiu nazo sufiĉis.
- Hej, Turko! – mi kriis kaj paŝis al li.
Li akcelis timiĝinte, ke la aŭto preskaŭ salte ekimpetis. Sur pli larĝa parto li ricevas vojon de eskapo kaj pretersiblas la marskolonon.
Tiu ruza ulaĉo jam havas sufiĉe da butero sur sia kapo. La fato ĉiam estas kun li… Nun kien li veturas? Kion li volas?
“Vitt… vitt…”
La suboficiroj urĝigante preterrapidas la vicon…

2

Ni alvenis al Pombio. Aerodromo. Nenio alia. Hangaro, kelkaj flugmaŝinoj, maldekstre la maro, dekstre la ĝangalo.
- Á terre!…
La alta, senvaria, okcidenta bordo de Afriko estas la plej forlasita, kaj enua parto de la mondo. Nenie troveblas malgranda golfo aŭ haveno, nur mangrove-arboj, kiuj per siaj nudaj radikoj kroĉiĝas al la sinkinta tero de la subfosita bordo, fare de la akvo.
Ne estas ĝojo bivaki ĉi-regione. La formikoj ennestiĝas ĉien, ronĝante ĉion. Nur la disverŝita petrolo ebligas, ke ili ne ĝenu nin. Pano, cigaredo, brando; iom post iom ĉio havas petrolan odoron, kaj ĝi faras multe pli naŭza la aeron.
Ni ĉiuj duonsurde vagaĉas, ĉar nia cerbo konstanta sonorigado kariljonas pro la duobla kinin-porcio… Malgraŭ la multe da kinino jam okazis pluraj malsaniĝoj je tremfebro. Estas plena ĉiu ĉaro de la Ruĝa Kruco kun novaj kaj recidivaj malariuloj.
La varmo, 48 celsiusgradoj en ombro.
Iom doloras la muskoloj, pezas la palpebroj, akre doloras la artikoj…
Mi sidas kun Alfonso la Nenilo sur la ŝtona bariero de la aerodromo. Ĉi tie almenaŭ ne svarmas la vermoj, lumbrikoj, hirudoj. La tendo de la kantinisto staras sur la cementplataĵo. Sur tiu cementplataĵo sidas, iras aŭ kuŝas ĉiu, kiu trovas lokon por si.
Dika indiĝena, nigra-haŭta kaporalo kriegas al la teknika grupo, ĉar ili jam duonhoron provas ekfunkciigi la dissendan aparaton. Poste li kolere alkriegas senrangulon, ke li portu varmegan akvon por la kapitano. Nun li venas al ni…
- He?! Kial vi ripozas, per la sep sakramentoj!
Mi preskaŭ falas de sur la bariero. Ankaŭ Alfonso la Neniulo forte tenas sin kroĉiĝinte.
Hopkins la Ŝtipulo estas la kaporalo!
Li ŝmiris sin per io…! Mi ĵuras!
- Nu, kial vi gapas?! Ĉu vi surdiĝis? Venu sur la bordon, ni devas rami palison, por ligi boaton al ĝi… En avant, se mi diras, nom du nom!
Mi ekiris malantaŭ li. Ni ankoraŭ apenaŭ estis ĉe la komenco de la paŝejo kondukanta en la ĝangalon, kiam la “negra” kaporalo ekparolis rikanante.
- Supren la kapon, knaboj! Ĉio iras glate!
- Diable, kiel vi fariĝis tia pajaco?
- Per korko, amiko mia. Se vi bruligas ok-dek korkoŝtopilojn malrapide en fajro, kaj per ties cindro parte ĝis la pojnoj, parte de la frunto ĝis la ŝultroj vi ŝmiras vin, tiam vi ricevos tiel glatan juftan koloron… Atendu!
El inter la radikoj de arbo li eltiris pakaĵon, ĉirkaŭvolvitan per akvorezista tolo.
- Mi ofte devas ŝanĝiĝi – li murmuris dume. – Tio gravas: miksiĝi… Se oni serĉas la negran kaporalon, li jam delonge estas sanitara soldato…
En la pakaĵo troviĝis kamizolo de legiana senrangulo. El nia kompanio, numero 77.
- Sed se oni rekonos vin… vi ja estis kuiristo?!
- Ba! Ĉu iu memoras, kiu kuiris sur la ŝipo?
- Nu… kiu menĝis, tiu ne forgesos tion – mi murmuretis.
Elpreninte ion el sia poŝo, li ŝmiris siajn manojn, vizaĝon per tio, kaj li denove fariĝis blankulo. El ladbotelo li verŝis akvon en la gamelon kaj lavis sin. Ni rigardis lin kun respekto. Ĝi estis bela plenumaĵo.
- Kie estas la kapitano? – demandis Alfons la Neniulo.
- Oni jam portas lin – li respondis indiferente.
- Kiel?

- Mi diras: oni jam portas lin.
Dume ni atingis la bordon… kaj ni haltis apud ĉaro, kovrita per tendotolo. Tiu ĉaro staris sola sub larĝaj arbokronoj.
- Kiel kompreni, ke oni portas la kapitanon? – mi akre alparolis lin malpacience.
- Jen tie… – kaj li montris maldekstren.
Du sanitaraj soldatoj proksimiĝis kun brankardo. Ŝtipulo, diablo scias, de kie, elprenis brakbendon de la Ruĝa Kruco kaj fulmorapide surprenis ĝin.
La siniatraj soldatoj alvenis tien kaj demetis la brankardon sur la teron.
Homo kuŝis sur ĝi, sed liaj okuloj apenaŭ estis videblaj pro la multe da pansaĵoj.
- Mi petas – diris iu sanitara soldato –, la negra kaporalo de la senegalanoj diris, ke ni portu lin ĉi tien. Li falis de sur la ĉaro kaj la rado surveturis lin. Li kompatindulo jam agonias… li estas sveninta.
- Bone. Vi povas foriri!
Apenaŭ la soldatoj malaperis, la agonianto side leviĝis.
- He, amiko mia, kion vi faras al mi, tio estas senekzepla.
- Supren la kapon, sinjoro kapitano. Estas nenia problemo. Ni metos vin sur la ĉaron de la Ruĝa Kruco, ankaŭ vi sidu sur ĝin kaj ni iros…
- Ĉu vi freneziĝis?
- Nur ne demandu multe! Antaŭen! Ni devas interkonsiliĝi rapide, kaj se ni estos en la proksimo de la ĉaro, ne babilaĉu, ĉar ni havas ankoraŭ pasaĝeron.
La kapitano ĝemante surprenis la gips-pansaĵon, kiu efektive estas bezonata nur al la frakturo de la membroj, ni kapte levis la brankardon kaj portis al la ĉaro kaj enŝovis ĝin.
Je mia plej granda miro ankoraŭ du malsanoloj estis sub la tendotolo. Iu frostotremis pro malario, la alian eble pikis ia areneo, ĉar li kuŝis tie kun blue ŝveliĝinta vizaĝo, kaj kelfoje li ekĝemis.
- Nenia problemo, kanboj – esperigis ilin Hopkins afable. – Tio estas nenio.
Iun li trinkigis, al la alia, kiu havis febron, li donis kininon kaj palpadis ties maldekstran flankon, kiel ia kuracisto. Poste li etendis sian manon sub sian kamizolon, kaj elprenis cigaron, mordinte ties ekstremaĵon, li ekfumis ĝin kaj mansignis al mi.
- Vi venu sur la veturigistan benkon. Neniulo restu ĉi tie kun la sinjoro kapitano…
Mi sidis apud lin, ekvipinte la ĉevalojn, li ŝovis la cigaron en sian buŝangulon kaj zumkantante pelis la bestojn sur la mallarĝa, kavoplena vojeto…
- Nun ni iras al trankvila loko. La kapitano restos en la ĉaro, li jam diris, pri kio mi devas informi vin…
- Sed se estos inspekto… oni serĉos la ĉaron?
- Ĉu ĝin? Kial vi pensas, ke oni serĉos la varportan ĉaron de panisto en Dakar, dum la kuracista inspekto?
- Homo… ĉu tiu ĉaro…?
Li kapjesis kun gemuta rideto.
- Mi ŝtelis ĝin…
Ĉu vi jam aŭdis tiaĵon?… Nun jam la armeo havis ankaŭ honoran ĉaron.
- Sciu – li rakontis –, en Dakar la situacio estis iom "varma". Oni serĉis ankaŭ la kapitanon. La forĝisto mankis. Tiam vi vidis sole starantan ĉaron en la angulo de la ĉefplaco, mi sidis sur ĝin, kaj vipe instigantes la ĉevalojn, mi antaŭenveturis. La kapitano kaŝiĝis en la ĉaro.
- Sed la vunditoj?…
- Ankaŭ tiujn mi ŝtelis… Hoot… heej… Per la sep sakramentoj!… Ĉi tie troviĝas sufiĉe multa el ili, oni nur devas kolekti ilin kaj meti sur brankardon…
Je mia vorto mi miris lin. Li estas vera bravulo!… La ĉaro veturegis skuiĝante. La krozŝipo restadis sur la glata maro, en la proksimo.
Dume mi ekvidis senarbejon sur montet-deklivo. Sub ĝi Hopkins torde funkciigis la bremoson. Ni haltis.
- Ĉi tie ni povas paroladi trankvile. Se venos patrolon, estos nenia problemo. Ĉaro, kiu liveras vunditojn ne interesas ilin.
Ĉirkaŭ kvindek paŝoj malproksime de la ĉaro ni kuŝiĝis sur tendotolon. Neniulo venis tien. La kapitano restis en la veturilo.
- Ni do priparolis la sekvajn kun la kapitano – komencis Hopkins. – Hodiaŭ nokte li fuĝos.
- Ĉu sola?
- Jes. Li volas tiel. Li ne cedis. Li diris, se oni kaptos nin kun li, tiam la mortpafo estos certa…
- Nu kaj?! – demandis Alfonso la neniulo. – Ĉu la kapitano pensas, ke ni ŝatas ludi vetante nur fazeolojn?
- Ankaŭ mi respondis tion al li. Sed li estas malmolnuka. Li diris, ke ni estas kavaliroj el romano. Ĝi estas lia ia manio pri la kavaliroj.
- Vi ne komprenas tion – mi mansigne silentigis lin tre saĝe. – Multe legintaj homoj scias tiaĵon. Estis kelkaj kavaliroj, el kiuj iu fariĝis cigno, ĉar lia konatulino konstante kantis.
- Ĉu anstataŭ tio, ke li estus buŝe vangofrapinta ŝin? – miris Hopkins. – Strange. Nu egalas. Ni do ne povias ŝanĝi tion.
- Kion do volas la kapitano? – demandis Alfonso la Neniulo.
- Li diris al mi. Ni kopiu trifoje la taglibron kaj la mapon, kiuj apartenis al kapitano Mander. Se iel ni disiĝos unu de la alia, tiam ĉiu el ni scios, kien iri?
- Ĝi estas saĝa – kapjesis Alfonso la Neniulo.
- Transdonu tiujn al mi. La kapitano kopios ilin, kaj mi kunportos ilin aparte por vi ĉiuj.
- Jen prenu.
Li trasdonis. Ŝtipulo metis antaŭ sin kaj rigardadis tiujn.
- Jen tiu mapo signalas la vojon de la rivero Senegalo, per ruĝa linio.
- Ĉu ĝis la rivero?
- De tie ĉi estas facile atingi ĝin. Sed la kapitano konas la vojon bone kaj donos precizan direktadon. Eĉ hodiaŭ mi ŝtelos kompason kaj ĉiuspecajn tiaĵojn.
Mi rigardis lamapon, sur kiu ruĝa linio signalis la vojon de la ekspedicio ĝis la "ĉefurbo" de la tribo fongi. Tamaragda estis tiu loko.
- Mi ne komprenas – mi diris enpensiĝinte. – Tiel la fongi-anoj vere devas scii pri ili.
- Ankaŭ mi… samopinias – diris Hopkins mallaŭte.
- Kio okazos, se la kapitano eraras, kaj la negroj vere faris ian friponaĵon?
Audiĝis bruo de hufbatoj…
Antaŭ ol ni povintus pensadi, kio okazos, apenaŭ kvindek paŝojn de ni, aperis la registara komisaro sur ĉevalo.

3

Alfonso la Neniulo enpoŝigis la dokumentojn rapide.
Sed li malfruis! La registara komisaro ekvidis tiujn! Li saltis de sur sia ĉevalo kaj venis rekte al ni. Kiam li alvenis tien, nia trio jam staris en streĉa atentopozo.
Li strikte kunprenis sian vastan pelerinon. Nur tie kaj ĉi tie ekbrilis kelkaj oraj ŝnuroj aŭ ordenoj de la parada admirala uniformo, el malantaŭ la faldoj de la teksaĵo..
- Bonan tagon, sinjoroj legianoj – li diris kun glacia ironio. – Kian kontraŭŝtatan planadon mi interrompis? Ĉu vi ne povas respondi?! Mi bone konas vin ĉiujn! Mi scias, kiaj tri homoj staras ĉi tie…
Li faris efik-paŭzon, poste li puŝetis per sia rajdbastono nian bruston unu post la alia.
- Hopkins la Ŝtipulo, Alfonso la Neniulo kaj Ŝinketo… Mi surbodiĝis por iom rigardi vin… Sed vi ne estis en la tendaro… – li kolere alkriaĉis nin. – Kion vi serĉas ĉi tie?! Ĉu?!!
Alfonso la Neniulo respondis:
- Ni kolektis kelkajn malsanulojn, ekscelenco, kiuj svenis proksime al la tendaro.
- Ĉu vere… kaj kial vi ne revenis tuj en la tendaron?… Kial vi kunvenis por interkonsiliĝi?
- Ni ekripozis iomete!
- Ĉu vi konspiris?! Stultaj friponoj, ĉu vi pensas, ke vi povas oponi al viaj komendantoj?! Ĉu al la leĝo?! Vi kamaradas kun Laméter, kiu volas iri al la tribo fongi por ribeli ilin kontraŭ la francoj.
Ni silentis.
- Vidu – li daŭrigis pli milde. – Mi scias bone, ke vi estas kuraĝaj homoj, pretaj por ĉio. Mi scias, kion vi faris ĝis nun, bonas se el mil homoj unu kapablas plenumi tion. Domaĝe pri vi. Vi povus atingi multe, se vi estos fidelaj al mi… Tio dependas nur de vi…
Li atendis
- Nu? Patrujperfidulo trompis vin. Ankoraŭ ne estas malfrue. Certe vi cerbumadas pri frenezaĵo, kio signifus vian morton. – Li turnis sin al Alfonso. – Parolu! Mi vidas tiel, ke vi estas la plej saĝa el inter ili.
Hazarde li eraris pri tio. Kvankam li jam foje paroladis kun mi.
- Ekscelenco, ni feliĉe estos je via servo. Tio tute ne signifas ŝanĝon por ni.
- Kiel vi komprenas tion?
- Ankaŭ nun ni estas pretaj kiam ajn oferi nian vivon por Francio.
- Eĥ!… Ĉu vi nun rigardadis dokumentojn?
- Mi legis la leteron de mia amantino.
- Kaj se mi dirus tion, ke vi montru ĝin al mi?…
- Ĉu via ekscelenco dezirus, ke mi montru al mi konfidencan leteron de virino? – li demandis kun delikata, ĝentila rideto.
- Vi ne estas heroo de romano, sed legiano.
- Kaj kiel tiulo, kompreneble ĝentlemano.
- Do se mi ordonus, ke vi montru al mi tiujn dokumentojn?!
- Ĉu vi deziras? – li demandis kun duone malfermitaj okuloj, mallaŭte, kun humila rideto, kaj…
Kaj frosto trakuris mian vertebran kolumnon.
La registara komisaro estis bonega konanto de la homoj. Li ĵetis rigardon malantaŭen, kvazaŭ li domaĝus, ke li venis sen akompanantaro.
Kio okazos, se li ordonos, ke Neniulo transdonu al li la dokumentojn?… Li sciis bone, ke tiu ne transonos ĝin, kaj nek ni farus tion.
La registara komisaro rigardis en tri okulparojn esplore.
Mi ne scias, kion li povis legi el tiuj.
- Mi do ne ordonos tion, ke vi transdonu la dokumentojn. Konservu viajn stultajn sekretojn. Sed ekde nun gardu vin!… Notu ĝin bone, precipe vi! – li montri al Alfonso. – Vi… vi ĝentlemano…
Poste li surĉevaliĝis kaj forgalopis.

4

Ni restis tie kun malbona sento.
- Unuavice ni kaŝu la mapon kaj la taglibron.
- Poste ni rerapidu – diris Hopkins.
Sed lia timzorgo estis superflua. La registara komiasaro ne penadis kun siaj kontraŭuloj, malgrandanime, pere de la suboficiroj.
Ni aŭdis malproksiman bruadon, kaj ni vidis, kiam motroboato ekveturas sur la akvo de la bordo, kaj eĉ el tiel malproksima distanco ni povis rekoni la grandegan, mantelhavan figuron de la registara komisaro… Li reiris sur la krozŝipon.
La kapitano aŭdis nenion el la sceno, li estis en la ĉaro, for de ni. Sed neniel li povis riki diri ion antaŭ la malsanuloj.
Revenante sur la pado jam estis iom malamika la vojo. Vesperiĝis, tie kaj ĉi tie ekbrilis verde-flavaj okuloj en la densejo.
- Ĉu ne? – demandis Hopkins. – Tiu Alfonso la Neniulo estas malofta knabo…

- Kaj mi?
- Vi estas idioto, hooot!…
Kion respondi al tiel malklera homo? Kiom da klasoj li vizitis?
Sur ombra loko ni haltigis la pan-ĉaron el Dakar, kaj li iris ŝteli diabetan vespermanĝon ie por siaj malsanuloj.
Alfonso la Neniulo kaj mi sisiĝis. Oni ne vidu nin kune.
Mi vagaĉis antaŭ la hangaro…
Subite virino venis apud min en vestaĵo de kamaranino. Eble ŝi estis iu kantinistino. Eĉ kvin kantinoj kunveturis kun ni.Tiuj venis kun virinoj.
- John… – ŝi flustris.
Grafino La Rochelle staris apud mi!
- Karulino – mi balbutaĉis kortuŝite, kiam fine mi trovis vortojn.
Mi premadis ŝiajn manojn emociiĝinte.
- Ĉit… Mi komencis danĝeran ludon por vi – ŝi flustris. – Ĝi estas… spionado, se tio evidentiĝus…
- Kiel vi povis fari tion?
- Mi amas vin…
Mi volis ĉirkaŭbrakumi ŝin laŭ mia kutima vireca, sed tenera maniero…
- Atentu – ŝi diris kaj elglitis el miaj brakoj –, nun ni devas esti singardaj… Post unu horo estu ĉe la alterileria kantino… kie la tankoj staras…
- Mi estos tie!
Post unu sekondo ŝi malaperis! Mi ĉirkaŭrigardis. Nek Neniulo rimarkis la etan scenon.
Dio mia! Kia virino ŝi estas! Kaj ŝi amas, amas! Iu ekpuŝetis min.
- Ĉu vi faligis… ĉi tiun leteron?…
Koverto kuŝis antaŭ miaj piedoj.
"Al la senranga soldato numero 21, ĉe la kompanio la unua."
- Jes… Ĝi estas adresita al mi.
Mi sciis, kiu skiribs ĝin. Sed kie li estas, kiel alvenis la letero ĉi tien? Ĉu eble li subaŭskultis?
Mi ĉirkaŭrigardis, sed nenia suspektinda, la Turka Sultano estas nenie.
Jen tio estis skribita en la letero:

"Ŝinketo, vi, langvora remaĉanta ĉevalo, kiu vi estas, ĉu mi ne skribis al vi, ke tiu virino estas granda sorĉistino kaj kondukas vin ĉe la nazo. Estu tre singarda!!? Rilate internacian spioninon! Kaj vi estas internacia, malgaja ĉevalo, idioto kaj tiaĵoj. Atentu bone!!?
Ne sciu kiu!!"

Kie kaŝiĝas tiu ulaĉo?! Kiel li scias tiulo, kiu superruzas la virinon, ŝi subiĝas al tiu, kaj ŝi demandis nek lian sekreton, por ke la amato ne fariĝu cigno.
Sed kion scias tia Turka Sultano pri la virinoj? Kion li legis? Se mi kaptos lin ie, mi do strangolos lin, tio certas!
- Kion vi rigardaĉas?
Alfonso la neniulo alparolis min. La citron miena Mazze staris malantaŭ li. Tiuj iomete interamikiĝis. Jam hieraŭ mi vidis, ke ili estos kune. Ŝajnas, ke ili klarigi la aferon unu al la alia, pro mia promesrompo. Tamen li kredis, ke ne Alfonso la Neniulo mortigis lian farton.
Tial li kreskigis barbon. Ĉar li havis ĝin! Du tagojn la flav-vizaĝulo ne razis sian barbon. Nur siajn lipharojn.
Kian rilaton havas la haroj al la sangovenĝo?
Per manpremo li adiaŭas Mazzea-n, poste li mansignas, ke mi iru kun li.
- Ĉu vi havas bonan kontakton kun la citron-mienulo? – mi demandas.
- Jes. Estis tute bone, ke vi elbabilis la sekreton al li. Sed nun ni havas pli gravan aferon: Ni devus paroli kun Ŝtipulo aŭ kun la kapitano por disdoni la kopiaĵojn.
- Sed kie ili estas?
- Ankaŭ mi ŝatus scii tion.
Cio estas silenta ĉe la panista ĉaro. Ni iras al la mitralistoj, al la sudananoj, en kvar-kvin kantinon! Li estas nenie.
- Ni iru al la tankoj – mi diris. Jen estas la tempo partopreni la rendevuon, sed mi devas sekreti tion antaŭ mia amiko.
- Tie li ne povas esti. Kvar-kvin teknikaj soldatoj estas ĉe ĉiu veturilo, kaj ili bone konas unu la alian… Tamen ni rigardu lin tie.
Malproksime de la tendaro, sur la senfrukta bordo restadis la tankoj. La soldatoj, portantaj supertuton vespermanĝis.
- Li do ne estas ĉi tie – li tuj konstatis.
- Saluton!!!
Ni suprenrigardis. Olea, pufvanga kapo aperis el sub la fermoplato, de la kanontrueto de la tanko, staranta apud ni.
- Kial vi iraĉas ĉi tie, ĉu? – la kaporalo en supertuto kolere alkriaĉis nin.
Hopkins la Ŝtipulo! Li do estas la mondrekordulo de la pezega kategorio de la impertineneco de la homa malvarmsango.
- Mi staras ĉi tie unu horon, atendante la deŝanĝon, kaj vi promenaĉas? Kio ĝi estas, ĉu ripozejo aŭ korso, per la sep sakramentoj!
Li blasfemis tiel, ke estis malagrable aŭskulti ĝin!
Sed dume ni eksciis, ke ni estas teknikaj soldatoj, anonciĝantaj por deŝanĝo.
La homoj zumkantis ĉe la bivakfajro kaj ne zorgis pri ni.
- Mi raportas obeeme, ke du homoj anonciĝas soldatservi ĉe la tanko – respondis Alfonso la Neniulo.
Ni ekiris sur la malgranda ferŝtupetaro, ni grimpis en la internon de la tanko kaj mallevis la fermoplaton.
Klaketo. Lumis la lampo.
Ĝi estis bela, moderna tanko, kun rapidpafa kanono, 75 milimetra. Kvar homoj havis komfortan lokon en ties interno. Ĉar la kapitano kompreneble restadis ĉi tie.
- Hu, ĝi estis bela laboro! – diris Hopkins. – La kvar teknikajn soldatoj helpe de mia kaporala uniformo mi simple sendis antaŭen, ke ili starigu gvatejon dudek kilometrojn de ĉi tie, kaj ili reflektoru la ĝangalon. Ili kunportis ankaŭ manĝaĵon. Tiuj ne revenos dum tri tagoj.
- Kaj se venos la komand-oficiro?
- Tiu ne venos. Li estas en hospitalo.
- Kiu do ordonas nun ĉi tie?
- Mi – respondis Hopkins, kun iom da miro, kvazaŭ li ne komprenus la demandon.
Amiko mia! Ĝi ja estas kariero.
- Knaboj! – diris la kapitano. – Mi ekiros post noktomezo.
- Kiel!
Alfonso la Neniulo transdonis la kopiitan taglibron kaj mapon.
- Ĉu vi kopiis tiujn?
- Jes. Estas domaĝe por ĉiu minuto.
La kapitano longe rigardis la skribaĵon, la mapon, poste Alfonson la Neniulon.
- Ĉu vi estas instruita homo?
- Mi vizitis kelkajn lernejojn… Mi opinias, ke estus bone, se ni parolus mallonge. Eblas, ke oni serĉas nin. Ni do sekvos vin morgaŭ. Kie ni renkontiĝos?
- Nenie. Venu laŭ la mapo en la ĉefurbon de la fongi-anoj, en Tamaragda-n. Ĝis tiam mi scios la solvon de la enigmo, kaj ni povos trankvile reveni kune, aŭ vi ne renkontos min… Mi anonciĝos ĉe la milita tribunalo. Tiel eble mi mildigos ankaŭ la sorton de Kvastiĉ, kiun oni dume kondamnis al dekjara malliberigo. Se oni kaptos vin sen mi, tiam vi estas nur dizertintoj, se kun mi, tiam patrujperfiduloj. Nun ni finu la interkonsiliĝon.
La kapitano denove premis nian manon unu post la alia.
- Mi scias – li diris –, ke vi faras tion ne nur pro la diamant-minejo, sed iomete ankaŭ por mi, kaj por la vera afero… dankon…
Ni ekiris kortuŝite, sed Ŝtipulo kriegis post nin.
- Ne prenaĉu la barieron!… Idiotoj!… Mi nun poluris ĝin unu horon!

Dekdua ĉapitro

La mapo ekparolas!

1

…Malantaŭ la kantino, laŭ ĝangala senco, la grafino akceptis min en luksa ĉambro. Ŝi brakumis mian kolon kaj alpremis min al si.
- Ho, John… kie vi estis tiel longe! Mi tre atendis vin!
- Mi kredas… Sed mi ja estis kun miaj amikoj…
Ŝi klinis sian kapon malgaje.
- Pardonu min… ke mi faris tiun demandon… Mi ne volis scii viajn sekretojn, nur se vi trovos min inda je tio, ke mi estu… via kunhelpantino… Se vi kredos min…
Larmoj brilis en ŝiaj okuloj. Ŝi emociis min ĝis la fundo de mia animo. Laŭ la pastro de skandinava prizono la okulo estas la spegulo de l' animo.
Tiuj okuloj spegulis sinceran amon.
- Vidu, John – ŝi diris poste –, nun mi sentas tiel, ke mia vivo ĝis nun valoris neniom, ĉar mi ne konis vin…
Mi devis kredi tion.
- Aŭskultu min, grafino. Ke ĝis nun mi ne fidis vin kaj mi estis deteniĝema, vi konas ties kaŭzon. Hodiaŭ jam mi scias, ke vi amas min, ke vi ne povas vivi sen mi…
- Ho, kiel bone vi vidas miajn internajn sentojn… – ŝi flustris. – Permesu, ke mi helpu vin!
- Bedaŭrinde vi ne multe povas helpi al mi. Post nelonge mi fuĝos…
- Kunportu ankaŭ min!
- Ne eblas. Mi ekiros al tre danĝera vojo… Se mi revenos, ni neniam plu disiĝos!
- Ĉu vi fuĝos… kun mia eksedzo… kun la kapitano? Ĉar sciu: Laméter estis mia edzo!
Ŝi jam konfidis al mi sian plej grandan sekreton. Kio ĝi estas, se ne amo?
- Mi sciis, karulino. La kapitano fariĝis mia bona amiko.
- Ĉu vere?
- Jes. Li rekonis en mi la sinjoron, kaj li parolis pri vi.
Ŝia vizaĝo ekkonvulsiis.
- Kion?
- Ne multe da bono… – mi estis embarasita. – Li asertis, ke… vi ne estas dommastrumema kaj tiaĵojn.
- Mi malamas lin, ĉar mi ne amis lin… Ho, John! Ĉu vi fuĝos kun li?
- Ne. Li jam fuĝis. Mi sekvos lin kun la knaboj.
Sincere mi rakontis ĉion al ŝi. Nun jam ne staru septo inter min.
- Vi estas vera heroo, John.

La sono de la trumpeto por alviciĝi interrompis la belegan rendevuon. Kelkaj sovaĝaj kisoj, kaj mi kuregis.
Ni viciĝis sur la aerodromo. Apud la kapitano staris oficiro de mararmeo kaj Potrien.
La oficiro de la mararmeo legis el la papero:
- La senrangajn soldatojn numero 9, numero 21 kaj numero 77, el la unua kompanio, la sinjoro registara komiasro ordonas iri sur la krozŝipon, por ke vi servu lin persone.
Pum!
Nun kapute al la fuĝo. Oni ne povas dizerti de sur batalŝipo. Mi estis la soldato numero 21, Alfonso havis la numeron 9, kaj la numero 77 estis sur la kamizolo de Ŝtipulo, kiam la registara komisaro surprizis nin.
Potrien komandas:
- La soldatoj numero 9, 21, 77… A moi!
Ni elpaŝas antaŭ Potrien-on. Alfonso la Neniulo kaj mi.
- Kie estas la soldato numero 77? – demandas la kapitano.
Silento. Suboficiro krias.
- Nu?
- Senranga soldato numero 77 ne estas en la plotono. Nek numero 70.
- Kiel?!… – La kapitano mire rigardas sur la oficiron de la mararmeo. Tiu eklevas sian ŝultron.
- Ni informos lian admiralan ekscelencon – decidis fine la kapitano. – Rompez.
La vico disiĝas. La oficiroj iras en la tendon, kie estas la radioelsendilo. La oficiro de la mararmeo ne iras kun ili… Li promenas.
En tiu momento negro paŝas al mi.
- Iu kantinisto sendas ĝin…
Letero. Jam denove tiu freneza Turka sultano.

Tre domaĝe, ke mi skribas al vi. Ĉar mi ripetas: vi estas granda ĉevalo. La ŝorĉistino ŝtelis dokumentojn de vi, kaj ŝi perfidis ĉion, kion ŝi ekscias de vi. Eskapu rapide ankaŭ vi kaj ankaŭ Alfonso la Neniulo!

Sciu kiu:
la Turka Sultano, vi, idioto!

Mi paraliziĝis. Mi empoŝigas mian manon… Mankas la mapo… la taglibro!… Miaj kopiaĵoj.
Alfonso la Neniulo legis la leteron super mia ŝultro. Poste li rigardis sur min.
Mi sur miajn ŝuojn.
- Nun iru, kaj reakiru la dokumentojn… Vi meritus, ke mi mortpafu vin, kiel hundon…
Mi ekiris senvorte.
Malvarma, stupora trankvilo ekregis min. Mi pensas, ke mi povis iri al la domo, farita el lignotabuloj, kiel ia roboto.
Mi estis certa pri tio, kion mi devas fari. Mi staris antaŭ la malgranda budo, ĉarpentita malantaŭ la kantino. Mi jam estis enpaŝonta, kiam mi aŭdis interparoladon…
Mi povis enrigardi en la ĉambron tra la fingrodikaj breĉoj de la lignotabuloj, najlitaj el lignokestoj.
La oficiro de la marermeo kaj la grafino estis interne. Ili staris tute proksime unu al la alia kaj paroladis mallaŭte. Sed mi aŭdis ĉiun vorton bone.
-… Mi ne povas kredi… – diris la oficiro.
- Ĝi estas tel, sciu, Higgins, ke mi ne erarigas vin. Mi povas pruvi, ke divizia generalo de La Rouban transdonis militistajn sekretojn al Laméter, aŭ al liaj komplicoj.
- Vi scias bone, ke lia ekscelenco principe estas adversulo de la divizia generalo, sed li tre estimas lin, kaj se vi prezentas al li tian suspekto…
- Ĝi ne estas suspekto. Mi havas pruvaĵojn en miaj manoj. La divizia generalo gardis la taglibron kaj la mapon de kapitano Mander; ĉu ne?!
- Jes.
- Nu, mi havas la mapon ĉe mi, sur kiu estas militistaj signaloj kaj notoj de la ĉefstabo. Mi akiris ĝin de tiu soldato, pri kiu ankaŭ li ekscelenco scias, ke li estas la komplico de Laméter.
- Tion… ne eblas… Divizia generalo Rouban estas tia soldato…
- Mi havas ĝin ĉe mi. Ĉar la divizia generalo ne raportis la ŝtelon, estas sendube, ke li kaŝe kovras la aferon.
- Transdoni ĝin al mi… mi tuj…
- Mi ne donos. Nur persone al la divizia generalo. Mi scias ankaŭ tion, ke Laméter fuĝis hodiaŭ vespere, li jam estas survoje al Fongi.
- Ĉu li do… estis… ĉi tie?
- Li estis ĉi tie! Li kaŝiĝadis en la fotikaĵo St. Therese, kaj de tie li venis ĝi ĉi tie. Tiu duonidiota simio elbabilaĉis ĉion.
…Recitante la liniojn de miaj ŝataĵaj klasikuloj: mondo ruiniĝis en mi.
- Kial vi ne volas, ke mi faru raporton pri tio?
- Ĉar mi volas peti ion. Skribaĵon de la registara komisaro, ke mi rajtas mortpafi kie ajn el la kvar homoj tiun, kiu aperos antaŭ miaj okuloj.
Mi teruriĝis… La naturo kelkfoje en kiel anĝela ekstaraĵo kaŝas sian plej turpan kreaĵon?
La oficiro brakumis la virinon, spiregantan pro malamo.
- Kiel venĝema… kruela estaĵo vi estas. Tamen… Mi amas vin…
- Trankvilon, Higgins! – ŝi diris kaj liberigis sin el la brakumo. – Post nelonge alvenos ankaŭ nia tempo. Se la registara komisaro venkos kaj Rouban falos, tiam… mi povos atingi ĉion… Vi… transprenos la postenon de Laméter… vi estos kapitano… kaj ni ricevos… tre multe da mono…
- Kaj ĝis tiam… vi devas koketi kun ĉiu stultulaĉo… – kriis la oficiro de mararmeo malesperiĝinte.
- Ba… ĉu mi alridetas kelkfoje al iu pro ruzeco?… Ĉu la oficiroj de la Sekreta servo ne ŝajnigas, ne surprenas maskovestaĵon!?
Kia artistino ŝi estas. Mi ridetas! Varmegaj kisoj estis tiuj, bonvolu kredi! Sed kiaj.
- Se la registara komisaro aŭdos, ke ne ekzistas senranga soldato numero 77, tiam certe li mem komencos esploron, kaj li venos sur la bordon. Tiam mi raportos la aferon. Nur atentu…
- Nenia kaŭzo por timzorgi, Higgins. Oni neniam kaptos Potemkin-on, ĉar li ne vivas…
- Potemkin… jes… – respondis la oficiro ridante. – Oni devus puni lin unuavice. Kie mi vidos vin dumvoje?
- Vid-al-vide al la sinsulo Sankta Izabela, en la misiista domo. Post du semajnoj… mi renkontos iun… Se eblas, ankaŭ vi estu tie…
Ankoraŭ unu kiso. La oficiro iris.
Mi havis nur tiom da tempo, ke mi kaŝiĝu malantaŭ la malfermiĝanta pordo. Kiu estas tiu Potenkin? Ĉu la kulpulo?…
Higgins malaperis rapide. Mi enrigardis tra la breĉo. La virino staris senmove, kaj fiksrigardis antaŭ sin, preminte siajn pugnojn sur la koron.
Ŝia vizaĝo estis terura. Eĉ spuro de beleco ne estis videbla sur ĝi. La diablaj trajtoj de la malamo, venĝo, envulto deformis tion…
Mi rapide malfermis la pordon.
- Bonan vesperon, kara grafino – mi flustris, kaj mi ne sciis, kia povis esti mia vizaĝo, ĉar la sorĉistino repaŝis kun grandaj okuloj pro teruriĝo.
Mi kaptis ŝian kolon per unu movo, tiun belforman, glatan, neĝe blankan kolon.
- Ne kriu, ĉar mi ekpremos ĝin.
Eĉ pepi ŝi ne kuraĝis.
Mi elprenis mian revolveron kaj premis ties tubon al ŝia frunto.
- Nun mi kalkulos ĝis tri – mi diris tre trankvile. – Se ĝis tiam mi ne estos la mapo kaj la taglibro en mia mano, mi trapafos vian kranion. Tiel min helpu Dio. Unu…
Ne estis minaco en mia voĉo. Mi parolis silente, artigite, preskaŭ flustrante, tamen, kiel ŝi rigardis sur min el malantaŭ la tubo de la pistolo, ŝi fariĝis cindrogriza pro la teruriĝo.
- Du…
Trankvile kaj senhezite mi ektiros la ĉanon je la "tri", mi sciis tion.
Sed ankaŭ ŝi…
- Mi transdonos ĝin… – ŝi flustris. – Tie… en la tirkesto…
- Diru la veron, ĉar ne estos plua demando, nek plua kalkulo, se la tirkesto malplenas…
- Jen do ĝi estas… vi, diablo… – ŝi siblis kaj eltiris la du dokumentojn el sia vestaĵo.
- Nun turniĝu vizaĝe al la muro… Kalkulu ĝis kvindek… Se vi ekmoviĝos pli frue…
Ŝi turniĝis. Rapide, preskaŭ ĝoje. Ŝi jam planis ion.
Sed en tiu momento, kiam ŝi staris dorse al mi, mi batis ŝin je la kapo tiel per la kolbo, ke ŝi falis svene sur la plankon .
Kiel?
Jes. Mi batis virinon je la kapo. La unuan fojon en mia vivo. Sed tiu virino ne apartenis al la malpli forta sekso. Ŝi estis pli forta, pli danĝera ol cent viroj, kaj la plej malgranda indulgo povintus kosti la vivon de multe da homoj kaj la honoron de respektinda, bonega divizia generalo.
Mi elglitis rapide…
- Pst…
Alfonso staris apud mi.
- Ni rapidu – mi diris –, la virino rakontis ĉion al la oficiro… Post nelonge la registara komisaro venos de sur la ŝipo… kaj tiam kapute al ni!
- Ĉu la dokumentoj?
- Ili estas ĉe mi…
Nun dikstatura ombro paŝis al ni.
- Supren la kapon… estas nenia problemo – li flustris kaj spiregis, kvazaŭ li estus veninta de malproksime. – Venu kun mi, vi ambaŭ.
- Triope ni venos kun vi…
- Kiu estas la tria?
- Mazzea – flustris iu apud ni.
- Hm… Nu egalas… estas nenia problemo, venu post min – spiregis Hopkins. – Nur ankaŭ ĉi tie ni lasu ion el la soldatoj.
Ni sekvis lin. Preteririnte kelkajn arbojn, ni atingis la marbordon.
- Atentu…
Klara lunlumo radiis tie. Ni kaŝiĝis en la ombro. Sur la neĝe brilanta maro ĝuste tiam albordiĝis motorboato, ties ŝaŭmostrio signalis la faritan vojon de la batalŝipo.
La figuro de la registara komisaro altiĝis el la aliaj, sidantaj homoj. Du oficiroj estis kun li. Ili ankoraŭ ne alligis la motorboaton, kiam li jam saltis sur la bordon. Li estis tre serioza. Li rapidis al la tendaro, la oficiroj kaj malantaŭe la mekanikisto sekvis lin.
- Antaŭen!
Ŝtipulo en la sekva sekundo jam estis en la boato. Unu tranĉo… Kiam ni sidis en ĝin, la motorboato jam libere balanciĝis, ekfunkciis la motoro, kaj post mallonga brumkraketo ni ekveturis…
Ni glitis kun plena rapideco en la apudborda ombro…
- Nun la unuan fojon komenciĝos esploro, kiu estis la soldato numero 77… – diris Hopkins. Oni komencos persekuti nin proksimume post duonhoro sur la bordo kaj en la direkto de la ĝangalo, kie oni kaptus nin, se ni ne estus venintaj ĉi tien. Tiel oni trovos niajn spurojn nur tiam, kiam la registara komisaro serĉos la boaton reveninte. Kaj tiam jam estos noktomezo…
- Kaj benzino? – demandis Alfonso la Neniulo.
- Ĝi estos. Se ni atingos la grupon de panarboj, ĉe la kurbiĝo de la bordo, tiam ni tankos (plenigos la benzinujon)… Estas nenia problemo, knaboj, ĉio en ordo, kaj fine ni aranĝos grandan drinkadon… - Post tiuj li kantis.
- Se la krozŝipo komencos persekuti nin, tiam ni ne povos eskapi – diris la citron-kapulo.
- Ni esperu, ke oni ne serĉos la motorboaton ĝis noktomezo
Mazzea aspektis tre strange. Lia rondbarbo elkreskis bele, kaj li razis du karakterizajn striojn ĉirkaŭ sia mentono. Ĝi estis tute individua hararo, kaj tio faris la malgrandan, morozan vizaĝon preskaŭ timige malgaja kaj stranga.
Nenio okazis longe. Kvankam ni jam glitis pli ol unu kaj duonhoro. Poste ekflugis signal-raketo de sur la krozŝipo, apenaŭ videbla en la malproksimo.
- Hopla! – kiáltotta Hopkins – fine oni devenis kun sia multe da saĝo, kio okazis?
Li eĉ pliigis la rapidecon, kiom eblis.
La luno subiris, nigra nokto falis sur la maron, kaj la palmoj fariĝis nigraj ombroj sur la bordo.
La malbonodora sala vaporiĝo precipitiĝis sur nian haŭton viskozece. Estis prema, afrika nokto. Ni sidis langvore en la malgranda motorboato, kaj tre malproksime videbliĝis la lumfaskoj de la reflektoro de la krozŝipo, ekveturonta persekuti nin, kiel ties radioj esplore traserĉis la maron.
Aperis la kurbiĝo de la bordo, la forkosimile disbranĉiĝantaj kronoj de panarboj. La motoro jam bruis malbele… Ni apenaŭ havas benzinon…
- Atentu! – diris Ŝtipulo. – Ni tankos (prenos benzinon)!…
- Kie en la infero vi volas tanik (preni benzinon)?!
La motoro haltis, la boato glitis al la bordo kun malpli rapida elano kaj ties pruo batiĝis al ĝi.
Alfonso la Neniulo kuris la unua el inter la arboj, sur la vojeton. Li ekkriis laŭte. Ankaŭ mi buŝo restis malfermita, kiam mi staris apud lin.
Tanko staris sur la pado!

- Mi diris, se elĉerpiĝos la benzino, tiam ni tankos (prenos benzinon).
- Sed kiel troviĝas ĉi tie… tiu tanko?…
- Mi ŝtelis ĝin. Ni do ascendu…
Ni sekvis Hopkins-on rekoninte lian sagacon, sur la ferŝtupetaro en la tankon.
La malgrand-tipa tanko veturis bonege sur la mallarĝa, arbara vojeto.
- Nun diru, kio okazis – turnis sin Alfonso la neniulo al mi.
Mi rakontis, kion mi aŭdis, kiam la grafino parolis kun la ŝipoficiro.
- Ankaŭ tiu ŝipoficiro, nomata Higgins, estas miksita en la afero – mi diris. Estas butero sur lia kapo. Kaj ili menciis ankaŭ alian nomon, kiu same estas kulpa, sed li jam ne vivas…
- Kiel li nomiĝas?
- Pomadlin… ne… Rodevrin… – tiu nomo neniel venis en mian kapon. – Ili diris, ke li estas la kulpa, sed ne eblas kapti lin, ĉar li jam estas mortinta delonge.
- Diablo forportu vian kapon kukurban! – blasfemis Neniulo. Kvankam vere oni ne povas diri pri mi, ke mi havas kapon kukurban.
Poste mi ekdormis malgraŭ la ekscitiĝo, persekuto klaj danĝero. Kiel poste evidentiĝis, ankaŭ la aliaj. Aŭrore ni sentis teruran puŝon, pro kio ni falis unu sur la alian, krako, grincado kaj tintado; tio informis nin, ke ankaŭ Hopkins la Ŝtipulo ekdormis.
Sed bedaŭrinde ĉe la stirilo.

Dektria ĉapitro

Sekvo de forgesita vorto.

1

Kiel ni forlasis la tankon, ĉe la ŝlima regiono de la rivero Senegalo, ni jam ne devis timi la persekutatnojn.
Ni havis abunde ekipaĵon, nutraĵon, trinkaĵon kaj ceterajn. Hopkins ŝtelis mirindan deponaĵon por ni, kaj li kaŝis tiujn jam antaŭ unu tago en la tankon.
Nur la regiono estis tre sovaĝa kaj malamika. Homo malofte venas ĉi tien.
Kaj antaŭ ni estas la densa, marĉa tereno, kien ni devis penetri sudorienten, al Senegalo!
La lastan fojon ni bivakis ĉe la bordo de la rivero.
Ŝtipulo metis la binoklon de la sapeista kapitano al la okuloj kaj rigardis en la malproksimon.
- Tie estas ia konstruaĵo.
- Eble ĝi estas la forlasita misiista domo, pri kiu la grafino parolis.
- Verŝajne. Tie vid-al-vide, ĝi estas la insulo Sankta Izabela.
Iom senvorte ni iris plu, por ke ni ne devu vidi la senhoman insulon. Estus bezonata ŝarĝportanta mulo por la pakaĵoj, sed Hopkins ne povis ŝteli ĝin. Ni ekiris en la ĝangalo. El la humida grundo svarmegis multe da lumbrikoj, vermoj, hirudoj. Kaj estis sufoka, malseka varmo. Ni konstante glutis la kininon, tamen ĉiuj miaj ostoj lancinis, miaj okuloj pikdoloris, kaj la koro plie nur konvulsiis, ol laboris.
Ĉiunokte ni aŭdis strangan malproksimiĝantan kaj proksimiĝantan tamburadon.
- Kio ĝi estas? – demandis Hopkins la unuan tagon.
- Ili koncentriĝas, ĝuste tiel, kiel la aŭropaj armeoj. Ili kolektas de ĉie la popolon fongi kaj la parencajn negrojn, por ke la milito trovu ilin preparitaj.
- La milito… – mi murmuris. – Se la tuto malfruis, kaj eksplodos la milito, kiam ni estas survoje, tiam ni vane posedos la minejon… vane evidentiĝos la sekreto.
- Vi estas idioto, supren la kapon! – stentoris Ŝtipulo, maĉante la cigaron de artileria ĉefleŭtenanto. Ne estos milito, ĉio evidentiĝos, la minejo estos la nia, kaj la kapitano edziĝos. Ni dormu!
Tia homo li estis!

2

La sekvan tagon matene ni atingis negran vilaĝon.
Sminkitaj, tatuitaj batalantoj svarmi ĉirkaŭ la rondforma kabanoj, faritaj el rafio, kiujn oni konstruis super la sinkema grundo sur palisojn.
La ĉefo, kiu havis timige longan kapon, venis akcepti nin. Li parolis tiun miksan, francan-indiĝenan lingvon, kiun ĉiu konas en Afriko, se iu vivas longtempe tie.
- Mi atendis vin veni al mi.
- Ĉu vi sciis, ke ni venos en vian vilaĝon? – demandis Alfonso la Neniulo.
- Blanka sinjoro estis ĉi tie, en mia kabano. Li diris, ke vi venos.
Do Laméter iras antaŭ mi.
- Kiam foriris de vi, la blanka sinjoro?
- Dufoje subiris la tago de tiam. Li iris kun gvidanto en Tamaragda-n, al la tribestro de la fongi-anoj, kiel sendito, pro la milito.
- Donu gvidanton al ni, ke ankaŭ ni povu iri en Tamaragda-n, al la blankulo.
La ĉefo serveme konsentis ĉiuj niajn petojn. La tabalantaj staris ĉirkaŭ ni malamike, rigide, se ili insultis nin nek vorte, nek agante.
La plej belan kabanon, eble tiun de la ĉefo, oni malplenigis por ni, ke ni ripozu dum la nokto. Por la sekva tago li promesis ankaŭ gvidanton kaj ŝarĝportan beston.
- Diablo forportu min – diris Hopkins la Ŝtipulo, dum li ekbruligis la acetilen-lampon de Potrien –, se ne estas peko kontraŭ Dio pafmortigi tiujn pacemajn negrojn.
Nun fine ni metis la mapon kaj la taglibron antaŭ nin, por difini nian taskon.
La taglibro estis mallonga, ĉar la vojo daŭris apenaŭ kelkajn tagojn, dum la ekspedicio kun lordo Peebrock kaj kapitano Mander atingis Tamaragda-n. Grandparte tia teksto ĝi estis:

Hodiaŭ ni iris proksimume dek ses mejlojn da vojo sur glata, bona tereno. Iu mulo mortis pro mordo de serpento, la ŝarĝon denove ni dividis…" – "Antaŭtagmeze ni transmetis la filmekipaĵon sur la maldekstran flnakon de la nulo, por ke la kamerao ne tro varmiĝu, ĉar la suno brilas nekutime forte. Posttagmeze ni denove metis la ekipaĵon sur la dekstran flankon de la besto, por ke la suno ne tuŝu ĝin. Tial ni iris malpli longan vojon hodiaŭ… La rivero jam ne videbliĝas malantaŭ ni…

Fine:

"Ni atingis Tamaragda-n, la "ĉefurbon". Estas multe da kabanoj. Ni konas bone tiun lokon pere de la fotoj de Peevbrock…"

Poste rompiĝas la notoj.
- Mi ne komprenas, kion esperas la kapitano – mi diris. – La centestro skribas klare, ke li estis en Tamaragda-o, kaj la ĉefo de la fingi-anoj asertas tion, ke li vidis nek ties spuron.
- Malbenita historio ĝi estas – rimarkis la citron-vizaĝulo, havanta dense kreskantan ebon-koloran barbon -, oni rekonis ankaŭ laŭ foto, ke la ekspedicio estis en Tamaragda.
- Ni vidos tion – ĝemis Alfonso la neniulo. – Nun unuavice ni dormu!
- Kaj supren la kapon – aldonis Ŝtipulo, kiam li refutinte siajn vortoj, li klinis sian kapon sur la kaŭĉukan kuŝenon de la kantinisto de la infanterianoj, kaj li tuj komencis ronki.

3

Ni iris en malbenita regiono. Tiel densa humido vaporiĝis el la huma grundo, tiel abomenindam svena varmego streĉiĝis super la ĝangalo, ke ni prenis aeron sufokiĝante. Milionoj da moskitoj venis kun ni, sursidantaj nin.
Sed fine ni atingis oriente la kurbiĝon de la rivero Senegalo, de tie sekvante la fluon de la akvo, ni iris al nordo. Ni havis mulon kaj gvidanton.
- Nun ni turnos nian dorson al tiu rivero, kaj ni iros tien, en la ĝangalon – montris la indiĝeno la novan direkton.
- Ba… – respondis Alfonso la Neniulo nervoze – Tamaragada ja estas sur la alia bordo.
- Kiel vi povas diri tion, bona sinjoro, al mi?… Sur la alia bordo loĝas nur malicaj animoj. Oni nomas ĝin: *"Malbenita borldo".* Ĝangalo kaj marĉo, serpento, krokodilo kaj diabloj… Nanaj buŝmen-oj… Tiuj estas simioj kaj ne homoj…
- Ĉu vi diras, ke la alia bordo estas… neloĝata? – demandis Alfonso la Neniulo, kaj mi ankoraŭ neniam vidis lin tiel ekscitita.
- En la tuta longo… Inte la du riveroj ĉiam estas inundo, humido…
Li pensadis.
- Bone. Aŭskultu min, Mazzea. Iru kun tiu batalanto al Tamaragda. Kunportu leteron al Laméter!
- Kio okazis?
- Mi pensas, ke mi trovis la spuron de la malaperinta ekspedicio.

4

- Ĉu vi solvis la enigmon?
- Ne. Sed certas, ke tiuj homoj iris ne al Tamaragda, sed ili pasis sur la alia bordo de la rivero Senegalo. – Kaj li denove turnis sin al la indiĝeno. – Ĉu vi estas certa pri tio, ke transe ne estas negra vilaĝo?
- Sinjoro, miaj ĉiuj prauloj vivis ĉi tie… Inter la du riveroj estas la alia bordo, la Malbenita…
- Senegalo kaj Gambio estas la du riveroj.
- Vi nomas ilin tiel. Ni scias, ke malicaj spiritoj estas fermitaj inter la du riverojn.
Alfonso la Neniulo skribis rapide.
Poste li transdonis la leteron al Mazzea.
- Rapidu. – Li turnis sin al la negro: - En tiu paper-sorĉaĵo estas skribita la vivo de tre multe da negroj. Se vi ne alvenos malfrue al Tamaragda, tiam la nubo de la morto forpasos de sur via ĉielo. Vi scias, ke alvenos multe da soldatoj.
- Mi scias, sinjoro, kaj ni rapidos.
- Kie mi povos travadi la riveron Senegalo?
- Tie supre, nek ĝis vesperiĝo vi devas iri, kaj vi trovos mallarĝan kurbiĝon, kie arbotrunkoj kondukas al la alia bordo…
Mazzea enpoŝigis la leteron, kaj kun sia kutima indiferenteco, li silente sekvis la negron. Li demandis nenion plu.
Ankaŭ Alfonso la neniulo ekiris, sed Hopkins kaptis lian brakon.
- He! Ĉu vi rakontus, kio okazis laŭ vi al la ekspedicio?
- Tio okazis al ili, kvazaŭ vi estus farinta la kulpon.
- Ĉu oni ŝtelis ilin?! – konsterniĝadis Ŝtipulo.
- Kaj kio kaŭzis tiun subitan ŝanĝon? Kiel vi pensas, ke ili estas sur la alia bordo? Mi demandis.
- Ĝi estas tiel simpla, ke mi ne komoprenas la militistajn spertulojn… Vidu. – Li elprenis la taglibron de Mander kaj legis… *"Antaŭtagmeze ni transmetis la film-ekipaĵon sur la maldekstran flankon de la muroj… ĉar la suno brilas nekutime borte… Posttagmeze ni denove metis tiujn sur la dekstran flankon de la bestoj"…* Ĉu vi komprenas? *"La rivero jam ne estas videbla malantaŭ ni"…*
- Ne! – ni respondis samtempe.
- Kvankam kiel simpla ĝi estas. Ili ne povis iri al Tamaragda, ĉar la rivero estis *malantaŭ ili,* laŭ la taglibro. Se ili estus irintaj al la bona direkto, tiam la *sono ne estus brilanta el la dekstra direkto antaŭtagmeze.* Sed sur ilin *el dekstra direkto brilis la suno posttagmeze,* ili ja trans*metis* la ekpipaĵon pro la forta sunbrilo *sur la maldekstran flankon de la bestoj! Posttagmeze la suno brilis el dekstra diretkto,* tiam ili ŝarĝis la *dekstran* flankon de la bestoj. *Se la rivero estis malantaŭ ili kaj la suno brilis antaŭtagmeze el dekstra direkto, kaj posttagmeze el maldekstra direkto,* tiam ili povis esti nur sur la alia bordo.
Nia vizaĝo plilongiĝis pro miro!
- Nun estas antaŭtagmezo. Se vi turnas vian dorson al la rivero, tiam la suno brilas el *deksta* direkto. Ili do ne povis iri ĉi tie, sed al la kontraŭan direkton, sur la alia bordo, kie la suno *nun brilas el dekstra direkto,* kiel ĝi estas skribita en la taglibro de Mander.
- Kiel saĝega li estas! – kriis Ŝtipulo.
- Sed iu devis konduki ilin en falsan direkton – mi diris, same tre genie.
- Ĝuste – kajesis Alfonso la Neniulo. – Mander estas senkulpa, la taglibro pruvas tion. Sed tiu lordo Peevbroc… kiu komencis la tuton…
- Kiu malaperis dum la ĉasado! La nederlanda Van der Ruffus estas brava kaj bonkora homo, sed eble lia amiko ne estas tia?
- Sed kiel ĝi povis okazis? – cerbumadis Hopkins.
- Tio certas, mi scias ĝin de laméter, ke ili surbodiĝis komence de la pluva sezono, en granda nebulo.
- Kiel ajn ĝi estas: ni iru!
- Kaj nun vere supren la kapon! – kriis Hopkins.

5

Ni venis tra la ponto… Kia paradizo ĝi estas komare kun la alia bordo. Glita, viskoza tero, la fetoro de la proksimaj marĉoj, krokodiloj, kolubroj, ranoj…
Vere ĝi estas *Malbenita Bordo,* kiel la negro diris.
Ni rigardis la mapon.
- Ĉi tie estas signita senarbejo kun tri platanoj, kie ili strarigis la unuan deponejon. Ĝi estas vid-al-vide al la kurbiĝo, oni devas interŝanĝi nur la du bordojn sur la mapo… – diris Alfonso la Neniulo.
Ni iris ekscitite ĝis la kurbiĝo, *rekte al sudo, kie sur la mapo estis nordo*.
Ŝtipulo, kiu rapidis antaŭen, ekkriis. Poste ni staris tie… Nenia dubo…
Antaŭ ni estis la senarbejo… tri platanoj… kaj… kaj… filmkartoĉujo, kovrita per rusto!
Nun jam certis, ke ni estas proksime al la solvo de la enigmo. La ekspedicio preteriris ĉi tie! Jen staras la platanoj, ĉi tie estis la deponejo, kaj ne sur la alia bordo, kiel ili kredis. Ne pli ol tri tagoj ni atingos tiun lokon, kiun ruĝa ponkto signas ĉi tie, kaj tio estas skribita apud ĝi, ke "Tamaragda".
Kiel ĝi povas esti? Tamaragda situas malproksime, sur la alia bordo, en mult-mejla distanco.
Preskaŭ sen ripozo ni rapidis sur la glita, malfacile irebla tereno. Nun jam tutan tagon falis la densa, grand-pluvera, tamburanta, tropika pluvo. La akvo staris sur la tero en malgrandaj lagoj, kaj aro de la serpentoj tordiĝadis ĉie amase, memorigante al infera vizio. Ni apenaŭ sekvis la elefantvojon, signitan sur la mapo, ĉar la akvo tute kovris ĝin.
- Eĉ por diamant-minejo mi neniam revenus ĉi tien – blasfemis Hopkin.s
- Supren la kapon! – respondis Alfonso la Neniulo ridante. Ĉar nek plu, nek koto, nek varmego nocis lin, li tute ne estis homo, sed blanka leopardo, iranta sur du piedoj.
Aŭrore ni atingis la lastan deklivon supren ĉe la fino de la elefantvojo.
- Tio nun jam certas, ke la ekspedicio vere ne estis ĉe la fongi-anoj… – meditis Alfonso.
- Ĉi-okaze la registara komisaro eraris.
- Jes… Mi estas scivola, se ni rakontos ĉion ĉi, kion diros la potenculo…
Io subite trafulmis mian kapon…
- Kion vi diris ĵus? Ripetu ĝin… La lastan vorton…
- Potenculo… Moŝto!
- Jen trovite! Potemkin!
- Kiel?
- Li estas la kulpa! Tion mi forgesis. La grafino diris ĝin al la oficiro de la mararmeo, nomata Higgins: *"Potemkin estas la kulpa, sed li jam mortis longe."*
Alfonso la neniulo ekmiregis por sekundo, poste li kondutis tre strange.
Li kaptis mian kamizolon kaj komencis skui min, dume li diris tiaĵojn:
- Stultulo, idioto, kretono, melonkapulo… Vi! Vi, sovaĝbesto… Dio mi, kial vivas tia bruto…
Kaj li puŝfaligis min.
- Mi ne komprenas ĝin – mi spiregis –, vi devas kalarigi tion pli bone.
Kaj mi elprenis grndan tranĉilon.
- Formetu tiun tranĉilon, vi, ĉevalo, vi, hebetta kamelo! Se vi estus dirinta tion pli frue, ni jam longe estus atinginta nian celon!
- Sed… nu… Kiu estis tiu… Mi denove forgesis ĝin?!
- Potemkin! Ĉu vi ne scias, kiu li estis!?
- Tamen ne kriegu tiel – interrompis Hopkins –, nek mi konas la koncernulon.
- Li estis rusa ministro.
- Tiam mi vere ne scias, kiel mi konus lin. En la drinkejojn de Oran ne multaj rusaj ministroj alvenis ĉi-jare.
- Sed li estas fama pri historio. Li sorĉe aperigis vilaĝojn el la nenio, pro carino, ne ekzistantajn, florantajn lokojn, kie oni kutimas fari tion en la teatroj. Ĉio estas nur pentraĵo kaj ŝajno. Ĝi estis mondfama trompo.
- Mi nenion sciis pri tio – mi diris malgaje. – Sed de tagoj mi ne tenis ĵurnalon en miaj manoj.
- Ni iru! – li kriis ekscitite.
Li suprenrapidis sur la deklivon. Kiel ne staris tien en la aŭroro, mi pensas, ke ni ĉiuj tri rigardis malsupren kun granda triumfo…
Tie estis antaŭ ni la vilaĝo, bone konata de sur la fotoj de la kapitano. Meze staris la grandega palafito, kun la pagod-similaj kupoloj.
Tamaragda!
Mi sentis tiel, ke mi freneziĝos…
Alfonso la neniulo rulumis cigaredon kaj ekfumis.
- Ĉu nun jam vi komprenas? Potemkin estis lakulpa, ĉar la ideo devenas de li: konstrui, faksimile, neekzistantan vilaĝon…
- Ĉu do ĝi estas.?
- Jen estas la faksimilo de Tamaragda, kion oni konstruis ĉi tie! Vilaĝo laŭ Potemkin.

6

La afero ne estis klara por mi. Se la rusa ministro mortis longe, kiel li povis konstrui vilaĝon ĉi tien?
Kaj cetere.
Kian intereson povas havi Rusio al tiaĵo.
Mi vidis, ke ankaŭ Hopkins cerbumadas pri tio. Kaŝe li interrigardis kun mi kaj levis siajn ŝultrojn. Sed ni jam ne kuraĝis demandi plu, ĉar ni timis, ke Alfonso la Neniulo denove komencos kriegadi kun ni, kaj ni volis eviti tion.
- Nun kio okazos? – demandis Ŝtipulo.
- Ni rekte iros en la vilaĝon. Dirante, ke ni estas dizertintaj legianoj, kaj ŝajne ni interesiĝos pri nenio – diris Alfonso la Neniulo.
Ĝi estis bona plano. Ni iris rapide al la bivakejo. Dika, duonnuda negro ekvidis nin kaj komencis bati gongon, kiam ankoraŭ kelkaj indiĝenoj kolektiĝis kurante kaj gepe rigardis nin. La dikulo venis akcepti nin, dignoplene
- Kion vi serĉas ĉi tie, blankaj soldatoj? – li demandis.
- Ĉu vi estas la ĉefo de tiu ĉi vilaĝo?
- Ne… Mi estas nur la prokuristo, la ĉefo sidas en tiu granda kabano.
Kiel?… Ĉu vi jam aŭdis tiaĵon? Negra tribo havas nudan *"prokuriston"?*
- Kio vi estas, ho dika, nigra homo?
- Prokuristo, sinjoro. Ĉi tie ĝi ne estas tribo, sed "sovaĝa firmao". Nova eltrovaĵo. Mi estas la prokuristo.
- Kaj kiuj estas tiuj, kiuj saltadas duonnude tie en la vilaĝo?
- La akciuloj, sinjoro.
Iomete ni vertiĝis pro la informo. Alfonso la Neniulo palpebrumis ofte.
- Diru al mi, vi, prokuristo – li demandis –, kia akcia societo ĝi estas?
- Laŭkonstitucia, reĝa, akcia societo, sinjoro… Tia, kiel lanado, sed ĝi pagas anakŭ dividendon, kaj neniu laboras…
Ankaŭ kelkaj "akciuloj" kuraĝis veni pli proksimen.
- Ni ŝatus ripozi ĉe vi.
- Ripozi eblas, sinjoro, nur labori ne. Tio estas malpermesita.
- Kial?
- Pro la *Statuto*. Ĉe ni ordonas la *Statuto*.
- Kiu skribis la Statuton?
- La *Statuto* ne estas skribaĵo. Ni havas personan *Statuton*, Grandan Ĉefon, kaj vi devas paroli kun li.
- Gvidu nin al li, sinjoro prokuristo. Ni esperas, ke li akceptos nin volonte.
- Dependas de tio, ĉu vi kunportis pentritan sorĉaĵon, kies nomo estas kartaro remio.
- Kiel??!
- Ĉar la Granda ĉefo, nomata Statuto ŝatus tiaĵon, kaj li konstante blasfemas kaj piedbatas la *kontrolkomisionon…*
Li montris sur kelkajn kompatindajn negrojn, kiuj kapjesadis malgaje.
- Mi do petas vin, gvidu nin al la Granda Ĉefo, kvankam ni ne kunportis sorĉaĵon, kies nomo estas kartaro remio.
- Nek mia praavo aŭdis tiaĵon – konsterniĝadis Hopkins la Ŝtipulo. – Ĝisplande nunda akcia societo…
Dume li piedbatis kelkajn membrojn de la Kontrolkomisiono, ĉar ili amikiĝis kun niaj pakaĵoj.
Ni alvenis al la granda kabano. La prokuristo rapidis antaŭen, kaj ĵus li elvenis.
- La Granda Ĉefo atendas vin.
Ni enpaŝis.
Eŭropano staris viad-al-vide al ni. En ĉifona ĉemizo, en malpura, blanka kuloto, sur lia kapo estis korpoĉapelo.
- Pardonon, sinjoro reĝo… – diris Alfonso la Neniulo. – Ni petas protekton, kaj ni ŝatus ripozi.
- Vi ripozos. Longe. Sinjoro prokuristo! Tiuj du homoj estas niaj malamikoj. Metu ili *en la arkivon…!*
Kiam ni volis elpreni niajn armilojn, jam estis malfrue. Ĉiu membro de la "kontrolkomisiono", la prokuristo kaj mem la cerbmalsana *Statuto* diretkis pistono al ni.
- Malarmu kaj ŝnurligu ilin… Ni jam atendis vin. Ni sciis pri via veno, kaj matene, kiam alvenos la prokuroro de la akcia societo, ni registros vin ĉiujn en la komercan libron sur la konto de la perdo… Alportu drinkaĵon!
Li ĝemis laŭte, elprenis sian monoklon el sia profunda, nigra okulkalvo kaj ĝustigis tion… El lia flava, brila vizaĝo senviva, griza rigardo direktiĝis hebete al la nenio.
Estintus senespera provado kontraŭstari. Oni malarmin,ŝnurligis nin kaj ekiris kun ni.
- Ĉu vi estas murdistoj?
- Ne, sinjoro – babiladis la prokuristo gaje –, nur oficialaj, treege oficialaj. Tio gravas! Ni skrape notos la enspezon sur la var-kolonon, kaj matene, se oni mortigos vin, vi estos registritaj sur kvitiga konto ĉe kasa kolono. Ĝi estas la granda mistero de la duobla librotenado. Ĉar ĉiam estas esplorkontrolado, kaj se ne estas saldo, tiam la Granda ĉefo pidebatas la kontrolkomisionon…
- Ĉu vere? Kaj kial vi atendas ĝis mateno rilate la ekzekuton?
- Ĉar la prokuroro venos tian el la minejo. Li estas tre kruela homo, kaj li turmentos vin, ke vi rakontu ĉiuspecajn aferojn al li. Poste ni mortpafos kaj prirabos vin – li rakontis rikanate, fiere.
Agrablaj homoj ili estas. Sed ni ne rezignis la esperon. Eble kapitano Laméter alvenos ĉi tien kun la fongi-anoj ĝis mateno, se Mazzea kaj la gvidanto rapidis.
Ni alvenis al kabno, ĉarpentita el lignotabuloj, kie staris kvar armitaj gardistoj.
La prokuristo malfermi la pordon, poste ni paŝis en la kabanon.
Sur la tablo brulis meĉo premita en sebon.
- Mi salutas vin, miaj amikoj…
Ni haltis konsternite.
Kapitano Laméter sidis apud la tablo ŝnurligite.

7

La pordo fermiĝis.
- Nur sidiĝu, miaj amikoj – diris Laméter. – Mi opinias, ke estis domaĝe pro la klopodo.
- Kiel… kiel vi estas ĉi tie?… – demandis Alfonso la Neniulo.
- Mi pensas, tiel, kiel vi. Survoje oni atakis, ŝnurligis kaj portis min ĉi tien…
Ni sidis malgaje… Ĝi estis la lasta espero.
- Vi eraras, sinjoro kapitano – diris Alfonso la Neniulo. – Mi venis ĉi tien laŭ la mapo.
Kaj li rakontis.
- Kiel simpl ĝi estas, kaj neniu divenis tion. Vi vere povas esti fieraj pri ĝi – rimarkis Laméter.
Ŝajnas, ke tiu lordo Peevbrock, freneziĝis, kaj la kulpuloj ekspluatis lian megalomanion… – diris Neniulo.
- Sed kial? – demandis Ŝtipulo. – Kial oni faris tion?
- Esvidentas, ke la diamant-minejo devas esti ie en la proksimo, kaj tial okazis ĉio ĉi.
Ni silentis. La muro de la varmega, humida, malgranda kabano konstante eligis la vaporon de la kontinue bruanta, martelbata pluvo. La fiinsektoj svarmi sur ni.
- Unuavice ni forbruligu la mapon kaj ĉion, kiuj povus kompromiti Rouban-on.
Ni forbruligis ĉiujn kopiaĵojn super la krepitanta meĉo. La malgranda kabano pleniĝis per sufoka fumo, kaj ĝi malrapide disiĝis en la senmova varmego. Ni ĉiuj tusis sufokiĝante.
Ni savis la honoron de la divizia generalo De Rouban.

Dekkvara ĉapitro

Ankaŭ frenezulo povas erari.

1

Kiom eblis de la insektaĉoj, ni dormis. Kiam tute ebria, nuda membro de la plenum-komitato envenis, en la unua momento ni eĉ ne sciis, kie ni estas.
- Bonvolu veni – li diris la novaĵon ĝoje –, nun ni mortigos vin… Ve…!
Li diris tion jam ekstere, ĉar la moroze vekiĝinta Ŝtipulo piedbatis lin je la ventro tiel, ke li flugis malproksimen.
- Jen! Por rememori mian morton, dum vi vivos
Oni denove kondukis nin al la granda domo. Loirdo Peevbrock sidis kun fermitaj okuloj, kiel ia idolo. Sur lia malsaneca vizaĝo en mortaj lummakuloj videbliĝis la eterna ŝvitado. La membroj de la plenum-komitato staris ĉirkaŭ nin en la mano kun armiloj. La voĉo de la lordo, kvazaŭ ĝi venis el malantaŭ lia longa, stranga nazo, estis trenata kaj afekta.
- Kial vi venis en la ĉefurbon de la *Konstitucia Reĝa Akcia Societo Peevbrok-Diamantoj?*
- Ni estas dizertintaj legianoj, sinjoro…
- Atendu! Mi estas lordo Peevbrock, mia titolo estas reĝa moŝto, ĉar mi estas la enkorpiĝanto de la *Statuto*.
El la profundo de la kabano nun subite elpaŝis altstatura eŭropano, kun blankaj haroj, en eleganta, tropika vestaĵo.
- Van… Der… Ruffus… – kriis Laméter miregante.
Vere! La nederlandano, kun kiu mi renkontiĝis en la Palais de Dance, kiam mi falis surdorsen sur la polurita pargeto.
- Silenton! – kriis Peevbrock kun fermitaj okuloj. – En la ĉeesto de la Statuto neniu rajtas paroli sen permeso. Mi malfermas la asembleon – li trinkis. – Ni daŭrigos la tagordon laŭ la propono de sinjoro prokuroro.
- Ven der Ruffus! – diris Laméter aplombe. – Ĉu vi vere estas fripono?
- Silenton! – kriis Peevbrock. – Plenumu la rajtan postulon de la direkcio! – Li denove fermis siajn okulojn, kaj lia kapo langvore kliniĝetis flanken.
Estis tute nekredebla… Van der Ruffus! La bonkora, riĉega nederlandano… La amiko de la gubernatoro, la malavara protektanto…
- Mi ne estas fripono, Laméter – li diris kategorie. – Vi agas malbone, se vi insultas min. Mi ŝatus savi vian vivon, sed mi povas fari ĝin nur tiam, se vi kondutos prudente.
- Unue mi devas sciis, kion vi faras ĉi tie. Nek mian vivon mi akceptas de kiu ajn.
- Bone. Sciu do la veron. Antaŭ unu jaro mi ĉasadis ĉi tie kun lordo Peevbroc, kaj ni trovis diamantojn inter Senegalo kaj Gambio. Transdoninte la trovaĵon, ni estus ricevintaj altan premion, sed tion ne interesis nin. Ni volis ekspluati la diamant-minejon. Laŭ la francaj leĝoj privatuloj ne rajtas fari tion. Sed ni bezonis spertulojn, maŝinojn kaj laboristojn. Ĉion ĉi liveri sekrete ĉi tien tra la kolonio estas maleblaĵo. Unuavice ni venigis duoncivilizitajn negrojn el la regiono de Kongo. Tiu ĉi bordo de Senegalo estas neloĝata. Krome ĝi estas malbenita regiono laŭ la famo. Ni konstruigis ĉi tie la faksimilon de Tamaragda helpe de la negroj.
- Gi estas la kulpo de Potemkin – interrompis Alfonso la Neniulo.
- Kie vi aŭdis tiun ĉi frazon? – demandis la nederlandano kuntirinte siajn okulojn.
Peevbrock dorsapogiĝis kaj ronkis kun malfermita buŝo.
- Plie daŭrigu, Mynher – interrompis Laméter malvarmkondute.
- Nu bone. Ni do kontsrtuigis la faksimilon de la ĉefurbo de la tribo fongi, sur tiu ĉi regiono. Mi forvojaĝis. Sur Peevbroc jam tiam estis videblaj la simptomoj de la megalomanio. Li imagis sin la imperiestro de la borso, la kapo de la Monda Akcia Societo. Tiel mi persvadis lin por helpi min. La malsano ankoraŭ ne ekregis lin tiom, li do ŝajnis nur kaprica. Li invitis la mizantropan kapitanon Mander, kiu ĉasadis en Kameruno, por kapti bestojn kune sur la tero de la fongi-anoj. Mia indiĝena gvidanto kaj Peevbrock venigis la sensuspektan Mander-on ĉi tien. En la falsan ĉefurbon, kie negro ludis la rolon de la tribestro de la fongi-anoj, la aliaj tiun de la fongi-batalntoj. Poste la ĉasistoj iris pli supren, kaj kvazaŭ li nun malkovrus ĝin, li trovis la diamant-minejon. Iloi tuj evenis en Gambion. Malsane. Sed Mander tuj raportis, ke li trovis diamantojn kun Peevbrock. Kaj bonkrede li skribis en sia raporto, ke *en Tamaragda, en la ĉefurbo de Fongi-lando. Ĉar li eĉ konjekton ne havis, ke li ĉasis ne en Fongi-lando, sed sur la "Malbenita Bordo".*
- Mi komprenas – diris Laméter severe. – La surbordiĝintan ekspedicion kun la ekipaĵo vi venigis ĉi tien, anstataŭ Fongi-lando. Ili nun direktas la laboron en la diamant-minejo, kiel kaptitoj.
- Ne. Ili eĉ nun ne scias, ke ĝi ne estas Fongi-lando, kaj ilin ne la ŝtato dungas. Ili scias nenion pri tio, kio dume okazis en Oran. Ili pensas pri mi, ke mi estas la direktoro de la min-entrepreno. Pasis ne pli ol du monatoj, kaj ni ekspluatis la diamant-minejon – lia vizaĝo iom ruĝiĝis –, ĝi estas mirinda trezoro. Ni liveras la diamanton en Gambion, de sur anglan teritorion, kaj ĉiu, kiu partoprenis la laboron, tiu ricevas reĝan premion. Ĉar mi mem ekspluatas tion, kion mi trovas. Ne tantiemon mi petas: la turo estas la mia! Mi bedaŭras Laméter, ke tiun celon mi atingis koste de via militista honoro. Sed kiam la diamantoj estos en sekureco, mi zorgos rekompenci vin…
- Tio ne gravas. Nur unu aferon diru al mi. Kiel okazis tiu certa radio-mesaĝo, per kiu vi forigis la krozŝipo?…
- Pri tio mi ne rajtas paroli… Temes pri tia persono…
- Ĉu pri la grafino? – demandis Alfonso la Neniulo.
-.Vi jam la duan fojon interrompas, kun iom da maldiskreteco – tunis son la nederlandano al li. – Mi ne kredas, ke per tio vi servus vone…
- Sufiĉe! – kriis Laméter. – Vi imagas sin ia genia plutokrato, grandstila parvenuo, kvankam…
- Atendu! – interrompis liajn vortojn Van dr Ruffus. – Antaŭ ol vi ofendus min, aŭskultu mian proponon. Vi devus helpi en la laboroj dum la restintaj kelkaj semajnoj. Tiuokaze mi prononas al vi unu milionon da frankoj, kaj al ili cent mil frankojn popersone. Sed vi devas transdoni la mapon kaj la taglibron…
- Ne daŭrigu. Ni scias pri nenia mapo kaj taglibro…
- Mi donos kian ajn altan sumon por ĝi. La politiko de Rouban ne konvenas al miaj celoj, kaj...
- Ne lacigu vin. Se ni estus havintaj tiajn dokumentojn, certe ni estus nenigintaj ilin, kiam ni falis en kaptitecon. Koncerne vian proponon: kun friponoj mi faras nenian kontrakton, sed mi ĝojus, se tiuj tri bravaj homoj saviĝus sendifekte.
Aŭdinte la vorton "fripono" la vizaĝo de la nederlandano ekkonvulsiis.
- Miaparte – diris Alfonso la Neniulo – mi faras kontrakton ankaŭ kun friponoj, sed kun tiaj senanimaj, sangosoifaj, monavidaj hundoj ne.
Li paŝis tute proksimen al ni. Lia vizaĝo estis cindrogriza.
- Ĉu vi… havas tiun opinion? – li turnis sin al ni. – Ĉu ankaŭ vi?
Hopkins la Ŝtipulo surkraĉis lin.
Van der Ruffus ekkriegis kaj retrosaltis kun fulmaj okuloj. La frenezulo vekiĝis.
- La… demandon… por balotado… asembleo…
- La akciuloj decidis tiel – kriis Van der Ruffus –, ke ili transdonos tiujn kvar homojn al la plenum-komitato
Li eliris el la tendo eĉ ne rigardinte sur nin.
La plenum-komitato levis la demandon por balotado…
La plenum-komitato balotis kun feliĉa aklamo:
- Brulmorigi… brulmortigi
- Alia temo… ne estas… Mi finas la asembleon.
Li trinkis kun ŝanceliĝanta supra korpo, poste li apogiĝis surdorsen.
Oni forkondukis nin ĉiujn.
- Bonega ludo – rakontis la prokuristo ĝoje. – Alliginte vin al la paliso, ni ekbruligos multe da lignoj, sur kiuj estas petrolo, kaj ni rigardos, kiel vi brulos.
La aliaj negroj rikanis kun ekscitia atendo kaj alportis la lignon.
- Mi bedaŭras, knaboj… – diris Laméter pale. – Certe vi ne imagis tiel…
- Nu… – murmuris Hopkins kaj rigardis al la negroj, fervore laborantaj… - Ĝi ne estas tre… bela morto.
- Supren la kapon, Hopkins – diris Alfonso la Neniulo.
- Mi ne toleras tian impertinentecon – kriegis Ŝtipulo.
- Knaboj – mi diris –, ni premu la manon unu de la alia, ĉar ni tamen faris bone tion, kio okazis ĝis nun…
Mi opinias, ke ĝi estis tre bonega diro. Niaj ŝnurligitajn manojn, kiom eblis, ni etendis unu al la alia.
La prokuristo, pene portante fasĉinegon, pardonpete kaj instine diris al ni:
- Tuj, tuj, sinjoro…
… Io trasiblis la aeron, kaj en la sekva momento la pinto de lanco elstaris tremante al la brusto de la miranta negro.
Li falis sur la teron senvoĉe.
Kun oreltranĉa kriegado, kvazaŭ la arbustoj kaj la arboj estus viviĝintaj, negroj elkuris el ĉiu direkto, ŝinkinte sin kun bluaj kaj ruĝaj strioj.
- La fingi-anoj! – kriis Laméter.
Batalo ne okazis. Nekalkulebla hajlo de vangofrapoj kaj piedbatoj trafis la estimatan asemblenon de la akcia societo.
La prokuristo estis la sola mortinto. Oni ekokupis la tendaron dum du minutoj kaj ŝnurligis ĉiun.
Mazzea zorgis pri ni, de la komenco de la atako. Ĉar li venigis la tribon fongi.
- Citron-homo! Mi kriegis feliĉe, kaj malgraŭ lia dense kreskinta kaŝtanbruna barbo, ni brakumis, kisis lin, kie ni povis.
Altstatura negro paŝis antaŭ Laméter-on.
- Sinjoro! Via malnova amiko ankaŭ al tiu ĉi *Malbenita Bordo* venigis siajn batalantojn por savi vin.
- Mi dankas, Mimbini – diris Laméter kaj brakumis la ĉefon.
- Ĝi estis vere granda distingo, sinjoro.

2

Kiam Mazzea alvenis en Tamaragda-on kaj ne trovis la kapitanon tie, li rakontis la antaŭaĵojn al la ĉefo de la fongi-anoj kaj transdonis la leteron.
Ankaŭ la ĉefo de la fongi-anoj eksciis el la letero, ke la solvo de la sekreto estas sur la *"Malbenita bordo"* de la rivero, kaj kiel rapide eblis, li ekiris kun siaj batalantoj por serĉi ilin.
Li alvenis ĝustatempe.
La komatinda lordo Peevbrock furiozis, tiel, ke oni devis ŝnurligi lin.
- Kaj nun ni iru al la minejo – ordonis Laméter kun la ĉefo.
En la roka regiono ĉirkaŭ malgranda rivereto, en kelkhora distanco de la Potemkin-ĉefurbo, aperis la minejo antaŭ ni. Tre multe da negroj pioĉadis, puŝis ĉarojn, turniĝanta maŝino bruis.
Ni sturmis ilin el tri direktoj samtempe, kaj la surprizatako okazis tiel subite, ke ili tute ne povis pensi pri kontraŭstaro.
Van der Ruffus-on, neniu scias de kie, Hopkins la Ŝtipulo portis sub sia akselo.
Li ĵetis tiun antaŭ nin sur la teron. Li jam apenaŭ moviĝis. Hopkins iomete batis lin. Dume la fongi-anoj okupis la terenon. Ne irinte al la loĝdomoj, ili ĉirkaŭigis la minejon, por ke neniu povu fuĝi.
- Sinjoro – diris la ĉefo de la fingi-anoj –, kio okazu al la negraj hundoj?
La simio-similaj negroj, importitaj de apud la rivero Kongo, staris tie arigitaj en unu grupo kaj timiĝinte babilaĉis en sia stanga lingvo.
- Ŝnurligu kaj gardu ilin, ĝis la soldatoj venos por ili.
- Ĉu ne estus bone, se mi mortigus ilin, sinjoro?
- Ne faru tion. La intereso de la popolo fongi estas, ke ĉio klariĝu pere de ordinara esploro.
- Vi pravas pri tio.
En la pordo de malpli granda barako aperis kelkaj armitaj eŭropanoj singarde. Ili miris, ke legianoj paroladas kun la atakintaj indiĝenoj.
- Trankvile venu ĉi tien, okazos nenio malbona al vi – instigis la kapitano la membrojn de la malaperinta ekspedicio.
- Laméter! – kriis Musovstij, la rusa inĝeniero pri minejoj, kiam ili venis proksimen.
- Sinjoroj – diris Laméter. – Kvankam bonfide, sed vi partoprenis eksterodinaran friponaĵon.
Ili rigardis la kapitanon mirante, kaj ili multe pli miris, kiam raŭka, dikstatura homo paŝis antaŭ ilin.
- Mia nomo estas Hopkins la Ŝtipulo, kaj mi tre ĝojas, ke mi povas vidi vin, eĉ ke mi povas vidi ion. Matene mi ankoraŭ ne estus kredinta tion. – Kaj li etendis sian manon al la konsterniĝintaj scienculoj: - Supren la kapon, sinjoroj.

3

La terura klimato kolektis ok viktimojn el la membroj de la ekspedicio. Ankaŭ la aliaj havis tre malbonan sanstaton, tiuj konsciiĝis kun nepriskribebla malesperiĝo, ke ili tute ne plenumis sian devon ĉi tie, sed oni nur mistifikis ilin. Ĉar ili laboris ĉi tie pensante tion, ke la ŝtato dungis ilin, kaj ili estas en la proksimo de la ĉefurbo Tamarangda, la ĉefurbo de Fogi-lando.

La krudaj diamantoj kuŝis en amasoj ĉirkaŭ la kribro-maŝino. Fabela trezoro!

- Vi ne rajtas teni min en kaptiteco – provis konduti aplombe Van der Ruffus.

- Ni rajtas eĉ pendumi vin! – respondis Alfonso la Neniulo al li. – Vi estas pli fia ol la havena rabisto, ĉar tiu vivas en mizero kaj estas neinstruita!

- Nu… ne ĉiu – mi rimarkis kun tro da modesteco.

La membroj de la ekspedicio ne riproĉis nin. Ili sidis moroze. Ili ĉiuj estis maldikaj kaj malsanaj. Terure estis labori ĉi tie.

- Mi proponas al vi – diris la nederlandano raŭke – unu milionon da frankoj popersone, se…

- La mono ne helpas – respondis Laméter. – Vi ludis la bonkoran, galantan sinjoron, per iu via mano vi donis afable, vi subskribis kambiojn pro volonteco, kaj dume per la alia vi deŝiris epoletojn inside, vi trompe venigis homojn en la morton, vi estus pereiginta senkulpajn indiĝenojn po centmil-are. Diru Van der Ruffus, kion mi faru al vi, pro tio, kion vi faris al mi?!!

Sekvis tre granda silento.

- Mi opinias – interrompis Alfonso la Neniulo, – estus grave, ke la franca ĉefstabo urĝe informiĝu pri la okazintaĵoj.

- Prave. La mambroj de la ekspedicio retu ĉi tie, nur unu sijoro venu kun ni – ordonis Laméter. – La aliaj kun la indiĝenoj kune garu la diamantojn kaj la kaptitojn.

Antaŭ ol ekiri, ni ankoraŭ prirespondigis la "plenum-komitaton". Ili facile konfisis ĉion, kion ili sciis. La blanka sinjoro, kiu matene kiadis, nur mallonge kutimas restadi ĉi tie (Van der Ruffus), li subite alvenis el la aero sur la grandan mortan branĉon de la rivero, kiu estas tia, kiel malgranda lago.

- Hidroplano – kiirs Alfonso la Neniulo.

- Ĉu tiu mirakolo ankoraŭ estas ĉi tie? – demandis Laméter.

- Ne. Ankaŭ bela virino alvenis kun li. Li ordonis, ke ni iriu sur la alian bordon, ni kaŝobserbu kvar blankajn homojn kaj kunporti ilin ĉi tien. Sed ni sukcesi kapti nur unu, vin, sinjoro. La tri aliaj venis memvole.

- Kie estas la masino? Tio gravas!

- Kio, sinjoro?

- La granda bruanta fantomo.

- Li veturigis la virinon al loko, kie ili atendos la blankajn sinjorojn du tagojn.

- Kaj kie ili atendos la blankajn sinjorojn? – demandis Neniulo kun subpremita, ekscitita voĉo.

- En domo, ĉe la marbordo.

- Ni iru… Ŝi estas en la misiista domo!

Ni ekmarŝis akompanate de dek fongi-batalantoj. Venis kun ni ankaŭ Fraser, la geologo.

Tri tagoj restis ankorŭ el la semajno. Dio mia, se ni atingus la domon, kaj en ĝi la grafinon La Rochelle.

Sed ni havis malmulte da espero pri tio.

4

Eble pasis kelkaj tagoj, kiam ni atingis la arbaran tribon, kie ni ekripozis survoje al Tamaragda, kaj ni ricevis gvidanton. Ni sidis malgje en iu kabano.

- Ni ne estus tro avidaj – mi diris tre sae. – En la lasta minuto, kiel en la kartludo, la fortuno helpos nin. Ĝi ne povas servi nin en ĉio.

- Prave – respondis Hopkins la Ŝtipulo –, sed ĉiam atakas min kataro de pluma apekso, se mi ne povos mortbati la Turkan Sultanon.

Kaj distrite li komencis purigi la monoklon de lordo Peevbroc per la silka naztuko de Van der Ruffus.

- Kial? Ĉu eble vi pensas tion, ke iu timas vin? – demandis la Turka Sultano apogiĝinte al la pordo.

Ni salte leviĝis tiel, kvzaŭ ni estus eksidantaj sur vespo-neston!

- Trovite!

- Nu kaj? Ĉu eble mi kaŝiĝadis de antaŭ vi? Ĉu vi pensas tion? – li demandis provoke kaj elprenis tranĉilegon el sia interna poŝo.

Tuj estus komenciĝinta interbatado, sed la kapitano kaj Alfonso la Neniulo staris inter nin.

- Knaboj – diris la kapitano –, oni devas aŭskulti ĉiun.

- Escepte tiun ulon! – kriegis Hopkins kaj elprenis el sia poŝo la longan, kurban tranĉilon de la ĉefo de la fongi-anoj.

Sed la kapitano tenis lin senmova.

- Audiatur et altera pars! – li diris pacige, kaj ŝajnas tiel, ke tiuj kelkaj vortoj forte impresis Hopins-on la Ŝtipulon.

- Vere povas esti io en ĝi – li respondis enpensiĝinte. – Kvankam mi havas kapopafon – li aldonis heziteme kaj plapadis sian nukon.

- Parolu, Turko – interrompis Alfonso la Neniulo. – Ĉiu aŭskultos vin trankvile, maksimume, se ni ne akceptos vian klarigon, ni pendumos vin.

La Turko tuj ekpuŝis Neniulon je la brusto kaj denove elprenis la tranĉilegon.

- Kial? Ĉu eble mi timas vin? Ĉu jam ankaŭ vi estas forta?! Ĉu ĉi tie ĉiu estas profesia luktisto!? Ĵen rigardu!… Do Alfonso la Neniulo diktos ekde nun!…

La kapitano apenaŭ povis fortiregi lin. Ĉiumaniere tiu volis bati nian trion.

- Nun jam ni finu tion – mildigis lin Mazzea.

- Ĉu eble ankaŭ vi volas esti forta? He? Ĉu vi pensas, ke mia koro estas el vakso? – Ni retenis lin trope, sed li eĉ tiel minacadis. – Ne estas granda arto ordonadi! Al tio ne estas bezonata saĝo... Ek, elprenu la tranĉilojn!

Ni jam sentis tiel, ke ni pardonpetos lin solene, kiam fine li eksidis kaj ekfumis cigaredon, sed li eĉ nun spiregis.

- Mi sufiĉe longe kaŝiĝadis de antaŭ vi, mi eĉ kuris, sed ne tial, ĉar mi timas tiulojn, kiel vi, sed ĉar mi inkognitis pseŭdonome.

- Parolaĉu jam pri la temo – mi instigis lin pacige.

- Tiam donu al mi multe da cigaredoj – li diris agreseme –, ĵus mi fumis la lastan.

Hopkins malestimi ĵetis al li kelkajn longajn, rusajn cigarojn kun cigaredingo, el la posedaĵo de la minej-inĝeniero Kusovskij, devenita el Rusio.

- Mi komencas tie – li turnis sin al mi –, kiam vi kaj Hopkins venis sur la ŝipon, kaj mi sidis en unusola tablotuko.

- Jes, ĝi komenciĝis tie – kapjesis Hopkins, kaj li nervoze maĉis la cigaredstumpon, kiu estis en lia buŝangulo.

- Nur atendu pacience, Hopkins. – Kaj li aldonis kun sangon ribeliga impertinenteco. – Supren la kapon.

- Kiam mi sidadis sur mia ŝipo – komencis la Turko, post kiam li ekfumis –, subite aperis junulo. Li demandis, kie estas la mastro de la barĝo. Mi diris: li forveturis al Gibraltaro, kaj mi gardas la kargon. Li diris, ke li ŝatus deponi kofron por kelkaj tagoj. Mi respondis: ĝi estas multekosta afero, ĉar li devas pagi al mi pro tio. Je la unua vorto li promesis al mi kvincent frankojn. Mi konsentis. Post unu horo oni kunportis la keston kaj metis ĝin en la bilĝon. Mi ricevis la antaŭpagon: ducen kvindek frankojn. Vepere venis iu mia kompano viziti min, kaj li gajnis la tutan sumon de mi per kartludo. Poste ni drinkis, ke ni ebriiĝis. Sekvan tagon, kiam mi vekiĝis, iu ŝtelis ankaŭ mian vestaĵon. Tiam mi ĉirkaŭigiis min per la talotuko. Mi atendis la posedanton de la kesto kun la mono. Sed li ne venis. Tiam mi malsupreniris en la bilĝon kaj fermis la keston per handspiko. Nur kadavro estis en ĝi.

- Kiel li espektis? – demandis la kapitano.

- Li estis dika, malalta homo, kalviĝanta, kun iom larĝa, kuspita nazo.

- Centestro Mander – murmuris la kapitano.

- Jes. Li estis tiu. Pafo trafis lin je la mezo de lia frutno. Mi sciis, se oni trovis min en la societo de la kadavro, tiam okazos malbono. Sed mi ne povis foriri sen vestaĵo. Mi sidis tie en mia senespera stato, ke venu ia idioto, de kiu mi povos ruze pruntepreni ties vestaĵon. Kaj fine okazis tel. Venis Hopkins kaj Ŝinketo. Ne unu, sed du homoj. Poste mi foriris en la vestaĵo de Hopkins. Apenaŭ mi faris kelkajn paŝojn, kiam mi ekvidis mian homon, kiu ŝuldis al mi. Li sidis sur la teraso de restoracio kun la virino. Kun la grafino!

- Kiu estis tiu homo?

- Oriciro de la mararmeo, nomta Higgins.

- Higgins – flustris la kapitano konsternite.

- Jes… Sed tiam li iradis en civila vestaĵo. Mi alpaŝis kaj prirespondigis lin. Li estis tre afabla al mi. La grafino rigardis atente kaj fine diris, ke ŝi bezonus kuraĝan homon, ŝi salajrus min bone, mi venu kun ŝi. Tiel mi venis tra malantaŭa pordo en la sinjoran vilaon. Mi ricevis multe manĝi kaj trinki, kaj la grafino diris, ke ŝi donos al mi du mil frankojn pomonate, dum mi estos en ŝia dungo, kaj ŝi adiaŭis min, ĉar iuvokis ŝin pertelefone en la alia ĉambro. Sed mi ne foriris. Mi reŝteliĝis kaj subaŭskultis. Ŝi parolis kun la oficiro Higgins. Interalie ŝi diris: "Iru sur la barĝon nokte, ĉe la ekstera haveno malaperigu la enhavon de la kesto… Eh! Likvidu tiun homon, ke li ne babilaĉu!" Mi sciis, ke tiu estas Ŝtipulo! Mi tuj forrapidis. Mi kuregis al la barĝo. Neniu estis sur la ferdeko. En la kelo kuŝis uniformo de kapitano sur la planko, kaj en la kesto Hopkins, ŝajne mortinte. Tiam venis Sinketo kun Alfonso la Neniulo. Unue vi volis mortigi min, poste ni ekiris por venigi Kvastiĉ-on. Sed treege doloris min, ke eble Hopkins mortos pro mi. Posteniĝinte survoje, mi reiris al la barĝo, mi vestis Ŝtipulon per la kapitana uniformo, ĵetita en la angulon, kaj mi pene portis lin en malproksiman stratetaĉon. De tie mi telefonis al la militista hospitalo, ke pafvundita kapitano kuŝas ĉi tie. Ĝi etis la sola maniero, ke Hopkins la Ŝtipulo ricevu rapidan kuracistan prizorgadon, kaj unuarangan.

- Ĝi estis tre saĝa ago – diris Mazzea, kaj ankaŭ la kapitano kapjesis.

Hopkins denove mordetis siajn ungojn.

- Poste mi revenis al la grafino. Vane: laboro estas laboro. Vere mi havis bonan sorton. Mi povas stiri aŭton, manipuli revolveron kaj vangofrapadi. Mi konstante sekvis la grafinon per granda, tegita aŭto, pro ke ŝi povi kiam ajn ascendi. Tiam mi veturigis ŝin rapidege, zigzage, ke oni perdu ŝian spuron. Mi estis ŝia korpogardisto. Mi havis multe da mono, mi vivis bone, mi vizitis elegantajn societojn, tamen mi timis vin. La virino kredis, ke mi forlasis, perfidis vin. Pruvis ĝin, ke Ŝinketo persekutis min. Sed ŝi jam ne sciis tion, ke kiomfoje okazis malbono, mi informis vin en letero. Tiu idioto povas danki sian vivon al mi. Mi informis lin, ke tiu virino ekspluatas lian idiotaĵon…

- Ĉu tio estas vera? – demandi Alfonso.

- Mi forgesis… tiam rakonti… – mi estis iom embarasita. – Sed vere okazis tiaĵo…

Ĝena silento.

- Miaparte mi opinias, ke la Turka Sultano estas brava homo – diris Laméter kaj etendis sian manon al nia persekutita amiko.

- Ankaŭ mi – etendis sian manon Mazzea.

- Nomi lin bravulo, ĝi estas troigo, sed mi opinias, ke ĉi-okaze li tamen ne estas tiel granda fripono, kiel li cetere ŝajnas – finis la aferon Hopkins la Ŝtipulo, kaj ankaŭ li etendis sian manon.

5

Jam aŭroris, kiam ni ekvojis. La strange tondita kaŝtan-bruna barbo de Mazzea brilis fantome en la lunlumo. Estas enigmo, ke iu kreskigu sian barbon en la legio tiel fervore.

- Ĉu vi pensas, ke ni ankoraŭ trovos ŝin tie? – demandis Hopkins la Ŝtipulo de la Sultano.

- Eblas. Ŝi atendas la nederlandanon.. Sed la aeroplano staras tie ĉe la marbordo, kaj kaj grafino estas tute bona piloto. Ŝi povas forflugi en kiu ajn momento.

- Kial vi venis de ŝi? – mi demandis.

- El subaŭskultita parolado mi eksciis, ke oni vere kaptis vin. Mi volis iri al la negroj.

Li estas vere bona knabo.

. Fraser, la geologo, kiu estis kun ni, komprenis nenion el la tuto. Sed li tute elĉerpiĝis pro la terura impetego. Ĉar ni marŝis tiel fortostreĉe, kiel eblis de ni.

Ni postlasis lin kun tri fongi-batalantoj. Ni atendos ilin ĉe la malnova misiista domo, ĉar ni ne ripozos ĝis tie!

Vespere aperis la konstruaĵo malantaŭ la lastaj arboj… Ni estis ĉirkaŭ ducent paŝojn de la misiista domo, kiam Alfonso la Neniulo ekkriis.

- Tie!

El iu fenestro de la domo videbliĝis lumo de lampo.

Nun jam ni daŭrigis nian vojon pli singarde…

- Estus prudetne – diris Alfonso la Neniulo –, se la sinjoro kapitano kun Ŝinketo iros antaŭen, du homoj pli facile povas proksimigi la domon nerimarkite. Ni ĉirkaŭigos ĝin kun la indiĝenoj.

- En ordo.
Ni antaŭeniris kun Laméter. Ni ŝteliris sur piedfingroj al la fenestro.
Estis tie! La grafino! Trovite!
Ŝi kirladis samovaron. Kiel belega ŝi estas! La delikata formo de la ploranta-ridanta anĝel-vizaĝo.
Ni iris al la enirejo malrapide. Negra servisto staris antaŭ ni mirante.
Mi kaptis lian kolon tiel, ke li ne povis ekparoli, ĉar spiro da aero ne povisd penetri en lian gorĝon.
Laméter ŝteliĝis en la domon kun gapidaj, senbuaj paŝoj. Nun jam mi lasis la negron libera. Li falis sur la teron svenete. Ŝnurliginte lin haste, mi rapidis post la kapitanon.
Li staris vid-al-vide al la sorĉistino. Ili diris nenion. La grafino apogiĝis al la muro kun malfermita buŝo, teruriĝinte.
- Jen la fino de la vojo – diris la kapitano
Nun ŝi ekvidis ankaŭ min.
- John… – ŝi flustris –, John… ne lasu min…
- Grafino – mi diris kun vireca rigideco. – Ne provadu… Saĝan homon eblas trompi maksimume dufoje.
- Van der Ruffus estas kaptito, ni trovis la ekspedicion, ĉiu detalo de la afero klariĝis – diris Laméter. Iom post iom revenis ŝia trankvilo.
- Jen! Mi estas ĉi tie. Transdonu min al la registaro.
- Ne! Ni kondomnos vin!
Ŝi turnis sin al la pordo timiĝinte.
Alfonso la Neniulo staris tie. La grafino denove ŝanceliĝis al la muro kaj fiksrigardis la enpaŝinton kun teruro.
- Grafo… La Rochelle… Grafo… La Rochelle… – ŝi balbutaĉis.
- Jes, Katarina – daŭrigis Alfonso la Nenulo aplombe. – Grafo La Rochelle! El kiu vi faris Alfonson la neniulon. Mi atentigis en sennoma letero ĉiun, kiun vi enretis. Mi estis grafo La Rochelle, poste persekutata murdisto. Kvankam vi mortigis Andreon Mazzea!
- Malvere… – ŝi komencis, sed ŝia voĉo mutiĝis… Ŝi staris kun elstariĝintaj okuloj dum kelkaj minutoj, poste ŝi ekŝrikis tiel laŭte, ke eĉ nun frosto trakuras mian dorson, se mi rememoras tion.
La flav-vizaĝulo staris en la pordo.
- Katarina – diris Mazzea.
La grafino dorse apogiĝis al la muro kaj rigardis la barban homon kun frenezaj okuloj.
- An… dre… o… Ne!… Forportu… iru… mi ne povas vidi lin…
- Vi konfesos skribe – diris Alfonso la Neniulo, aŭ… Dio mia, kiel strange ĝi estas: Grafo La Ropchelle! Neniu estus kredinta tion!
- Ĉion… – ŝi hapis preskaŭ senvoĉe – …mi faros, nur forportu… tiun… homon… forportu… lin…
- Vi konfesos skribe!…
- Jes… jes… – Ŝi eksidis kaj ne rigardis al la pordo… – Kion… mi skribu?…
Neniulo metis paperon kaj krajonon antaŭ ŝin.
- Skribu tion, kiu mortigis centestron Mander, kaj kiel oni trompis kapitanon Laméter per la radiomasaĝo!
Senvotaj, tre morozaj homoj ĉirkaŭigis ŝin.
- Lia juna frato… – ŝi flustris rigardante Mazzea-n… – Jes… Jose… Sed tiu barbo…
Subite ŝi komencis skribi. Ŝi skribis dek minutojn, impetege, rapide… Poste ŝi transdonis ĝin…
- Jen… estas… ĉio… Ĉu… nun vi… enkarcerigos min?.. Aŭ vi mortigos… min?
Ŝajnas, ke dume evidentiĝis antaŭ ŝi, ke la barba Mazzea estas nur la juna frato de la mortinto.
Laméter legis la skribaĵon, poste li kunfaldis, formetis ĝin kaj diris:
- Mi lasas vin forkuri. Mi ne venĝas virinon. Mi pardonas, kion vi faris al mi.
- Alfonso… – flustris la grafino al Neniulo – …mi iros… al misiejo… flegi malsanulojn… indulgu min.
Alfonso la Neniulo ĝemis.
- Bone. Se Laméter lasas vin forkuri… Nek kontraŭ mi vi kulpis pli multe. Mi pardonas vin. Katarino.
Ŝi turnis sin al mi kun tiu anĝele bela vizaĝo. Eh! Kia neniaĵo estas tio, kion ŝi faris al mi, rilate la aliajn.
- Mi pardonas – mi diris.
- Ankaŭ mi pardonas – diris Mazzea. – Kaj demandu Andreon, eble ankaŭ li pardonos. Li tre amis vin.
Ĝi okazis tiel subite, ke ni tute ne havis tempon malhelpli lin. En la mano de Mazzea ekbrilis io.
Fajrostrio… knalo…
La la diable bela grafino, havanta plorantan-ridantan vizaĝon, kuŝis tie kun trapafita kapo.

Dekkvina ĉapitro

Kiel miaj šatataj klasikuloj diras: Epilogo.

1

Meze de la pluva sezono, kiam la maro estas konstante radianta, stranga, verda kaj krestaj, ŝaŭmborderitaj ondoj ruliĝas sur ĝi, ni enterigis la plej malican virinon de la mondo. Ni entombigis ŝin dece, ĉar neniu rajtas koleri tiun, kiu mortis.
Fraser, la geologo, ĝuste tiam alvenis kun la indiĝenaj akompanantoj, kiam ni ĉirkaŭstaris la tombon senĉape.
- Kiun vi enterigas? – li demandis mirante.
Kulpan homon.
Alfonso la Neniulo ĉizis sur la tombokrucon:

"Ĉi tie ripozas
Katarina Glamarda.

Dio ŝin mizerikordu!"

Mazzea tial kreskigis barbon, por ke li aperu kiel la mortinta Adreo; la sekvan tagon li razis sian vizaĝon glata kaj malaperis.
Kien li iris en la sovaĝa, senhoma regiono, ĉu li mortis aŭ vivas? Neniu scias tion. Neniam plu oni aŭdis pri li.

2

Ŝi motigis mian plej bonan amikon, tamen mi ne povis forlasi ŝin. Tiel ŝi efikis min. Mi fariĝis senhejmulo el grafo La Rochelle.
Ni sidis en grandega boato, ĉar ni daŭrigis nian vojon sur la maro, kaj Alfonso la Neniulo parolis, trankvile, kvazaŭ al si mem. Radiante helverdaj, travideble viglaj ondoj ruliĝis, kiuj havis saŭman randon, ili estis pigraj, longaj…. Mevoj ŝvebis malalte rondflugante sur la griza ĉielo. En prema, sufoka varmego, arde blovis la sudokcidenta vento. La longaj folioj de la ĉebordaj palmoj kelkfoje ekmoviĝis, kiel la tentakloj de krablantaj skaraboj. Tiam la koro de la homoj batadas maltrankvile.
Siroko…
Se falus la densa, longdaŭra pluvo, eble estus pli bone… Sed ĝi ĉesas dum kelkaj horoj, kaj tiam la sudokcidenta aerblovo de la malseka sezono alvenas de malproksime: ĝi ne estas vento, la varmega, vibranta aero apenaŭ treniĝas…
- En Sud-Ameriko – rakontis Alfonso la neniulo –, hazarde mi renkontis hispanan muzikiston, kiu venis de sur la naskiĝtero de Katarina. Mi eksciis de li, ke la knabino fuĝis el sia hejmo, kiam ŝi havis dek kvin jarojn. Oni volis ŝtonumi ŝin en la vilaĝo, ĉar juna kamparano mortpikis la instruiston pro ŝi. Poste ŝi fuĝis kun la kuracisto, kiu forlasis sian familion pro ŝi. Tiun kuraciston oni revidis en la hispitalo de Barcelono, agoniante. Evidentiĝis, ke iu venenis lin.
"Kiu venenis lin?" – mi demandis la muzikiton.
"Mi, sinjoro. Tial mi devis fuĝi en Sud-Amerikon."
"Sed do kial?"
"Pro Katarina. Ŝi persvadis min, ĉar ŝi ne amis la kuraciston. Post la venenigo ŝi forlasi min. Ŝi kunportis ĉiun mian monon. Longe mi kaŝiĝadis, dume mi aŭdis ĉie, ke ŝi edziniĝis al ia Andreo Mazzea…"
"Kial vi ne denuncis ŝin?"
"Mi amis ŝin…"
- Tia ŝi estis – li finis. – Mi forlasis ŝin. Kiom da mono mi ankoraŭ havis, tione estis multa, ĝi restis ĉe ŝi. Kaj de tiam mi vivas kiel Alfonso la Neniulo, ĉar grafo La Rochelle estas police serĉata pro la murdo de Andreo Mazzea. Mi travagis la tuta mondon sekvante Katarinan, tiel, ke ŝi neniam vidis min. Kiam viro falis en ŝian reton, mi tuj skribis al li ŝian kulp-liston.
- Vi estis tiu! – kriis la kapitano.
- Jes. Foje ŝi malapeis. Ŝi vojaĝis al Madagaskaro kaj edziniĝis al la kompatinda Mander. Vere ŝi ne estis tio, ŝi ja neniam eksedziniĝis de mi. Kiam ŝi aperis en Oran subite kun kapitano Laméter, mi jam skribis al li ŝian kulp-liston. Post kiam la kapitano forlasis ŝin, Van der Ruffus estis la sekva. Ankaŭ la nederlandano forlasis ŝin pro mia letero, sed "negoce" li eĉ plu havis kontakton kun Katarina. Van der Ruffus signifis por ŝi la fin-celon: la nekredebla altan tantiemon, rilate la diamantojn kaj venĝon kontraŭ kapitano Laméter… Higgins, tiu juna, nesperta oficiro estis bona ilo en ŝiaj manoj. Por eviti mian sennoman leteron, ŝi sekretis tiun sian kontakton.
…Denove komencis pluvi. El la direkto de la vasta maro kiel densa fumo kumulruiliĝis al ni la varmegaj vaporoj, malalte flugantaj.
Orangutano paŝis el la veproj kun malrapida, ŝanceliĝanta irmaniero kaj montradis siajn dentojn minace al ni.
- Kiun ŝi amis efektive? El tiom da homoj tamen estis iu, kiun ŝi amis?… – demandis Freaser.
- Mi pensas, ke ŝi amis neniun efektive – diris Alfonso la Neniulo enpensiĝinte.
Mia amiko eraris pri tio. Mi opinias, ke la grafino bruldifektis sin iomet ĉe mi.

3

Aŭrore ni alvenis en la proksimon de la krozŝipo. De tie ni komencis nian vojon.
- Dank' al Diko ni ne malfruis – diris la kapitano.. – Ankoraŭ ne knalis la unua pafo. Ĉar komence de la batalo de sur la krozŝipo oni devintus pafi la ĝangalon, kie la negroj kolektiĝas.
- Mi scias – diris la Turka sultano subite.
- De kie?
- La virino parolis kun tiu oficiro, kiu nomiĝas Higgins! Li diris, ke la komencon de la batalo signalos alveno de sendrata telegramo el Oran, *"En avante"*.
- Kia fiaĵo estas komuniki ĝin… Nur pro tio Higgins meritas mortpafon!
- Li diris ankaŭ tion, ke la ordono alvenos tiam, kiam oni kolektos sufiĉe da homoj el Saharo. Tion signifas la devizo *"En avante..."*
Kanonpafo. La ŝrapnelo flugas malproksimen super ni. Tiel oni alvokis nin al kapitulaco. Ni ĉesis remi. Oni malsuprenigis boaton de sur la krozŝipo.

4

Ni estis arestitoj sur la krozŝipo General du Negrier. Ni staris en ĉambro kun glata, fera muro. Ankaŭ Fraser estis kun ni. Proksimume duonhoron ni pasigis tie, kiam fine malfermiĝis la pordo de la kajuto, kaj enpaŝis markizo De Surenne. Li okulmezuris nin.
- Vi do revenis ĉi tien kun via nura vivo, el la ĝangalo – li diris. – Sed nek ĉi tie vi povas esperi pli bonan sorton, ol po unu kuglo! Perfiduloj.
Laméter antaŭenpaŝis.
- Ni finis nian taskon, ekscelenco. Ni revenis sur la korzŝipon por malhelpi la sangoverŝadon kaj transdoni la kulpulojn al la justico!
Li ekkonsternis.
- Kion vi diras?
- Tiu sinjoro – li montris al Fraser – apartenas al la membroj de la malaperinta ekspedicio. La tribo fongi estas senkulpa.
- Parolu!
Li interrompis la kapitanon nek per unu vorto. Kelkfoje li okulmezuris nin kun stranga, mira rigardo. Lia vizaĝo jen blankiĝis, jen ruĝiĝis.
- Vi estas frenezaj uloj… Tiaĵon mi ankoraŭ… hm…
- Ekscelenca moŝto – finis Laméter sian rakonton. – Kion faris tiuj ĉi homoj, ĝi estas la epopeo de la kuraĝo kaj fideleco.
La resistara komisaro sidis longe, enpensiĝinte. Poste li ĝemis profunde.
- Tiam… do… tamen Rouban pravas. – Kaj li denove rigardis nin unu post la alia. – Sed… mi tamen devas rekoni: vi estas ĝisostaj viroj. – Kaj li manpremis nin. – Sed eĉ nun mi ne komprenas, kio estis tiu radiosignalo, Laméter! Ĉu vi vere aŭdis la radiogramon, kio ne okazis?
- Jes. Virino skribe konfesis pri tio. Jen ĝi estas. – Kaj li transdonis tion, kion la grafino skribis.
- Kie estas la virino?
- Ŝi fariĝis viktimo de akcidento.
- Li rigardis nin longe, kun esploraj okuloj.
Sed li diris nenion. Mi asertas, ke tiu homo havis multe da saĝo. Poste li legis la skribaĵon atente. Liaj nazloboj ektremetis. Lia grandega torako moviĝis supren kaj malsupren. Poste li levis la telefonaŭdilon.
- Kapitano Malotte… Tuj arestu la unuan oficiron Higgins! Li estas patrujperfidulo. Mi sendas la ordonon.
Li ekscitite elprenis sian krajonon. Ĝi estis mirinda krajono. El pura oro, kun emajlita ornamaĵo kaj en ties ekstremaĵo estis unusola, grandega, diafana, sangoruĝa rubeno. Li skribis kelkajn liniojn rapide kaj sonorigis. Matroso enpaŝis.
- Portu tiun leteron al la sinjoro kapitano.
Sed la aresto de Higgins ne okazis. Aŭdiĝis tondro.
La perfidulo mortpafis sin.

5

- Bonvolu veni! – diris la resistara komisaro.
Ni iris en la kajuton de la radiisto.
- Jen ĝi estas! – diris De Surenne post mallonga esplorado. Sur la muro de la kajuto, malsupre en la angulo, videbliĝis malgrand breĉo, kvazaŭ ĝi estus truo de muso. Nur planko-pecon oni devisforigi, ke tiu aperturo estu libera. La najbara kajuto apartenis al Higgins, tie li aplikis sonamplifilon. Tra la breĉo *li splisis konduktilon* la sonamplifilon kun la *megafono de la radioaparato*. Poste li vokis la vertiĝantan laméter-on, en kies konjakon li miksis opion, kun tiu novaĵo, ke la ekspedicio anonciĝis pere de la radi. La oficiro paroli el sia prora kajuto, kaj la megafono de la radio redonis la voĉon de Higgins, subpremitan per naztuko, el la najbara kajuto. Sed Laméter pensis tion, ke kapitano Mander parolas.
Poste ni iris en la ĉambron de Surenne.
- Pri tio mi ne povis pensi – diris Laméter.
- Tial vin, Laméter, sarĝas kulpo – respondis la registara komisaro. – Sekvan tagon vi devintus ripetigi la radiogramon fare de Mander.
Alfonso la Neniulo interrompis neatendite.
- Ekscelenca moŝto, kelkaj friponoj povas erarigi ĉiun honestan homon.
- Erari estas home – ankaŭ mi rimarkis tre saĝe.
La registara komisaro ridis:
Vi estas fidelaj homoj de la kapitano. Tio estas aparta merito. Ĉar vi estas kvazaŭ malgrand armeo. Sed la preterlason de la devo vi ne povas nuligi. Nun ripozu. Laméter loĝu en la kajuto de Higgins.
Ni restis solaj.
- Kion signifas tio? – demandis Alfonso la Neniulo.
- Mi rericevos mian honoron… Sed mian rangon ne – diris Laméter malgaje. – Lia ekscelenco estas la plej supera militista eksperto, kaj laŭ lia opinio la preterlaso de la devo estos la kaŭzo de ĉio, kio okazis. Bedaŭrinde lia ekscelenco estas bonega soldato, li ankoraŭ neniam erearis, kaj li estas severa, rilate la eraron de alia homo… Sed mi rericevis mian honoro, knaboj… Dankon…
Kaj li brakumin nin ĉiujn, sed lia vizaĝo estis tre malĝoja.
- Laŭ mi – rimarkis Hopkins, kiam Laméter eliris – ni devus redoni lian rangon.
- Ĝi estas la problemo – diris Alfonso –, ke tiu registara komisaro ankoraŭ ne eraris.

6

Oni sendis la skriban raporton. Ĝi estis longa sendrata telegramo, en kiu oni informis la ĉefstabon pri eksterordinara sensacio. La komando *"En avante"* jam ne donas signalon komenci de la batalo.
- Nur tiam – diris Laméter –, se la batano signifus ne nur reprezalion. Se Rouban estus falinta homo difinitive, tiam oni nun estus okupintaj la landon Fongi, ne konsiderinte la malkaŝon.
- Ĉu tiom da sango?… Superflue.
- Mi nun jam fidas – diris la kapitano poste. – Nek la registara komisaro ŝatus tion! Li estas eminenta soldato, li volis la reprezalion nur konsciante la kulpon de la fongi-anoj.
- Vesperiĝante denove suda aeroblovo ŝanĝis la pluvon. Ĉirkaŭ kvindek celsiusgrada varmego resorbis la akvon el la tero, en densaj, vaporplenaj nuboj. Metrojn grandaj vaporkolonoj leviĝis, kunportante hidrogen-sulfidan marĉ-fetoron. Mi ankoraŭ neniam travivis tian sirokon…. La suda vento konstante blovis, la okuloj doloris, en nia orelo terure tamburis vejno, kaj la ostoj kvazaŭ volus disstreĉiĝi, tiel ili lancinis.
De Surenne cigaris sidante sur la sofo de sia kajuto kaj aŭskultis Hopkins-on la Ŝtipulon. La historio de la *honora* soldatservo tre plaĉis al la registara komisaro, kvankam lia kapo tre doloris.
- Vi… estas afabla tipo… Mi pemesas al vi ekfumi cigaredon… Eh, kien malaperis la cigaroj de tie ĉi?.. – Kaj li serĉis ilin.
Sed tiuj ne torviĝis. Hopkins eĉ post monatoj ĉiudimanĉe fumis unu el tiuj.
- Ne gravas… trinku iom da viskio…
Hopkins trinkis.
- Estas infera vespero, filo mia – diris la registara komisaro.
- Supren la kapon, ekscelenca moŝto…
La registara komisaro ridis ankaŭ pri tio kaj li viŝis sian ŝvitkovritan frunton.
- Nun do iru, kaj… kantonmentu por la nokto. Vi ricevos apartan viskion.
Kaj De Surenne rapide skribis per la emajlita krajono kun unusola rubeno en ties ekstremaĵo.
Li asignis viskion kaj cigaron al Hopkins.
La registara komisaro ne povis dormi. Kvar-kvinfoje li iris antaŭ sian kajuton. Sed la flava, malbonodora nebulo dense algluiĝis al la ŝipo… Ĉio gutis… En la varmega nokto, la lantaj, grandaj gutoj de la percipitiĝanta vaporo estas pli malbona ol la pluvo…
Nur la paŝoj de la ŝipgardistoj estis aŭdeblaj sur la senhoma ferdeko. Oni devas freneziĝi ĉi tie, kiu ne estas el fero. Furiozo tiklis interne la homon. La deziro de amoko…
Kiu travivis tiun nokton ĉe la bordo Okcidenta Afriko, tiu neniam forgesis ĝin…
Kelkfoje ĉeno grincis… Poste klakis la paŝoj de la oficiro, kiu faris sian kotrolturneon….
La admiralo havis malbonan nokton. Li ekdormis por momentoj, konfuzaj ŝonĝoj turmentis lin… Li trinkis vikion kaj ekstris por iradi… Sed lia kapo zumis… Li fale residis sur sian liton…
La telefono sonis… Li etendis sian pezan brakon por levi la telefonon. Kaj kaptis lin tre granda malĝojo… Jes… La Rulcilindro el stiletoj… ne haltas.
Kvazaŭ ĝi venus el lia sonĝo, raportis obtuza, iom incitita voĉo.
- La telegrafisto raportas, ke alvenis ragiogramo je la 12-a horo kaj 5 minutoj.
- Mi aŭdas.
- "La ĉefkomandejo de Oran al la estro de la ŝipo »General« du Nigrier" je la 12-a horo kaj 5 minutoj: *»En avant.«* Oni ripetis la mesaĝon trifoje. »En avant… en avant… en avant…« Ĉu komprenite?"
- Mi aŭdas… Promta radiogramo al la trupoj de la terarmeo: Alarmo, ĝenerala preteco por ekmarŝi, la patroloj tuj ekiru, kapitano Bauvein anonciĝu ĉe mi sur la ŝipo ene de dek minutoj… Ĉu komprenita?
- Jes. Mi ripetas…
Demetinte la telefonaŭdilon, li rektigis sin. Li paŝis sur la komandponton. Nebulo kaj silento… Li estis rezoluta kaj trankvila. Liaj tempioj temburegis, kaj akre doloris lia cerbo, sed nun alvenis ordono, li devas deskui la sirokon.
Do "En avant"… Ĉion kovros sango, fajro… Kaj li estas… ties kaŭzanto… eĉ se pro honoro, eĉ se bonfido…
Grandan premon li sentis sur sia koro… Gutoj falas, kaj tre malproksime aŭdiĝas kelkaj paŝoj….
Ordono estas ordon. Ili devas ataki!
Firmavoĉe li diris en la paroltubon, poste en alian… Stridas krio de oficiro. Trumpeto krakas… Alarmo…!
Dum momentoj ĉiu matroso estas sur sia loko… Oni detiris la ŝirmkovrilon de la kanonoj. Grandaj humidaj ĉifonoj ŝiriĝas: la falva nebulo disiĝas, kaj en la lunlumo la Afrika bordo rigardas al ili blanke, kun paraliziĝintaj palmoj.
Silento kaj trankvilo… Kaj post kelkaj minutoj grenadoj siblos…
La kirasturo turniĝas ŝrikante. Nudaj, brilantaj ŝtalfaŭkoj elstatas el ĝi.
Nun apud la komandponto, sufiĉe laŭte, ke la registara komisaro aŭdas ĝin, du homoj parolas. Hopkins la Stipulo kaj mi.
- Mi diras al vi, ke eraari estas home! Nu! Kiun ajn honestan homon eblas trompi.
- Malprave! La sinjoro registara komisaro estus revenigita kapitanon Mander. Ĉu li konvinkiĝis, ke oni ne trompis lin… Ne eblas simple ekiri, ricevinte mesaĝon… Kiu ajn povas telefono aŭ sendi radiogramon.
- Oni devas revoki ĝin konfirme… – diris laŭte Ŝtipulo nove-denove.
La voĉo de la artileria serĝento krakis:
- Celdirekto kvarcent… dek du…
- Atenton! – siblas la voĉo de la registara komisaro.
Ĉiu haltas. De Surenne levas la telefonaŭdilon sur la komandponto nervoze.
- Telegrafisto… laŭtlegu la mesaĝojn, kiuj alvenis nokte!
Kaj la telegrafisto respondas.
- Nokte mi ne ricevtis mesaĝon…
Momento… Li malsuprenkuregas de sur la ponto kaj staras antaŭ ni. Li rigardas nian vizaĝon tre proksime.
Ni staras en atentopozo. Pasas malbonaj sekundoj.
- Mi ne scias, kion mi devus fari. Ĉu pendumi aŭ promocii vin… Iu el vi telefonis al mi!
Poste li ridis stentore, li prenis mian nazon per siaj du fingroj kaj skuis ĝin dekstren-maldekstren.
- Kiaj ulaĉoj vi estas… Je mia vorto… He! Artileria serĝento! Ĉesigu la ekzercon!… Rompez.
Kaj li iras en sian kajuton.

7

Kiam la prezidanto de la tribunalo levis la demandon dum la ĉeftraktado de la eksterordinara krimproceso, "ĉu kapitano Laméter ne pereterlasi sian devon laŭ vi, Ekscelenco, kiam li akceptis la mesaĝon de centestro Mander sen ĉiu kontrolo?" la registara komisaro respondis jene: "Tiu supozo, ke ne Mander parolas, ĝi estis tiom nefundamentita, ke en la sama situacio kiu ajn, ankaŭ mi mem estus opiniinta la kontrolon superflua."
Oni brile rahabilitis la kapitanon, kaj la heroan fortostreĉon, kiel li forigis la sensencan sangoverŝadon, li ricevis la plej altan distingon. Sed ĉiun distingon superis tiu premio, ke li edzinigis Lacy de la Rouban-on, post tiom da suferoj.
Alfonso la Neniulo kaj mi reiris al nia kompanio kun po unu honormedalo. Kiel milionuloj. Ĉar la 25 %-ojn de la diamantoj ni dividis inter ni, post kiam la kapitano akceptis nenion el ĝi. Tiom estas donita al la trovinto. Ni estis milionuloj. Nu jes. Kvaronparton ni translasis favore al la Turka Sultano. Kompleze ni subskribis la dokumenton. Ŝtipulo la unua.
- Bonvuli subskribi ĉi tie – montris la advokato.
Hopkins elprenis sian krajonon. Ĝi estis mirinda skirbilo. El pura oro, kun emajlita ornamaĵo, en ties ekstremaĵo estis unusola, granda, sangoruĝa rubeno…

Fino

Reen al la cxefpagxo